



VIVU LA GRANDA GVIDANTO PREZIDANTO MAŬ!

EL POPOLA ĈINIO

**VIVU
LA GRANDA
MARKSISMO,
LENINISMO,
MAŬZEDONG-
PENSO!**

VIVU LA TRIUMFO DE LA NAŬA LA KOMUNISTA PA



A TUTLANDA KONGRESO DE PARTIO DE ĈINIO!




Maŭ prezidas la kunvenon.



Kun revolucia heroeco la reprezentantoj, kiuj venis de diversaj batalpostenoj, eniras la kunvenejon.





Ĉiuj reprezentantoj unuanime akceptas la politikan raporton faritan de Vicprezidanto Lin en la nomo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Statuton de la Komunista Partio de Ĉinio.






La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbato
aliaj kamaradoj balotas por elekti la Naŭan Centran Komitato



Alanto Vicprezidanto Lin kun Ĝoŭ Enlaj kaj
mitaton de la Komunista Partio de Ĉinio.

中国共产党第



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin kune kun la reprezentantoj varme celebras la triumfan malfermiĝon de la Naŭa Kongreso de la Partio.

第九次全国代表大会



Raporto al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

*(Farita en la 1-a de aprilo kaj aprobita
en la 14-a de aprilo, 1969)*

Lin Biaoŭ

Gekamaradoj!

La Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio estos kongreso kun profunda influo en la historio de nia partio.

Nia nuna kongreso estas kunvokita en la tempo, kiam la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ gajnis grandan venkon. Tiu ĉi granda revolucia ŝtormo ruinigis la burĝaran komandejon estratan de la rene-

gato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, senmaskigis la plenmanon da renegatoj, spionoj kaj ĝismorte pentorifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon sinkaŝantaj en la Partio kun Liu Ŝaŭki kiel ilia ĝenerala reprezentanto, frakasis ilian intrigon restaŭri kapitalismon, kaj tiamaniere multe plifortigis la proletaran diktaturon de nia lando, multe plifortigis nian partion kaj preparis sufiĉe da kondiĉoj por la nuna kongreso en politiko, ideologio kaj organizo.

I. PRI LA PREPARADO POR LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

La Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando estas grandskala, vere proletara revolucio.

Per konciza lingvo Prezidanto Maŭ eksplikis la necescon de tiu ĉi granda revolucio: “**La nuna Granda Proletara Kultura Revolucio estas tute necesa kaj tre ĝustatempa por solidigi la diktaturon de la proletaro, preventi restaŭron de kapitalismo kaj konstrui socialismon.**” Por plene koni tiun ĉi sciencan aserton de Prezidanto Maŭ, ni devas havi profundan komprenon pri la doktrino de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo.

En la jaro 1957, nelonge post la fermiĝo de la Oka Tutlanda Kongreso de la Partio, Prezidanto Maŭ publikigis la grandan verkon *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*. En tiu verko, sekve de sia *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*, Prezidanto Maŭ plene eksplikis kontraŭdirojn, klasojn kaj klasbatalon sub la kondiĉo de la proletara diktaturo, elmetis la doktrinon, ke en la socialisma socio ekzistas du specoj de kontraŭdiroj malsamaj en naturo — la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo, kaj elmetis la grandan teorion pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo. Kiel brile radianta lumturo, ĝi prilumas la navigdirekton de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, kaj ankaŭ metis teorion bazon por tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio.

Por pli penetri koni la grandan historian kontribuon de Prezidanto Maŭ, estas necese fari lakonan retrorigardon pri la historia sperto de la internacia komunisma movado.

En 1852 Marks diris jene: “**Longe antaŭ mi, burĝaraj historiistoj jam formulis la historian disvolviĝon de tiuj klasaj bataloj,**

kaj burĝaraj ekonomikistoj jam faris ekonomian anatomion pri klasoj. Tio, kion novan mi faris, konsistis en la pruvo de jenaj punktoj: (1) **la ekzisto de klasoj rilatas nur kun certaj historiaj etapo de la disvolviĝo de la produktado;** (2) **la klasbatalo nepre kondukas al la proletara diktaturo;** (3) **tiu ĉi diktaturo mem estas nur transiro al elimino de ĉiuj klasoj kaj al senklasa socio.**” (Marks kaj Engels, *Elektitaj Leteroj*, ĉinlingva eld., pĝ. 63.) La doktrino de Marks pri la proletara diktaturo strekis klaran dividlinion inter la scienca socialismo en unu flanko kaj utopia socialismo kaj diversspecaj pseŭdosocialismoj en la alia flanko. Marks kaj Engels luktis la tutan vivon por la doktrino de proletara diktaturo kaj ĝia efektivigo.

Post la forpaso de Marks kaj Engels, preskaŭ ĉiuj partioj de la Dua Internacio, krom la Bolŝevika Partio gvidata de Lenin, perfidis Marksismon. En la batalo kontraŭ reviziismo de la Dua Internacio, Lenin heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon. La fokuso de tiu batalo ĝuste kuŝis en la problemo de la proletara diktaturo. Forte kondamnante malnovajn reviziistojn, Lenin multfoje montris: “**Kiu agnoskas nur klasbatalon, tiu ankoraŭ ne estas marksisto**”, “**marksisto estas nur tiu, kiu etendas la agnoskon de la klasbatalo al agnosko de la proletara diktaturo.**” (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 25, pĝ. 399.)

Lenin gvidis la rusan proletaron batalakiri la venkon de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio kaj fondi la unuan socialisman ŝtaton. Surbaze de sia granda revolucia praktiko en gvidado de la proletara diktaturo, Lenin vidis la danĝeron de kapitalisma restaŭro kaj la longdaŭrecon de la klasbatalo: “**La transiro de kapitalismo al komunismo estas tuta historia epoko. Se nur ne finiĝis tiu epoko, ĉe la**

ekspluatantoj neeviteble restas la espero pri restaŭro, kaj tiu *espero* turniĝas en *provon de restaŭro*.” (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 28, pĝ. 235.)

Lenin montris: “La rezisto de la burĝaro fariĝas *dekoble* furioza pro ĝia renversiĝo (eĉ se nur en unu lando). Ĝia potenco kuŝas ne nur en la forto de internacia kapitalo, en la forto kaj fortikeco de ĝiaj internaciaj kunligoj, sed ankaŭ en la *forto de kutimo kaj la forto de etprodukto*. Ĉar, bedaŭrinde, en la mondo ankoraŭ restas tre kaj tre multe da etprodukto, kaj tiu etprodukto *naskas kapitalismon kaj la burĝaron konstante, ĉiutage, ĉiuhore, spontanee kaj grandnombre*.” Sekve Lenin faris la konkludon: “Pro ĉiuj ĉi tiuj kaŭzoj la proletara diktaturo estas *nepre necesa*.” (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 31, pĝ. 6.)

Lenin montris ankaŭ, ke “*nova burĝaro*” “*naskiĝas el niaj sovetaj oficistoj*”. (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 29, pĝ. 162.)

Lenin montris, ke la danĝero de restaŭro devenas ankaŭ de la sieĝo de kapitalismo: Imperiismaj landoj “*preterlasos neniun ŝancon por milita interveno, kiel ili esprimas, t. e., por strangoli la sovetan regpotencon*.” (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 31, pĝ. 423.)

La sovetunia reviziisma renegata kliko ĝisfunde perfidis tiujn brilajn instruojn de Lenin. De Ĥruŝĉov ĝis Breĵnev kaj similaj, ili ĉiuj estas potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de longe sinkaŝantaj en la Komunista Partio de Sovetunio. Tuj post sia sursceniĝo, ili turnis la “*esperon pri restaŭro*” de la burĝaro en “*provon de restaŭro*”, uzurpis la gvidon de la partio de Lenin kaj Stalin kaj “*pace evoluigis*” la unuan ŝtaton de la proletara diktaturo en la mondo en malluman, faŝisman ŝtaton de la burĝara diktaturo.

Prezidanto Maŭ kondukis pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata

kliko kiel la centro, heredis, defendis kaj disvolvis la marksism-leninisman teorion pri la proletara revolucio kaj proletara diktaturo. Prezidanto Maŭ ĉiuflanke resumis la historiajn spertojn pozitivan kaj negativan de la proletara diktaturo kaj, por preventi kapitalisman restaŭron, elmetis la teorion pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo.

Tiel frue kiel en marto de 1949, t. e., en la antaŭvespero de la turniĝo de la ĉina revolucio de la nov-demokratia revolucio al la socialisma revolucio, Prezidanto Maŭ klare montris en la raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio: Post kiam la proletaro deprenis la regpotencon en la tuta lando, la ĉefa kontraŭdiro enlande estas “*kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la burĝaro*”. La centro de la batalo restas ankoraŭ la problemo pri regpotenco. Prezidanto Maŭ aparte nin atentigis: “*Post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn. Se ni ne tiel elmetas kaj ekkonas la problemon nun, ni faros grandegan eraron*.” Prezidanto Maŭ antaŭvidis la longdaŭrecon kaj komplikecon de la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro post starigo de la proletara diktaturo, kaj elmetis al la tuta partio batalajn taskojn lukti kontraŭ imperiismo, Kuomintango kaj la burĝaro en la sferoj de politiko, ideologio, ekonomio, kulturo kaj eksterlandaj aferoj.

Laŭ la rezolucio de la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio kaj la ĝenerala linio de la Partio por la transira periodo formulita de Prezidanto Maŭ, nia partio faris intensan batalon. En la jaro 1956, jam estis fundamente plenumita la socialisma transformo de agrikulturo, metia industrio kaj kapitalismaj industrio kaj komerco koncerne posedsistemon de produktaj rimedoj. Tiam estis ŝlosila momento por decidi, ĉu la socialis-

ma revolucio povos daŭre antaŭenmarŝi. Konsiderante la furiozecon de reviziismo en la internacia komunisma movado kaj la novan direktiĝon de la klasbatalo de nia lando, Prezidanto Maŭ atentigis la tutan partion en sia granda verko *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*: **“En nia lando, kvankam socialisma transformo estas fundamente plenumita koncerne posedsistemon”, “tamen la post-restaĵoj de la renversitaj bienula kaj kompradora klasoj ankoraŭ ekzistas, la burĝaro ankoraŭ ekzistas kaj la remuldo de la etburĝaro nur ĵus komenciĝis.”** Kontraŭ la absurdaĵo elmetita de Liu Ŝaŭki en 1956, ke “en nia lando nun jam estas solvita la problemo kiu venkas kiun inter socialismo kaj kapitalismo”, Prezidanto Maŭ precipe montris: **“La problemo kiu venkos kaj kiu malvenkos inter socialismo kaj kapitalismo ankoraŭ ne estas vere solvita.”** **“La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj.”** En la teorio kaj praktikado de la internacia komunisma movado, la unuan fojon estis klare montrita tio, ke post la fundamenta plenumo de la socialisma transformo koncerne posedsistemon de produktaj rimedoj ankoraŭ ekzistas klasoj kaj klasbatalo, kaj la proletaro ankoraŭ devas daŭrigi la revolucion.

Laŭ tiu ĉi direkto montrita de Prezidanto Maŭ, la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel la estro gvidis la vastajn amasojn daŭre konduki la grandan batalon. De la batalo kontraŭ burĝaraj dekstruloj en 1957 ĝis la batalo malkovri la kontraŭpartian klikon de Peng Dehuaj ĉe Luŝan-kunveno en 1959, de la granda debato pri la ĝenerala linio de la Partio rilate la socialisman konstruadon ĝis la batalo inter la du linioj en la movado de socialisma edukado, la centro de la bataloj estis la problemo, ĉu iri la socialisman vojon aŭ la kapitalisman vojon, ĉu persisti en la

proletara diktaturo aŭ restaŭri la burĝaran diktaturon.

Ĉiu venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la venko de ĉiu grava kampanjo lanĉita de nia partio por oponi la burĝaron estis gajnita post frakaso de la reviziisma linio dekstra aŭ forme “maldekstra” sed esence dekstra kies reprezentanto estas Liu Ŝaŭki.

Nun jam pruviĝis post enketado, ke, antaŭ longe, dum la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito, Liu Ŝaŭki jam perfidis la revolucion kaj kapitulacis al la malamikoj, servante kiel ilia agento kaj la laborist-perfidulo interne de ni, ke li estas krimplena lakeo de imperiismo, moderna reviziismo kaj la kuomintang-a reakciularo, kaj ke li estas la ĝenerala reprezentanto de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Li fabrikis politikan linion intenci restaŭri kapitalismon en Ĉinio kaj turni ĝin en kolonion de imperiismo kaj reviziismo. Li ellaboris ankaŭ organizan linion servantan al lia kontraŭrevolucia politika linio. De multaj jaroj Liu Ŝaŭki varbis kaj kolektis nombron da renegatoj, spionoj kaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Kaŝante sian kontraŭrevolucion politikan karieron, ili ŝirmis unu alian kaj koluziis en konspiro, uzurpis gravajn oficojn de la Partio kaj ŝtato, superregis la gvidantecon de multaj centraj kaj lokaj unuoj, kunknedis subteran burĝaran komandejon, kaj tiel kontraŭstaris la proletaran komandejon kun Prezidanto Maŭ kiel la estro. Kunagante en koluzio kun imperiismo, moderna reviziismo kaj la kuomintang-a reakciularo, ili ludis subfosan rolon kiun usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj ne povas ludi.

En la jaro 1939, kiam prospere disvolviĝis la Kontraŭjapana Naci-liberiga Milito gvidata de Prezidanto Maŭ, Liu Ŝaŭki elĵetis sian venenan libron *Memkulturo*. La esenca elemento de tiu ĉi libro estas perfidi la proletaran diktaturon. Ĝi faris nenian

mencion pri faligo de japana imperiismo, pri la problemoj kiel batali kontraŭ la kuomintang-a reakciularo kaj pri la fundamenta principo de Marksismo-Leninismo depreni regpotencon per armitaj fortoj. Ĝi tamen postulis, ke la kompartianoj sin okupu pri ideisma "memkulturo" forlasante la grandan revolucian praktikon. Tio fakte signifis, ke la kompartianoj "sin kulturu" en lakeojn surgenue kapitulacantajn al imperiismo kaj la kontraŭrevolucia diktaturo de la kuomintang-a reakciularo.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĝuste kiam usona imperiismo armis Ĉiang Kajŝek-ajn kontraŭrevoluciajn trupojn kaj la lastaj sin pretigis por fari grandskalan atakon kontraŭ la liberigitaj regionoj, Liu Ŝaŭki, konforme al la bezono de la Uson-Ĉiang-a reakciularo, elĵetis la kapitulacisman linion ke "Ĉinio eniris la novan stadion de paco kaj demokratio", kaj per tio oponis la ĝeneralan linion "senrezerve mobilizi la amasojn, pligrandigi la popolajn fortojn kaj, sub la gvido de nia partio, venki la agresantojn kaj konstrui novan Ĉinion" kaj la principon kontraŭ la atako de la Uson-Ĉiang-a reakciularo "Oponi ĝin pinton kontraŭ pinto, batali pro ĉiu colo da tero", elmetitajn de Prezidanto Maŭ. Distrumpetante ke "nun la ĉefa formo de la batalo de la ĉina revolucio jam turniĝis de armita batalo en nearmitan, amasan parlamentan batalon", Liu Ŝaŭki postulis nuligi la gvidon de la Partio super la popola armeo, "unuigi" la Okavojan Armeon kaj la Novan Kvaran Armeon — la originan formon de la Popola Liberiga Armeo — en "nacian armeon" de Ĉiang Kajŝek, kaj demobilizi grandnombre la proprajn armeanojn de la popolo gvidatajn de la Partio, kun la vana intenco radike nuligi la popolan armeon, entombigi la ĉinan revolucion kaj tiel flate dediĉi al Kuomintango per la du manoj la venkajn fruktojn gajnitajn de la ĉina popolo je kosto de sango.

En aprilo de 1949, je la antaŭvespero

de la venko de la nov-demokratia revolucio tra la tuta Ĉinio, kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo estis preta transiri Jangzriveron, Liu Ŝaŭki rapidis al urbo Tiangin kaj senrezerve sin ĵetis en la sinon de kapitalistoj. Freneze opoziciante kontraŭ la principo de utiligo, limigo kaj transformo de privata kapitalisma industrio, difinita de la rezolucio de la ĵus finita Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio, li plenenergie distrumpetis, ke "hodiaŭ en Ĉinio kapitalismo estas ankoraŭ en sia juneco" kaj devas senlime kaj "multe disvolviĝi", ke "hodiaŭ la kapitalisma ekspluato ne estas krimo, sed merito", cinike prilaudis la burĝaron dirante, ke "ju pli multiĝas la ekspluato, des pli grandiĝas la merito" kaj per la tuta forto li rekomendis la reviziisman teorion pri produkta forto, kun la vana intenco konduki Ĉinion al la kapitalisma vojo.

Unuvorte, ĉe multaj gravaj historiaj momentoj en la nov-demokratia revolucio kaj la socialisma revolucio, Liu Ŝaŭki kaj lia bando febre oponis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj faris kontraŭrevoluciajn intrigajn subfosadojn. Tamen, ĉar ili estas kontraŭrevoluciuloj, do ilia intrigo ne povas ne malkaŝiĝi. Post la sursceniĝo de Ĥruŝĉov, precipe en la tempo kiam sovetunia reviziismo, en koluzio kun usona imperiismo kaj reakciuloj de Hindio kaj aliaj landoj, disvolvis grandskalajn kontraŭĉiniajn aktivadojn, ili fariĝis ankoraŭ pli furiozaj.

Prezidanto Maŭ plej frue rimarkis la danĝeron de la kontraŭrevolucia intrigo de Liu Ŝaŭki kaj lia bando. En la Labora Konferenco de la Centra Komitato de la Partio en januaro, 1962, Prezidanto Maŭ elmetis la problemon sin gardi kontraŭ la naskiĝo de reviziismo. Ĉe la Bejdajhe-a Labora Konferenco de la Centra Komitato de la Partio kaj la Dekaj Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio kunvokitaj respektive en aŭgusto kaj septembro,


1962, Prezidanto Maŭ pli sisteme elmetis la fundamentan linion de nia partio en la tuta historia periodo de socialismo. Prezidanto Maŭ montris: **“La socialisma socio estas sufiĉe longa historia periodo. En la socialisma historia periodo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo kaj ekzistas danĝero de restaŭro de kapitalismo. Oni devas koni la longdaŭrecon kaj komplikecon de tiu ĉi batalo. Oni devas altigi sian singardemon. Devas esti disvolvita la socialisma edukado. Oni devas ĝuste koni kaj trakti la problemon de klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, korekte distingi la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj disde tiuj interne de la popolo kaj ĝuste trakti ilin ambaŭ. Alie, socialisma lando kia la nia iros al la malo kaj degeneros, kaj aperos en ĝi restaŭro. Ekde nun tiun problemon ni devas menciĝi ĉiujare, ĉiumonate kaj ĉiutage, por ke ni havu pli sobran konon pri ĝi kaj havu marksism-leninisman linion.”** Tiu ĉi marksism-leninisma linio elmetita de Prezidanto Maŭ estas la vivlinio de nia partio.

Tuj poste, en majo de 1963, Prezidanto Maŭ prezidis la ellaboron de la *Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri Kelkaj Problemoj en la Nuna Kampara Laboro (projekto)* (t. e., *Dek Punktoj*), kiu difinis la linion, principon kaj politikojn de la Partio en la movado de socialisma edukado. Prezidanto Maŭ refoje faris averton al la tuta partio: Se ni forgesas klasojn kaj klasbatalon, forgesas la proletaran diktaturon, **“do antaŭ ol pasos nelonga tempo, eble nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksimume, kelkaj jardekoj, neeviteble okazos kontraŭrevolucia restaŭro tra la tuta lando, la marksism-leninisma partio sendube fariĝos reviziisma partio, fasiŝma partio, kaj la tuta Ĉinio ŝanĝos sian koloron. Imagu, kamaradoj, kia danĝera bildo tio estas!”** Prezidanto Maŭ jam elmontris pli klare la danĝerecon de kapitalisma restaŭro antaŭ la tuta partio

kaj la tutlanda popolo!

Ĉiuj ĉi tiuj avertoj kaj bataloj ne ŝanĝis kaj ne povis ŝanĝi eĉ iom da reakcia klasa naturo de Liu Ŝaŭki kaj lia bando. En 1964, en la granda movado de socialisma edukado, Liu Ŝaŭki elsaltis, subpreminte la amasojn, protektinte la potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, kaj malkaŝe atakis la marksisman sciencan metodon rekomenditan de Prezidanto Maŭ fari enketon kaj esploron pri la socia stato, bruaĉante ke ĝi jam “arkaikiĝis”. Li babilaĉis, ke tiu, kiu rifuzis plenumi la linion de Liu Ŝaŭki, “perdos kvalifikon por esti gvidanto”. Liu Ŝaŭki kaj lia bando malpacience deziris restaŭri kapitalismon. Je la fino de 1964, Prezidanto Maŭ kunvokis Laboran Konferencon de la Centra Komitato de la Partio, prezidis la ellaboron de *Kelkaj Problemoj Nun Leviĝintaj en la Movado de Socialisma Edukado en la Kamparo* (t. e., *Dudek Tri Punktoj*), forte kondamnis la burĝaran reakcian linion forme “maldekstran” sed esence dekstran de Liu Ŝaŭki, kritikis kaj refutis liajn mitajn absurdaĵojn kiaj “interkruciĝo de la kontraŭdiroj en- kaj ekster-partiaj”, “kontraŭdiro inter la kvar purecoj kaj la kvar nepurecoj”, kaj unuafoje eksplicite elmetis, ke **“la gravita punkto de ĉifoja movado estas batalo kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon”**. Tiu nova konkludo de Prezidanto Maŭ farita post sia resumado de la historia sperto de la enlanda kaj internacia proletara diktaturo, reĝustigis la navigdirekton de la movado de socialisma edukado, kaj klare montris la direkton por la baldaŭ venonta Granda Proletara Kultura Revolucio.

Retrorigardante la historion en ĉi tiu periodo, ni povas vidi, ke la nuna Granda Proletara Kultura Revolucio, en kiu partoprenas centmilionoj nombraj revoluciaj amasoj, absolute ne estas hazarda okazaĵo. Ĝi estas nepra rezulto de la longdaŭra kaj akra batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj en la socialisma socio. Ĝi



estas “granda politika revolucio de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj, estas daŭrigo de la longdaŭra batalado inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj vastaj revoluciaj popolamasoj en unu flanko kaj la kuomintanga reakciularo en la alia flanko, estas daŭrigo de la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro.” La heroaj proletaro, malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj, la Popola Liberiga Armeo, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de Ĉinio, kiuj decidis fidele sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ iri la socialisman vojon, jam ne povis toleri la restaŭrajn aktivadojn de Liu Ŝaŭki kaj lia bando. Jam neevitebla estis la granda klasa lukto.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris en sia parolado je februaro, 1967: “En la pasinteco ni faris batalojn en la kamparo, fabrikoj kaj kulturaj rondoj, kaj kondukis la movadon de socialisma edukado. Tamen la problemo ne povis esti solvita, ĉar ni ne sukcesis trovi iun formon kaj iun rimedon por malkaŝe, ĉiufanke kaj desube mobilizi la vastajn amasojn al malkovro de nia mal-luma flanko.” Nun tian formon ni trovis,

ĝi ja estas la Granda Proletara Kultura Revolucio. Nur mobilizante la centmilione nombrajn amasojn kaj plene uzante la formojn de dazibaŭ-oj kaj grandaj debatoj por plejeble eldirigi ĉiujn opiniojn, oni povas senmaskigi la renegatojn, spionojn kaj potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon kiuj enŝteliĝis en la Partion, kaj frakasi ilian intrigon restaŭri kapitalismon. La vera vizaĝo de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kiel historia kontraŭrevoluciulo estis klare ekzamenita ĝuste sub kondiĉo de partopreno de la vastaj amasoj. La Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio decidis senigi Liu Ŝaŭki je ĉiuj oficoj en- kaj ekster-partiaj kaj por ĉiam forpeli lin el la Partio. Tio estas granda triumfo de la centmilione nombraj popolamasoj. Tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de nia granda instruanto Prezidanto Maŭ laŭ la doktrino de daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, vere estas centpocente “tute necesa kaj tre ĝustatempa”. Tio estas granda nova kontribuo al la teorio kaj praktiko de Marksismo-Leninismo.

II. PRI LA PROCEZO DE LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

La nuna Granda Proletara Kultura Revolucio estas granda politika revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ sub la kondiĉo de la proletara diktaturo, estas granda revolucio en la kampo de superstrukturo. Nia celo estas frakasi reviziismon, repreni la parton de potenco uzurpitan de la burĝaro, efektiviĝi plenampleksan proletaran diktaturon en superstrukturo inkluzive de ĉiuj kulturaj sferoj, firmigi kaj fortigi la ekonomian bazon de socialismo kaj garantii, ke nia lando daŭre antaŭenmarŝos grandpaŝe laŭ la vojo de socialismo.

En 1962, en la Dekda Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, Prezidanto Maŭ montris: “Por renversi regpotencon estas ĉiam necese, antaŭ ĉio, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso, kaj tiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso.” La vortoj de Prezidanto Maŭ trafis la vivgravan lokon de la kontraŭrevolucia reviziisma klinko de Liu Ŝaŭki. Ili tiel energie sin okupis pri ideologio kaj superstrukturo, praktikis frenezan kontraŭrevolucion diktaturon super la proletaro en diversaj de ili kontrolataj departementoj kaj senbride ellasis venenajn

herbojn ja kun la unika celo, nome prepari publikan opinion por renversi la proletaran diktaturon. Por faligi ilin en politiko, ni same devas, antaŭ ĉio, frakasi ilian kontraŭ-revolucian publikan opinion per la revolucia.

Prezidanto Maŭ ĉiam donas grandan atenton al la batalo en ideologio. Post la Liberigo de la tuta lando, li iniciatis kritikojn kontraŭ la filmo *La Vivo de Vu Hjun*, la kontraŭrevolucia kliko de Hu Feng, *Studo pri la Romano "Sonĝo de Ruĝa Buduaro"* k. a. Ĉifoje, ankoraŭ estas Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la tutan partion fari ofensivon kontraŭ la burĝara pozicio okupata de Liu Ŝaŭki kaj lia bando. Prezidanto Maŭ verkis la faman disertacion *De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?* kaj aliajn dokumentojn, kritikis la burĝaran ideismon kaj metafizikon de Liu Ŝaŭki, kritikis, ke la de li kontrolataj literaturaj kaj artaj departementoj **"eĉ ĝis nun ankoraŭ estas reĝataj de 'mortintoj' "**, ke la Ministerio de Kulturaj Aferoj **"se ankoraŭ restos sensanĝa, do alinomu sin kiel ministerion de imperiestroj, reĝoj, generaloj kaj ministroj, ministerion de intelektuloj kaj belulinoj aŭ ministerion de fremdlandaj mortintoj"**, kaj ke ankaŭ la Higiena Ministerio devus alinomiĝi per **"higiena ministerio de urbaj sinjoraj moŝtoj"**. Laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ, la proletaro faris revolucion unue en la sferoj de pekina opero, baledo kaj simfonia muziko, kiuj estis rigardataj de la bienularo kaj burĝaro kiel sanktaj kaj netuŝeblaj. Tio estas bajoneta lukto. Kvankam Liu Ŝaŭki kaj lia bando ĉiurimede rezistis kaj subfosis, tamen, la proletaro fine gajnis gravajn batalfruktojn post penega luktado. Aperis aro da brilaj revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj sur la scenejo finfine stariĝis heroaj figuroj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Post tio, Prezidanto Maŭ iniciatis la kritikon kontraŭ *Deoficigo de Haj Ĵuj* kaj aliaj grandaj venenaj herboj, kaj la lanĉpinto rekte direktiĝis al la nesto de la reviziisma kliko — la por neniu enirebla

hermetika "sendependa reĝlando" kontrolata de Liu Ŝaŭki, t. e., la malnova partia urba komitato de Pekino.

La *Cirkulero* de la 16-a de majo, 1966, ellaborita sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ, difinis la teorion, linion, principon kaj politikojn por tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio kaj fariĝis granda programo de la tuta movado. La *Cirkulero* ĝisfunde kritikis la "Februaran Skizon" eljetitan de la burĝara komandejo de Liu Ŝaŭki celantan subpremi tiun ĉi grandan revolucion kaj alvokis la tutan partion kaj la tutlandan popolon direkti la batalon kontraŭ la reprezentantajn personojn de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, kaj doni apartan atenton al malkaŝo de **"tiaj homoj kia Ĥruŝĉov"**, kiuj **"nun estas kuŝantaj apud ni"**. Tio estas granda mobiliza ordono al la popolo de la tuta lando por disvolvi grandan politikan revolucion. La Grupo de la Kultura Revolucio de la Centra Komitato de la Partio fondita laŭ la decido en la *Cirkulero* firme plenumis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

Sub la konduko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj revoluciaj amasoj sin ĵetis en la batalon. La Pekina Universitato skribis dazibaŭon respondantan la alvokon de la Centra Komitato de la Partio. La tutan landon tuj envolvis dazibaŭoj kritikantaj la reakcian ideologion de la burĝaro. Tuj poste ruĝgvardianoj leviĝis aron post aro kaj revoluciaj junuloj fariĝis kuraĝaj sturmantoj. La kliko de Liu Ŝaŭki dronis en konfuziĝo, haste eljetis la burĝaran reakcian linion kaj kruele subpremis la revolucion movadon de junaj lernantoj. Tamen ili ne sukcesis gajni por si kelkan tempon por vivi la lastajn tagojn. Prezidanto Maŭ kunvokis kaj prezidis la Dekunuan Plenon Sesion de la Oka Centra Komitato de la Partio. La Plena Sesio akceptis la programan dokumenton *Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proletara Kultura Revolucio* (t. e. *Dekses Punk-*

toj). Prezidanto Maŭ publikigis sian dazi-
baŭon *Bombardu la Komandejon* kaj per tio
malkovris la burĝaran komandejon de Liu
Ŝaŭki. En sia letero al la ruĝgvardianoj
Prezidanto Maŭ montris: La revoluciaj
agoj de ruĝgvardianoj **“montras la indignon
kaj kondamnon kontraŭ la bienula klaso,
burĝaro, imperiismo, reviziismo kaj iliaj la-
keoj, kiuj ekspluatas kaj subpremas la la-
boristojn, kamparanojn, revoluciajn intelek-
tulojn kaj revoluciajn partiojn, kaj montras ke
pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj. Mi
esprimas varman subtenon al vi”**. Poste,
Prezidanto Maŭ ok fojojn akceptis sur Tian-
anmen-pordego en la ĉefurbo 13 milionojn
da ruĝgvardianoj kaj aliaj revoluciaj popola-
noj venintaj de diversaj lokoj de la lando.
Tio ardigis la revolucionan batalvolon de la
tutlanda popolo. La revoluciaj movadoj de
laboristoj, kamparanoj kaj oficejaj revoluciaj
kadroj rapide disvolviĝis. Dazibaŭoj pli
kaj pli multiĝis kaj tre similis al fajrego
bruliganta stepon kaj al salvo de dekmil
kanonoj. La slogano **“pravas ribelo kon-
traŭ la reakciuloj”** tondris tra la tuta lando.
Ŝtormo disvolviĝis la batalo de centmiliono
nombraj amasoj bombardi la burĝaran ko-
mandejon de Liu Ŝaŭki.

Neniu reakcia klaso descendas memvole
de sur la scenejo de la historio. Kiam la
revolucio tuŝis la parton de potenco uzurpitan
de la burĝaro, la klasbatalo fariĝis pli akra.
Post kiam Liu Ŝaŭki falis, la reviziisma kliko
de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en diversaj
lokoj senĉese ŝanĝis artifikojn, elĵetis forme
“maldekstrajn” sed esence dekstrajn slo-
ganojn kiaj “ĉion dubu” kaj “ĉion faligu”,
intencante daŭre bati grandan parton por
protekti sian plenmanon. Ili ankaŭ faris
splitigon inter revoluciaj amasoj, manipulis
kaj trompis parton da amasoj por protekti
sin mem. Kiam la proletaraj revoluciuloj
frakasis ĉi tiujn intrigojn, ili faris alian
furiozan reatakon, nome la kontraŭfluron
aperintan en la tempo de vintro de 1966
ĝis printempo de 1967.

La lanĉpinto de ĉi tiu kontraŭfluro direk-

tigis al la proletara komandejo estrata de
Prezidanto Maŭ. Ĝia ĝenerala programo
estas nur: Nei la rezoluciojn akceptitajn de
la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra
Komitato de la Partio, renversi verdikton
por la jam faligita burĝara komandejo
estrata de Liu Ŝaŭki, renversi verdikton por
la burĝara reakcia linio jam ĝisfunde kriti-
kita de la vastaj amasoj kaj fari subpremon
kaj venĝon al la revolucia amasa movado.
Sed ĉi tiu kontraŭfluro ricevis seriozan kri-
tikon de Prezidanto Maŭ kaj bojkoton de
la vastaj revoluciaj amasoj kaj fine ne suk-
cesis bari la ĉefan fluon de la revolucia
amasa movado ruliĝi antaŭen.

La kelkaj zigzagoj kaj ripetadoj en la
revolucia movado ebligis al la vastaj amasoj
pli profunde kompreni la gravecon de reg-
potenco: La ĉefa kialo de tio ke Liu Ŝaŭki
kaj lia bando povis fari malbonojn estas tio,
ke ili uzurpis la potencon de la proletaro en
multaj unuoj kaj lokoj; la ĉefa kialo de tio ke
la revoluciaj amasoj estis premataj estas tio,
ke tie la potenco ne estis tenata en la manoj
de la proletaro. En iuj unuoj, la posed-
sistemo forme estis socialisma, sed fakte la
gvidanteco estis uzurpita de plenmano da
renegatoj, spionoj kaj potenctenantoj irantaj
la kapitalisman vojon aŭ restis ankoraŭ en
la manoj de antaŭaj kapitalistoj. Precipe
kiam la potenctenantoj irantaj la kapitalis-
man vojon ekblovis la kriman herezan ven-
ton de kontraŭrevolucia ekonomiismo post
la fiasko de sia intrigo premi la revolucion
sub la preteksto “stimuli produkton”, la
vastaj amasoj plie komprenis: Nur post
kiam oni reprenos la perditan potencon, oni
povos radikale venki la potenctenantojn
irantajn la kapitalisman vojon. Sub la
gvido kaj subteno de Prezidanto Maŭ kaj
la de li estrata proletara komandejo, la ŝan-
haja laborista klaso kiu havas revolucionan
tradicion, brave elpaŝis, unuiĝis kun la
vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj ka-
droj kaj deprenis en januaro de 1967 desube
la potencon uzurpitan de la potenctenantoj
irantaj la kapitalisman vojon de la malnova

urba komitato de la Partio kaj la malnova urba popola komitato.

Prezidanto Maŭ ĝustatempe resumis la sperton de ŝtormo de la januara revolucio en Ŝanhajo kaj faris alvokon al la tuta lando: **“Proletaraj revoluciuloj, unuiĝu kaj deprenu la potencon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon!”** Poste, Prezidanto Maŭ faris plie la instrukcion **“La Popola Liberiga Armeo devas subteni la vastajn amasojn de maldekstruloj”**. Prezidanto Maŭ daŭre resumis la sperton de Hejlonggiang kaj aliaj provincoj kaj urboj kaj difinis la principon kaj politikon por la fondiĝo de revolucia komitato kun revolucia triflanka kombiniĝo en kiu partoprenas reprezentantoj de revoluciaj kadroj, la Popola Liberiga Armeo kaj revoluciaj amasoj, kaj per tio antaŭen puŝis batalon de depreno de la potenco en la tuta lando.

La batalo inter la proletaro kaj burĝaro por preni kaj kontraŭpreni la potencon estas vivmorta batalo. En la tempo de unu jaro plus naŭ monatoj ekde ŝtormo de la januara revolucio de Ŝanhajo en 1967 ĝis la fondiĝo de la revoluciaj komitatoj de Tibeto kaj Hingiang en septembro de 1968 kondukigis ripetada provo de politikaj fortoj inter la du klasoj kaj inter la du linioj, disvolviĝis intensa batalo inter la proletara ideologio kaj neproletara ideologio, kaj aperis tre komplika situacio. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris: **“En la pasinteco ni faris militojn sude kaj norde, kiuj estis facile kondukeblaj, ĉar la malamikoj estis klare videblaj. La nuna Granda Proletara Kultura Revolucio estas multe pli malfacile kondukebla ol tiaj militoj.”** **“La problemoj ja kuŝas en tio, ke tiuj kiuj faris ideologiajn**

erarojn miksiĝas kun tiuj kies kontraŭdiro kun ni estas kontraŭdiro inter ni kaj la malamikoj, kaj portempe estas malfacile ilin distingi.” Tamen dank’ al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, ni venkis fine tian malfacilon. Somere de 1967 Prezidanto Maŭ inspektis regionojn sude kaj norde de Jangzrivero, faris ekstreme gravajn instrukciojn, gvidis la vastajn revoluciajn amasojn iom post iom distingi kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj disde tiuj interne de la popolo kaj plie efektiviĝis revolucian grandan unuigon kaj revolucian triflankan kombiniĝon, kaj kondukis la etburĝaran ideologion sur la relojn de la proletara revolucio, tiel ke la procezo de la batalo fariĝis procezo, en kiu la malamikoj dronis en ĥaoso dum la vastaj amasoj ricevis hardon.

La plenmano da perfiduloj, spionoj, ne bone remulditaj bienuloj, kulakoj kontraŭ-revoluciuloj, malbonuloj kaj dekstruloj, agantaj kontraŭ-revoluciuloj, burĝaraj karieristoj kaj duvizaĝuloj, sinkaŝantaj en la amasoj, ne malkovriĝas, se ne estas konvena vetero. Someron de 1967 kaj printempon de 1968, ili ree ekblovis de dekstra kaj ekstreme **“maldekstra”** flankoj reakcian herezan venton de verdiktorenverso. Ili direktis sian lancpinton al la proletara komandejo estrata de Prezidanto Maŭ, al la Popola Liberiga Armeo kaj al la novnaskiĝinta revolucia komitato, kaj samtempe ili instigis la amasojn al interbatalo kaj organizis kontraŭ-revoluciajn intrigajn klikojn intencante kontraŭpreni la potencon de la proletaro. Tamen, tiu ĉi plenmano da fiuloj ankaŭ estis malkaŝita kiel ilia ĉefo Liu Ŝaŭki. Tio estas granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

III. PRI SERIOZA KAJ BONA KONDUKO DE BATALO, KRITIKO KAJ REFORMO

En tiu ĉi granda revolucio de la kampo de superstrukturo, same kiel en ĉiuj aliaj revolucioj, la fundamenta problemoj estas

problemo de regpotenco, problemoj kiu klaso tenas la gvidantecon en siaj manoj. La fondiĝo de revoluciaj komitatoj en

ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj (escepte de Tajvan-provinco) de la tuta lando signas, ke tiu ĉi revolucio jam akiris grandan, decidan venkon. Sed, la revolucio ankoraŭ ne finiĝis. La proletaro devas daŭre marŝi antaŭen, **“serioze kaj bone konduki batalon, kritikon kaj reformon”** kaj fari ĝisfine la socialisman revolucion en la kampo de superstrukturo.

Prezidanto Maŭ montris: **“La batalo, kritiko kaj reformo en fabriko ĝenerale trapasas jenajn etapojn: fondo de revolucia komitato de triflanka kombiniĝo, amasa kritiko, purigo de la klasaj vicoj, ordigo de la partiaj organizoj, elitigo kaj simpligo de la organiza strukturo, reformo de neraciaj reguloj kaj sistemoj kaj sendo de personoj laborantaj en oficejoj al bazaj unuoj.”** Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ni devas profunde, zorgeme, solide kaj racie plenumi tiujn ĉi taskojn en ĉiu fabriko, ĉiu lernejo, ĉiu popolkomunumo kaj ĉiu unuo.

El siaj sennombraj laboroj, la revolucia komitato nepre devas firme teni la plej fundamentan — meti vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso super ĉiujn laborojn kaj komandi ĉion per Maŭzedongpenso. De dekoj da jaroj la penso de Prezidanto Maŭ ĉiam montras la revolucion direktan al la tuta partio kaj la popolo de la tuta lando. Sed, pro blokado de instrukcioj de Prezidanto Maŭ fare de Liu Ŝaŭki kaj lia bando da kontraŭrevoluciaj reviziistoj, la vastaj revoluciaj amasoj malfacile povis rekte aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ. La ŝtormo de tiu ĉi granda revolucio detruis tiujn grandajn kaj malgrandajn palacojn de inferestroj kaj rekte konigis la penson de Prezidanto Maŭ al vastaj revoluciaj amasoj. Tio estas granda venko. Tiel vasta popularigo de Maŭzedongpenso en la granda lando kun septcent milionoj da loĝantoj estas la plej granda rikolto de tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, centmilionoj da popolanoj ĉiam kunportas kun si la libreton

Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj serioze studas kaj aplikas ĝin; kaj ili ekagas por propagandi kaj efektivigi plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ tuj post ilia publikigo. Tia plej trezora stilo nepre devas esti firmigata kaj persiste praktikata. Ni devas profunde disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, daŭre kaj bone funkciigi diversspecajn kursojn de Maŭzedongpenso kaj vere fari nian tutan landon la granda lernejo de Maŭzedongpenso laŭ la **“instrukcio de la 7-a de majo”** farita de Prezidanto Maŭ en la jaro 1966.

Ĉiuj revoluciaj kamaradoj nepre devas vidi kun sobra kapo: Absolute ne ĉesos la klasbatalo en la kampo de ideologio kaj politiko. Nia kapto de la regpotenco absolute ne signifas malaperon de la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro. Ni nepre devas daŭre alte teni la standardon de la amasa revolucia kritiko, per Maŭzedongpenso kritiki la burĝaron, reviziismon, diversspecajn dekstrajn kaj ekstreme **“maldekstrajn”** erarajn pensojn kontraŭajn al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kritiki burĝaran individuismon kaj la teorion de **“multaj centroj”**, t. e. tiun de **“sencentreco”**. Ni devas daŭre kritiki kaj senkreditigi la serion da absurdaĵoj kiaj kompradora sklavenco antaŭ fremduloj kaj rampismo, praktikitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-pefidulo Liu Ŝaŭki, kaj firme starigi la penson de Prezidanto Maŭ pri **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”** inter vastaj amasoj de kadroj kaj popolanoj, por garantii, ke nia afero daŭre marŝos antaŭen laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ montris: **“La revolucia komitato devas praktiki unuigitan gvidon, aboli la multtavolan strukturon de administraj organizoj, elitigi trupojn kaj simpligi administradon por formi revoluciecan gvidan grupon, kiu ligiĝas kun la amaso.”** Tio estas fundamenta principo por pli bone servigi la superstrukturon al la socialisma

ekonomia bazo. Multtavola strukturo de administraj organizoj apartiĝantaj de la amasoj, skolastiko premanta kaj katenanta la revolucian aktivecon de amasoj kaj la stilo de la bienularo kaj burĝaro por ĉasi luksan aranĝon kaj formon, ĉio ĉi tio detruas la socialisman ekonomian bazon kaj utilas al kapitalismo sed ne al socialismo. La diversnivelaĵoj de la ŝtata potenco kaj aliaj organizoj devas, laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, kompakte ligiĝi kun amasoj, antaŭ ĉio, kompakte ligiĝi kun la bazaj amasoj — la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉiuj novaj kaj malnovaj kadroj devas konstante forigi polvon de burokratismo kaj ne devas esti infektitaj de malbona kutimo de “sinjoraj moŝtoj”. Ili devas persisti ĉe ŝparemo en konduko de revolucio, diligente kaj ŝpareme mastrumi ĉiujn socialismajn entreprenojn, oponi luksemon kaj malŝparemon kaj esti singardemaj kontraŭ la atako de la burĝaro per sukertegitaj obusoj. La kadroj devas persisti en sistemo de partopreno en kolektiva produkta laboro kaj zorgi pri la vivo de popolamasoj. Ili devas observi la instruon de Prezidanto Maŭ, persone fari enketadon kaj esploradon, sekci unu aŭ kelkajn paserojn kaj senĉese resumi sperton. Ili devas ofte disvolvi kritikon kaj memkritikon, **“kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon”** laŭ la kvin kriterioj por fariĝi revoluciaj daŭrigantoj, elmetitaj de Prezidanto Maŭ, kaj serioze remuldi sian mondkoncepton.

La Popola Liberiga Armeo estas la forta apogilo de la proletara diktaturo. Prezidanto Maŭ multfoje montris: Laŭ la vidpunkto de Marksismo, la ĉefa elemento de la ŝtato estas armeo. La Ĉina Popola Liberiga Armeo fondita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ estas armeo el gefiloj de la laboristoj kaj kamparanoj kaj armeo de la proletaro. Ĝi kreis grandajn historiajn meritojn en la batalo por renversi la tri grandajn montojn de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapita-

lismo kaj en la bataloj por defendi sian patrolandon, helpi Koreion kontraŭ usona imperiismo kaj frakasi la agresojn de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, granda nombro da komandantoj kaj batalantoj partoprenis en la subtenado de industrio, agrikulturo kaj vastaj amasoj de maldekstruloj kaj en milita kontrolo kaj milita kaj politika trejnado; la armeaj reprezentantoj partoprenis en la triflanka kombiniĝo; ili spertis hardon en la klasbatalo, kompaktigis sian ligiĝon kun amasoj kaj per tio akcelis la ideologian revoluciigon de la armeo kaj kreis novajn meritojn por la popolo. Tio estas ankaŭ la plej bona militpreparo. Ni devas disvolvi la gloran tradicion **“subteni la registaron kaj ami la popolon”** kaj **“subteni la armeon kaj ami la popolon”**, plifortigi la unuiĝon inter la armeo kaj la popolo kaj la konstruadon de milico kaj nacidefendo kaj pli bone fari ĉiujn laborojn. De tri jaroj, renegatoj, spionoj, ĝismorte pentorifuzantaj potentenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj kontraŭrevoluciuloj intencis detrui tiun ĉi grandan popolan armeon de ni, sed ne sukcesis. La kaŭzo kuŝas ĝuste en tio, ke la popolo subtenas la armeon kaj la armeo protektas la popolon.

La departementoj de kulturo, arto, eduko, ĵurnalismo kaj higieno okupas ekstreme gravan lokon en la kampo de superstrukturo. La Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio jam decidis la linion **“Ni devas tutkore nin apogi sur la laborista klaso”**. Ĉifoje sub la alvoko de Prezidanto Maŭ **“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”**, la laborista klaso, la ĉefa forto de la proletara revolucio, kaj ĝia solida alianco, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, suriris la politikan scenejon de batalo, kritiko kaj reformo de superstrukturo. Ekde la 27-a de julio, 1968, la laborista klaso grandamase marŝis en la areojn longe regatajn de tiuj potentenantoj irantaj la kapitalisman vojon

kaj en la lokojn kie amasiĝas intelektuloj. Tio estas granda revolucia ago. Tio, ĉu la proletaro povas firme okupi tiujn poziciojn de kulturo kaj eduko kaj sukcese transformi ilin per Maŭzedongpenso, estas ŝlosila problemo koncerne al tio ĉu ni povas konduki ĝis la fino la Grandan Proletaran Kulturalan Revolucion. Prezidanto Maŭ donas tre grandan atenton al tiu ĉi laboro, persone trovas tipojn kaj per tio starigas por ni brilan

ekzemplon. Ni nepre devas venki la eraran tendencon ke iuj kamaradoj neglektas la ideologian, kulturalan kaj edukatan frontojn, strikte sekvi Prezidanton Maŭ kaj fari longdaŭran, penigan kaj zorgeman laboron. **“Samtempe la laborista klaso devas ankaŭ senĉese altigi sian politikan konscion en batalo”**, resumi la sperton en la gvidado de batalo, kritiko kaj reformo en superstrukturo kaj konduki ĝis venko la batalon sur tiu ĉi fronto.

IV. PRI LA POLITIKOJ DE LA GRANDA PROLETARA KULTURA REVOLUCIO

Por daŭrigi la revolucion en la kampo de superstrukturo, oni nepre devas serioze efektiviĝi ĉiujn proletarajn politikojn de Prezidanto Maŭ.

Frue en la *Cirkulero* de la 16-a de majo kaj en la *Dekses Punktoj* de aŭgusto, 1966, la politikoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio jam estis klare difinitaj. Kaj la serio da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, kiaj **“en la stadio de batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la politikoj devas esti serioze atentataj”** k. a., pli konkretigis la diversajn politikojn.

La ĉefa problemo en la nuna tempo estas perfekta efektivigo de ili.

La ĝenerala temo de la diversaj politikoj de la Partio inkluzive de politiko pri intelektuloj, politiko pri kadroj, politiko pri **“edukeblaj gefiloj”** (de tiuj, kiuj faris krimojn aŭ erarojn — *Trad.*), politiko pri amasaj organizoj, politiko pri batalo kontraŭ la malamiko, politiko pri ekonomio ktp. ja estas problemo ĝuste trakti la du specojn de kontraŭdiroj kun malsamaj naturoj, nome, la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj la kontraŭdiroj interne de la popolo.

El la intelektuloj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas aŭ volas sin kombini kun la laboristoj,

kampanoj kaj soldatoj. Ili devas esti **“reedukataj”** de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj sub la gvido de la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ, kaj devas esti kuraĝigataj tiuj, kiuj bone kombiniĝis kaj tiuj ruĝgvardianoj kaj intelektaj junuloj, kiuj aktive iris al montregionoj kaj kamparo.

Prezidanto Maŭ multfoje instruis al ni: **“Estas necese plivastigi la amplekson de edukado kaj redukti tiun de atakado”**, kaj estas necese **“praktiki la instruon de Marks — nur post la liberigo de la tuta homaro, la proletaro povos finfine liberigi sin mem”**. Rilate al tiuj kiuj faris erarojn, oni nepre devas emfaze atenti pri eduko kaj reeduko, fari paciencon kaj zorgeman ideologi-politikan laboron kaj vere **“praktiki la principon lerni el pasintaj eraroj por eviti la estontajn kaj kuraci la malsanon por savi la homon, por atingi la du celojn, nome, klarigi penson kaj unuigi kamaradojn”**. Koncerne al bonaj homoj, kiuj faris eraron iri la kapitalisman vojon, oni devas ĝustatempe **“liberigi”** ilin kaj doni al ili konvenan laboron kaj kuraĝigi ilin iri inter la laboristajn kaj kamparanajn amasojn por remuldi sian mondkoncepton, post kiam ili altigis sian politikan konscion kaj gajnis konfidon de la amasoj. Kaj al tiuj kiuj havas iom da progreso kaj komencis iom konsciigi, oni devas daŭre doni al ili helpon elirante de la vidpunkto

de unuiĝo. Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: **“La proletaro estas la plej granda klaso en la historio de la homaro. Ĝi estas la revolucia klaso plej potenca en ideologio, politiko kaj forto; ĝi povas kaj nepre devas unuigi la plejparton de homoj ĉirkaŭ sin mem, kaj maksimume izoli kaj ataki plenmanon da malamikoj.”**

En la batalo kontraŭ la malamikoj, oni nepre devas praktiki la politikon **“utiligi kontraŭdirojn, gajni plimulton, oponi malplimulton kaj frakasi ilin unu post alia”** por kio ĉiam pledas Prezidanto Maŭ. **“Atestoj, enketo kaj esploro devas esti atentataj, devas esti rigore malpermesate elpremi konfesojn devige kaj kredi al tiaj konfesoj.”** Oni devas praktiki la politikojn de Prezidanto Maŭ **“indulga trakto al krimkonfesinto kaj rigora puno al rezistanto”** kaj **“doni elirejon”**. Ni nin apogas ĉefe sur la vastaj popolamasoj en la praktikado de diktaturo super la malamikoj. Koncerne al la malkovritaj malbonuloj aŭ suspektinduloj en la movado de purigo de la klasa vicaro, ni devas apliki la politikon **“mortigi nenion kaj ne aresti plimulton”** al ĉiuj escepte de tiuj nerefuteble atestitaj agantaj kontraŭ-revoluciuloj, kiuj devas esti punitaj laŭ la leĝo pro hommortigo, bruligo, venenado k. a.

Al la burĝaraj reakciaj akademias aŭtoritatuloj oni devas ilin aŭ kritiki kaj observi, aŭ kritiki kaj utiligi, aŭ kritiki kaj provizi per necesa vivrimedo, unuvorte kritiki ilian penson kaj doni al ili elirejon. Trakti tiun ĉi parton de la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kiel la kontraŭdirojn interne de la popolo utilas al la firmigo de la proletara diktaturo kaj al dispartigo kaj demoralizo de la malamikoj.

En la efektivigo de ĉiuj politikoj de la Partio, oni devas konkrete studi kaj esplori la staton de sia propra unuo. En tiuj lokoj, kie la revolucia granda unuiĝo ankoraŭ ne sufiĉe firmiĝis, oni devas helpi vastajn revoluciajn amasojn efektivigi revolucion

grandan unuiĝon sub la revolucia principo kaj laŭ organizaj sistemoj, profesioj kaj lernejoj kaj klasoj, por ke ili unuiĝu kaj batalu kune kontraŭ la malamikoj. En tiuj unuoj, kiuj ankoraŭ ne komencis aŭ ĵus komencis la laboron de purigo de la klasa vicaro, oni devas firme kaj bone teni la laboron laŭ la politikoj de la Partio. En tiuj unuoj, kiuj jam fundamente plenumis la laboron de purigo de la klasa vicaro, oni devas senprokraste plenumi aliajn laborojn laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ koncerne al diversaj stadioj de batalo, kritiko kaj reformo. Kaj samtempe, oni devas streĉe atenti novan direktiĝon de la klasbatalo. Kion fari se malbonuloj ree senbridiĝas? Prezidanto Maŭ havas faman diron: **“Ĝisfundaj materiistoj nenion timas.”** Se la klasaj malamikoj denove levos herezajn venton kaj ondojn, ni simple mobilizu la amasojn refoje faligi ilin.

Ĝuste kiel elmontrite en la *Dekses Punktoj*: **“La Granda Proletara Kultura Revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando.”** La agrikultura produkto de nia lando akiris riĉrikoltojn dum la lastaj sinsekvaj jaroj, kaj la industria produkto kaj scienco kaj tekniko ankaŭ troviĝas en prospera situacio; senprecedence altiĝas la aktiveco de la vasta laboranta popolo en revolucio kaj produkto, multaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj kontinue renovigis siajn produktajn rekordojn kaj kreis plej altajn produkt-nivelejn en la historio. La teknika revolucio estas senĉese disvolviĝanta. La merkato estas prospera kaj la prezoj estas stabilaj. Je la fino de 1968, la enlandaj obligacioj jam estis tute amortizitaj. Kaj nia lando jam fariĝis socialisma lando libera de enlanda kaj eksterlanda ŝuldoj.

La principo **“teni la revolucion, stimuli la produkton”** estas tute ĝusta, kiu ĝuste ekpilkis la rilatojn inter revolucio kaj produkto, inter spirito kaj materio, inter superstrukturo kaj ekonomia bazo kaj inter produktaj rilatoj kaj produkta forto. Prezidanto Maŭ

Ĉiam instruas al ni: **“Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro.”** Lenin iam forte kondamnis tiujn oportunistojn, kiuj oponis studi problemojn laŭ la politika vidpunkto, per tiuj vortoj: **“Politiko ne povas ne havi antaŭecon super ekonomio. Rezoni alie signifas forgesi abocion de Marksismo.”** (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 32, pĝ. 72.) Lenin plue montris: Meti politikon sur la egalan lokon kun ekonomio ankaŭ signifas **“forgesi abocion de Marksismo.”** (el la sama loko.) Politiko estas koncentra manifestiĝo de ekonomio. Kiel do oni povus pluapaŝe firmigi la ekonomian bazon de socialismo kaj plie disvolvi la socialisman produktan forton, se oni ne kondukus revolucion en superstrukturo, ne mobilizus vastajn laboristajn kaj kamparanajn amasojn, ne kritikus kaj refutus la reviziisman linion, ne malkovrus plenmanon da renegatoj, spionoj, potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj kontraŭrevoluciuloj, kaj ne firmigus la gvidantecon de la proletaro? Tio ne signifas ke revolucio anstataŭu produkton, sed

signifas ke revolucio komandu, stimulu kaj konduku antaŭen produkton. Ni nepre devas fari enketon kaj esploron, aktive sed solide kaj dece solvi multajn problemojn de politikoj pri batalo, kritiko kaj reformo sur la ekonomia fronto, laŭ la ĝenerala linio de Prezidanto Maŭ **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, lia granda strategia penso **“sin prepari al milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, kaj lia serio da principoj kia **“preni agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron.”** Ni devas plene disvolvi la revolucion aktivecon kaj kreivon de la diversnaciaj popolamasoj, forte teni la revolucion kaj energie stimuli la produkton por plenumi kaj superplenumi la planon por disvolvi la nacian ekonomion. Estas certe, ke la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio certe daŭre akcelos la ekonomian fronton kaj nian tutan aferon de socialisma konstruado al nova impeto.

V. PRI LA FINA VENKO DE LA REVOLUCIO DE NIA LANDO

Ja vere granda estas la venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando. Tamen, ni neniel devas opinii, ke ni povas dormi trankvile sur dika kapkuseno. En sia parolado en oktobro, 1968, Prezidanto Maŭ montris: **“Ni jam akiris grandan venkon. Sed, la venkita klaso ankoraŭ faros barakton. Ankoraŭ ekzistas tiuj homoj kaj tiu klaso. Tial, ni ne devas diri pri la fina venko. Kaj ni ne devas tion diri eĉ en venontaj kelkdek jaroj. Ne perdu singardemon. Laŭ la vidpunkto de Leninismo, la fina venko de iu socialisma lando ne nur bezonas klopodon de la proletaro kaj vastaj popolamasoj de tiu lando, sed ankaŭ postulas la venkon de la monda revolucio kaj la eliminon de la sistemo de ekspluatado de homo al homo sur la tuta terglobo, tio estas, la emancipon de la tuta homaro. Tial, la**

facilanima aserto pri la fina venko de la revolucio de nia lando estas erara, kontraŭa al Leninismo kaj ankaŭ nekonforma al la fakto.” En klasbatalo ankoraŭ aperos ripetiĝoj. Ni nepre ne forgesu klasbatalon, nepre ne forgesu la proletaran diktaturon. Dum la procedo de perfekta efektivigo de politikoj, ankoraŭ ekzistas batalo inter la du linioj, kaj ekzistas malhelpoj venantaj de la “maldekstra” kaj dekstra flankoj. Por bone fari la supremenciitajn laborojn en diversaj stadioj de batalo, kritiko kaj reformo, ni ankoraŭ devas pagi multajn penojn. Ni devas strikte sekvi Prezidanton Maŭ kaj kompakte nin apogi sur la vastaj revoluciaj amasoj, venki la malfacilojn kaj zigzagojn sur la antaŭenmarŝa vojo por akiri pli grandan venkon de la socialisma afero.

VI. PRI LA ORDIGO KAJ KONSTRUO DE LA PARTIO

La venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio liveris al ni valoran sperton kiel fari konstruadon de la Partio sub la kondiĉo de la proletara diktaturo. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris al la tuta Partio: **“La partiaj organizoj devas konsisti el la progresemaĵoj elementoj de la proletaro; ili devas esti vigloplenaj avangardaj organizoj kapablaj gvidi la proletaron kaj la revoluciajn amasojn por batali kontraŭ la klasa malamiko.”** La instrukcio de Prezidanto Maŭ difinis por ni la politikan direkton de ordigo kaj konstruo de la Partio.

La Komunista Partio de Ĉinio estas partio konstruita sub la kulturado de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Depost la naskiĝo en 1921, nia partio spertis longdaŭran batalon por depreni regpotencon kaj firmigi la proletaran diktaturon per armita forto. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, nia partio ĉiam staras sur la plejfronto de revoluciaj militoj kaj revoluciaj bataloj. Ĝuste sub la direkto de la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ, alfrontante ekstreme potencajn malamikojn en- kaj ekster-landajn kaj tre komplikajn cirkonstancojn, nia partio gvidis la ĉinajn proletaron kaj vastajn popolamasojn en persistado ĉe la principo de **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj** kaj ĉe la proletara internaciismo, brave bataladis unuj sekvante aliajn, kaj fine disvolviĝis de komunismaj grupoj kun nur kelkdek membroj je la plej frua tempo, en la grandan, gloran kaj ĝustan partion, kiu nun gvidas la potencon Ĉinan Popolan Respublikon. Ni profunde komprenas, ke sen popola armita batalo ne estus la hodiaŭa Komunista Partio de Ĉinio, nek la hodiaŭa Ĉina Popola Respubliko. Ni devas por ĉiam memori la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Kamaradoj en la tuta partio ne devas forgesi tiun sperton, kiun ni ricevis kontraŭ sango.”**

Ĉiuj sukcesoj de la Komunista Partio de Ĉinio estas rezultoj de la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj venkoj de Maŭzedongpenso. De la lasta duonjarcento, en gvidado de la ĉinaj diversnaciaj popolanoj en la granda batalo por plenumi la nov-demokratian revolucion, en gvidado de la granda batalo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando kaj en la granda batalo de la nuntempa internacia komunisma movado kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj, Prezidanto Maŭ kombinis la universalan veron de Marksismo-Leninismo kun la konkreta praktiko de revolucio, heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismen en diversaj flankoj kiaj politiko, milita afero, ekonomio, kulturo kaj filozofio, kaj levis ĝin al tute nova stadio. Maŭzedongpenso estas Marksismo-Leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. La tuta historio de nia partio pruvis la veron: Forlasante la gvidon de Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenson, nia partio trafos repuŝon kaj malvenkon; kaj strikte sekvante Prezidanton Maŭ kaj agante laŭ Maŭzedongpenso, nia partio antaŭenmarŝos kaj triumfos. Tiun ĉi sperton ni devas memori por ĉiam. En ĉiu ajn tempo kaj sub ĉiu ajn cirkonstanco, kiu oponas Prezidanton Maŭ kaj Maŭzedongpenson, tiun kondamnas la tuta partio kaj punas la tuta lando.

Parolante pri ordigo kaj konstruo de la Partio, Prezidanto Maŭ iam diris: **“Homo havas arteriojn kaj vejnojn, tra kiuj la koro faras sangan cirkuladon, kaj krome spiras per pulmoj, elspirante karbondioksidon kaj enspirante freŝan oksigenon. Tio estas elimino de malfreŝaĵo kaj enpreno de freŝaĵo. Ankaŭ proletara partio devas elimini malfreŝaĵon kaj enpreni freŝaĵon, nur tiam ĝi povas esti plena**

je energio kaj vigleco. Sen forigo de eljetindaĵo kaj sen asimilo de freŝa sango la Partio perdos viglecon.” Per tiu viveca metaforo Prezidanto Maŭ eldiris la dialektikon de la kontraŭdiroj interne de la Partio. “La leĝo de kontraŭdiro, tio estas, la leĝo de la unueco de kontraŭaĵoj en objektoj, estas la plej fundamenta leĝo de materiisma dialektiko.” Kontraŭstaro kaj batalo inter la du linioj en la Partio estas enpartia reflektado de la kontraŭdiroj inter la klasoj kaj inter la novo kaj malnovo en la socio. Se en la Partio ne estus kontraŭdiroj kaj batalo por solvi la kontraŭdirojn kaj ne estus elimino de malfreŝaĵo kaj enpreno de freŝaĵo, la vivo de la Partio do finiĝus. La teorio de Prezidanto Maŭ pri la kontraŭdiroj interne de la Partio estas la fundamenta gvidpenso por ordigo kaj konstruo de la Partio en la estonteco.

La historio de la Komunista Partio de Ĉinio ja estas historio en kiu la marksism-leninisma linio de Prezidanto Maŭ batalas kontraŭ dekstraj kaj “maldekstraj” oportunismaj linioj en la Partio. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, nia partio venkis la dekstran oportunisman linion de Ĉen Duĥiu, venkis la “maldekstran” oportunisman linion de Kju Kiubaj kaj Li Lisan, venkis la oportunismajn liniojn de Vang Ming komence “maldekstran” kaj poste dekstran, venkis la linion de Ĝang Guotaŭ kiu faris splitigon en la Ruĝa Armeo, venkis la kontraŭpartian aliancon de dekstra oportunismo de Peng Deĥuaj, Gaŭ Gang, Ĵaŭ Ŝuŝi k.a., kaj frakasis ankaŭ la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki post longdaŭra batalo. Nia partio firmiĝis, disvolviĝis kaj fortiĝis ĝuste en la bataloj inter la du linioj, precipe en la bataloj por venki la tri plej malutilajn por la Partio renegatajn klikojn de Ĉen Duĥiu, Vang Ming kaj Liu Ŝaŭki.

En la nova historia periodo sub la proletara diktaturo, la proletaro efektivas siajn diktaturon kaj gvidon super ĉiuj laboroj tra sia avangardo, la Komunista Partio. Sen

la proletara diktaturo, sen la daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, estas neeble ĝuste solvi la problemon pri konstruo de la Partio, nome kian partion konstrui kaj kiel ĝin konstrui.

La reviziisma parti-konstrua linio de Liu Ŝaŭki perfidis ĝuste de la fundamento la doktrinon pri la proletara diktaturo kaj la teorion pri parti-konstruo de Marksismo-Leninismo. En la grava momento kiam la socialisma revolucio de Ĉinio profunden disvolviĝis kaj klasbatalo eksterordinare akriĝis, Liu Ŝaŭki denove publikigis sian nigran libron *Memkulturo* ĝuste kun la celo renversi la proletaran diktaturon de nia lando kaj restaŭri la burĝaran diktaturon. Transkribante la paragrafon de vortoj de Lenin pri la neceseco de la proletara diktaturo, kiun ni supre citis, Liu Ŝaŭki refoje intence forstrekis la plej gravan konkludon ke **“la proletara diktaturo estas nepre necesa”**, kio klare malkaŝis lian kontraŭrevolucionan vizaĝon perfidantan al la proletara diktaturo. Krome, Liu Ŝaŭki daŭre dissemis diversajn reakciajn absurdaĵojn kiaj la teorio pri “estingiĝo de klasbatalo”, la teorio pri “obeema instrumento”, la teorio “pri malprogresemo de la amaso”, la teorio pri “aliĝo al la Partio por fariĝi estro”, la teorio pri “paco interne de la Partio” kaj la teorio pri “kunfandiĝo de privata kaj kolektiva intereso” (nome, “iom perdi por multe gajni”), kaj vane intencis korodi kaj demoralizi nian partion, por ke ju pli la partianoj sin kulturu des pli ili reviziistiĝu, ke la marksism-leninisma partio “pace evoluu” en reviziisman partion, kaj ke la proletara diktaturo “pace evoluu” en la burĝaran diktaturon. Ni devas plue disvolvi revolucionan amasan kritikon por ĝisfunde elimini la venenan influon de ĉiuj liaj absurdaĵoj.

Tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio estas partiordiga movado plej vasta kaj plej profunda en la historio de nia partio. La partiaj organizoj de ĉiuj niveloj kaj vasta partia membraro spertis intensan batalon inter la du linioj, provon de la grand-

skala klasbatalo kaj ekzamenon fare de revoluciaj amasoj en kaj ekster la Partio. Kaj la partianoj kaj kadroj iris en la mondon de amasa batalo kaj spertis venton kaj pluvon de amasa batalo, kaj altigis sian klasan konscion kaj konscion pri la batalo inter la du linioj. Tiu ĉi granda revolucio diras al ni: Sub la proletara diktaturo, ni nepre devas fari al la vastaj amasoj de partianoj edukon pri klasoj, klasbatalo, batalo inter la du linioj kaj daŭra revolucio. Estas necese konduki en kaj ekster la Partio la batalon kontraŭ reviziismo, forpeli renegatojn, spionojn kaj la elementojn reprezentantajn la interesojn de ekspluataj klasoj el la Partio, kaj akcepti en la Partion verajn proletarajn progresemajn elementojn spertintajn provon en ŝtormo kaj ondegtoj. Estas necese klopodi por ke la gvidanteco de partiaj organizoj de ĉiuj niveloj vere estu tenata en la manoj de marksistoj. Estas necese, ke la partianoj vere kombinu teorion kun praktiko, kompakte ligiĝu kun la amasoj, kaj kuraĝu fari kritikon kaj memkritikon. Kaj estas necese, ke la partianoj por ĉiam konservu la stilon esti modesta, singardema kaj libera de fiereco kaj malpacienco kaj la stilon de penema luktado. Nur tiamaniere, la Partio povas gvidi la proletaron kaj revoluciajn amasojn konduki ĝisfine la socialisman revolucion.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Historia sperto meritas atenton. Linio kaj vidpunkto devas esti priparolataj konstante kaj ripetade. Ili ne devas esti priparolataj nur al malmultaj homoj, sed devas esti konigataj al la vastaj revoluciaj amasoj.”** La studo kaj propagando pri la fundamenta sperto de tiu ĉi Granda Proletara Kultura Revolucio, pri la historio de la batalo inter la du linioj kaj pri la doktrino de Prezidanto Maŭ pri la daŭra revolucio sub la proletara diktaturo ne devas esti farataj nur unu fojon, sed devas esti priparolataj ripetade de jaro al jaro, de monato al monato kaj de tago al tago. Nur tiamaniere, la eraraj linioj kaj tendenco povas esti kritikataj kaj bojkotataj de la

vastaj amasoj de partianoj kaj popolanoj tuj ĉe ilia burĝoniĝo, por garantii ke nia partio venke antaŭenmarŝos ĉiam laŭ la ĝusta navig-vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

Unu el la gravaj punktoj en la tagordo de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio estas reviziado de la statuto de la Partio. La Centra Komitato jam prezentis la projekton de la partia statuto al la Kongreso por diskutado. Tiu ĉi projekto estas kune elaborita de la tuta partio kaj la revoluciaj amasoj tra la tuta lando. Depost kiam Prezidanto Maŭ proponis en novembro 1967, ke la bazaj partiaj organizoj partoprenu en reviziado de la statuto de la Partio, la Centra Komitato jam ricevis kelk-mil projektojn. Sur tiu ĉi bazo la Plivas-tigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio ellaboris la projekton de la statuto de la Partio, kaj poste la tuta partio, tuta armeo kaj la vastaj revoluciaj amasoj de la tuta lando refoje faris varman kaj seriozan diskutadon. Oni povas diri, ke la projekto de la nova statuto de la Partio estas produktaĵo de kombiniĝo de la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kun la vastaj amasoj, reflektis la volon de la tuta partio, tuta armeo kaj la vastaj revoluciaj amasoj de la tuta lando, kaj estas viveca manifestiĝo de la demokratia centralizismo kaj la amasa linio, ĉe kiuj ĉiam persistas la Partio. Estas precipe grave, ke la projekto de la statuto de la Partio denove difinis klare, ke Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso estas la teoria bazo kiu orientas la penson de nia partio. Tio estas granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio en frakaso de la reviziisma parti-konstrua linio de Liu Ŝaŭki kaj granda venko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. La Centra Komitato kredas ke, post la diskutado kaj adoptado de la nova partia statuto fare de la Kongreso, nia partio certe estos konstruita, laŭ ĝia difino, en partion ankoraŭ pli grandan, ankoraŭ pli gloran kaj ankoraŭ pli ĝustan.

VII. PRI LA RILATOJ INTER NIA LANDO KAJ FRENDAJ LANDOJ

Nun, ni ankaŭ volas emfazi la rilatojn inter nia lando kaj fremdaj landoj.

La revoluciaj bataloj de la proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj la subpremataj nacioj de la mondo ĉiam estas subtenantaj unu alian. La Albana Partio de Laboro kaj ĉiuj veraj frataj marksism-leninismaj partioj kaj frataj organizoj, la vastaj proletaro kaj revolucia popolo de la tuta mondo, multaj amikaj landoj, amikaj organizoj kaj personoj donis varmajn aplaŭdon kaj subtenon al la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando. Nun mi esprimas al ili profundan dankon en la nomo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio. Kaj ni faras firman garantion: La Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo nepre plenumos sian devon de la proletara internaciismo kaj kune kun ili kondukos ĝisfine la grandan batalon kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj.

La ĝenerala tendenco de la nuna mondo ankoraŭ estas kiel dirite de Prezidanto Maŭ: **“La malamiko putriĝas tagon post tago, dum nia afero pliboniĝas kun ĉiu tago.”** Unuflanke la revoluciaj movadoj de la tutmonda proletaro kaj diverslandaj popoloj estas en vigla kaj prospera kreskado. Ĉiam pli disvolviĝas la armita batalo de la popoloj de la suda parto de Vjetnamio, Laoso, Tajlando, Birmo, Malajo, Indonezio, Hindio, Palestino kaj aliaj landoj kaj regionoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. La vero **“El la pafilo venas ŝtatpotenco”** estas pli kaj pli posedata de la vastaj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj. En Japanio, okcidenta Eŭropo kaj norda Ameriko, la kapitalismaj “koraj” regionoj, eksplodis

senprecedence gigantaj revoluciaj amasaj movadoj. Pli kaj pli da popolanoj estas vekigantaj. La veraj frataj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj iom post iom disvolviĝas en la procedo de kombino de Marksismo-Leninismo kun la konkreta revolucia praktiko de sia lando. Aliflanke, usona imperiismo kaj sovetunia reviziisma social-imperiismo dronas en politika kaj ekonomia krizoj kaj troviĝas en senelirejo kaj malfaciloj en-kaj ekster-landaj. Ili koluzias unu kun la alia kaj samtempe luktas unu kontraŭ la alia kun vana intenco denove dividi la mondon. En oponado kontraŭ Ĉinio, komunismo kaj la popolo, en subpremado de naci-liberiga movado kaj en agresa milito, ili kunagadas kaj koluzias. Kaj en luktado por krudaj materialoj, merkatoj, dependaj landoj, gravaj strategiaj lokoj kaj influ-sferoj, ili intrige luktas unu kontraŭ la alia kaj elpuŝas unu la alian. Por efektiviĝi siajn ambiciojn, ili ekspansiigas armeon kaj preparas militon.

Lenin iam diris, ke imperiismo estas milito. **“...imperiismaj militoj estas absolute neeviteblaj sur tia ekonomia bazo, dum ekzistas privata posedsistemo de produktaj rimedoj”.** (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 22, pĝ. 182.) Lenin plue montris: **“La imperiisma milito estas la antaŭvespero de socialisma revolucio.”** (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 25, pĝ. 349.) Tiuj ĉi sciencaj tezoj de Lenin ankoraŭ ne elmodiĝis.

Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: **“Pri la problemo de mondmilito, estas nur du eblecoj: aŭ milito kaŭzos revolucion, aŭ revolucio preventos militon.”** La kaŭzo kuŝas en tio, ke en la nuntempa mondo ekzistas kvar grandaj kontraŭdiroj, nome:

la kontraŭdiro inter la subpremataj nacioj en unu flanko kaj imperiismo kaj social-imperiismo en la alia; la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro en la kapitalismaj kaj reviziismaj landoj; la kontraŭdiro inter imperiismaj landoj kaj social-imperiisma lando kaj inter ĉiuj imperiismaj landoj kaj la kontraŭdiro inter la socialismaj landoj en unu flanko kaj imperiismo kaj social-imperiismo en la alia. La ekzisto kaj disvolviĝo de tiuj ĉi kontraŭdiroj certe kaŭzos revolucion. Laŭ la historia sperto de la Unua Mondmilito kaj Dua Mondmilito, oni povas certigi ke, se imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj altrudos trian mondmiliton al la mondaj popoloj, tio povos nur multege plirapidigi la disvolviĝon de tiuj ĉi kontraŭdiroj kaj puŝi la tutmondajn popolojn leviĝi al revolucio por entombigi imperiismon, reviziismon kaj ĉiujn reakciularojn.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj.”** **“Strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn, sed taktike ni devas trakti ilin ĉiujn serioze.”** Tiu ĉi granda vero montrita de Prezidanto Maŭ kuraĝigis la revolucionan batalvolon de la tutmondaj popoloj kaj direktas nin gajni venkojn unu post alia en la batalo kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj.

La papertigra naturo de usona imperiismo estas jam delonge malkovrita de la tutmondaj popoloj. La usona imperiismo, tiu ĉi plej feroĉa malamiko de la tutmonda popolo, iras ĉiam pli malsupren sur deklivo. Post sia sursceniĝo, Nixon alfrontas senesperan staton kaj neforskueblan ekonomian krizon, alfrontas fortegan kontraŭstaron de la tutmondaj popoloj kaj enlandaj popolamasoj kaj alfrontas la malfacilan situacion en kiu imperiismaj landoj dissplitiĝas kaj fariĝas ĉiam malpli efika la direktbastono de usona imperiismo. Trovinte nenian rimedon por solvi la problemojn, Nixon povas nur, kiel liaj antaŭuloj, daŭre ludi kontraŭrevoluciajn duvizaĝajn

artifikojn, ke publike li ŝajnigas sin “pacama”, sed fakte li pli grandskale ekspansigas armeon kaj preparas militon. La militelspezo de Usono kreskas jaron post jaro. Ĝis nun usona imperiismo ankoraŭ okupas tirane la teritorion de nia lando Tajvan. Ĝi ekspedis siajn agresajn trupojn al multaj landoj kaj starigis centojn kaj milojn da militbazoj kaj militaj konstruaĵoj en diversaj lokoj tra la mondo. Ĝi produktis tiom multe da aviadiloj kaj kanonoj, tiom multe da nukleaj bomboj kaj telestirataj ĵetarmiloj. Por kio do ĉio ĉi tio estas? Por timigi, subpremi kaj masakri la popolon kaj tirane superregi la mondon. Rezulte de tio, ĝi metas sin ĉie en la pozicion malamikan kontraŭ la popolo, en sieĝon kaj fortan baton de la vastaj proletaro kaj popolamasoj en la tuta mondo, kaj certe kaŭzos ankoraŭ pli grandskalan revolucion en la tuta mondo.

Ankaŭ la sovetunia reviziisma renegata kliko estas papertigro. Ĉiam pli klare malkaŝiĝas ĝia vizaĝo de social-imperiismo. Ankoraŭ kiam la reviziismo de Ĥruŝĉov ĵus ĝermis, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam vidis la seriozan malutilon de moderna reviziismo al revolucia afero de la mondo. Kune kun la Albana Partio de Laboro estrata de la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha kaj la veraj marksist-leninistoj de la tuta mondo, Prezidanto Maŭ gvidis la tutan partion konduki firman batalon kontraŭ moderna reviziismo kun la sovetunia reviziismo kiel la centro en ideologio, teorio kaj politiko. Tio ebligis al la tutmonda popolo iom post iom ellerni en la batalo distingi veran Marksismon-Leninismon disde la falsa, veran socialismon disde la falsa, kaj bankrotigis la reviziismon de Ĥruŝĉov. Kaj samtempe, Prezidanto Maŭ gvidis la tutan partion firme kritiki la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki de kapitulaco al imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj kaj de estingo de revoluciaj movadoj en diversaj landoj kaj frakasi lian kontraŭrevolucion reviziis-

man klikon. Ĉio ĉi tio estas farita en plenumo de la proletara internaciisma devo de nia partio.

Post kiam Breĵnev sursceniĝis, kun sia pli kaj pli neefikiĝanta direktbastono kaj siaj pli kaj pli serioziĝantaj malfaciloj en- kaj ekster-landaj, la sovetunia reviziisma renegata kliko ankoraŭ pli freneze efektivigas social-imperiismon kaj social-faŝismon. Enlande, ĝi intensigas subpremadon al la sovetunia popolo kaj plenampleksan restaŭron de kapitalismo. Eksterlande, ĝi intensigas sian koluzion kun usona imperiismo, intensigas subpremon al revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj, intensigas kontrolon kaj ekspluaton super diversaj landoj de orienta Eŭropo kaj la Mongola Popola Respubliko, intensigas konkuradon kun usona imperiismo por Mez-oriento kaj aliaj regionoj, kaj intensigas agresan minacon kontraŭ nia lando. La ekspedo de kelkcentmil armeanoj por okupi Ĉeĥoslovakion kaj la konduko de armitaj provokoj al nia teritorio Ĝenbaŭ-insulo ja estas du abomenindaj prezentoj faritaj de sovetunia reviziismo lastatempe. Por pledi por sia agresado kaj prirabado, ĝi distrumpetis pri la t. n. teorio de "limigita suvereneco", la teorio de "internacia diktaturo" kaj la teorion de "socialisma komuneco". Kion signifas tiu kompleto da teorioj? Tio ja signifas, ke via suvereneco estas "limigita", dum ĝia suvereneco estas senlima. Ĉu vi ne obeas al ĝi? Ĝi do faras "internacian diktaturon", t. e., diktaturon super diverslandaj popoloj, por formi la "socialisman komunecon" regatan de la novaj caroj, t. e., koloniojn de social-imperiismo, similan al la "Nova Ordo de Eŭropo" de Hitler, la "Kun-prospera Sfero de Granda Orienta Azio" de japana militarismo kaj la "Komuneco de Libera Mondo" de Usono. Lenin forte riproĉis la renegatojn de la Dua Internacio: "**Socialismo en vortoj, imperiismo en fakto, la transformiĝo de oportunismo al imperiismo.**" (Lenin, *Kolektitaj Verkoj*, ĉinlingva eld., vol. 29, pĝ.

458.) Tio tute konformas al la nuna sovetunia reviziisma renegata kliko formita el plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ni firme kredas: La sovetuniaj proletaro kaj vasta popolo havantaj gloran revolucionan tradicion certe leviĝos por renversi tiun ĉi klikon de plenmano da renegatoj. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montras: "**Sovetunio estas la unua socialisma ŝtato, kaj la Komunista Partio de Sovetunio estas partio kreita de Lenin. Kvankam la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato de Sovetunio estas nun uzurpita de reviziistoj, tamen, mi konsilas kamaradojn firme kredi, ke la vastaj amasoj de popolanoj kaj partiaj membroj kaj kadroj de Sovetunio estas bonaj kaj deziras revolucion, kaj ke la regado de reviziismo ne longe daŭros.**"

Ĉar la sovetunia registaro kreis la incidenton de armita invado al nia teritorio Ĝenbaŭ-insulo, la landlima problemo inter Ĉinio kaj Sovetunio altiris la atenton de la tuta mondo. Samkiel la landlimaj problemoj inter Ĉinio kaj aliaj kelkaj ĝiaj najbaraj landoj, la landlima problemo inter Ĉinio kaj Sovetunio estas postlasita de la historio. Pri tiuj ĉi problemoj, nia partio kaj nia registaro ĉiam pledas por fari intertraktadon tra diplomaciaj kanaloj por atingi justan kaj racian solvon, kaj por teni la ekzistantan staton de la landlimo antaŭ la solvo por eviti konflikton. Laŭ tiu principo, Ĉinio kontentige solvis en sinsekvo la landlimajn problemojn kun Birmo, Nepalo, Pakistano, Mongolio, Afganio kaj aliaj najbaraj landoj. Nur la landlimaj problemoj inter Sovetunio kaj Ĉinio kaj inter Hindio kaj Ĉinio restas ankoraŭ nesolvitaj ĝis nun.

Pri la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio la ĉina registaro plurfoje okazigis intertraktadojn kun la hinda registaro. Sed ili estas detruitaj pro tio, ke la hinda reakcia registaro, heredante la agresan politikon de brita imperiismo, ne nur devigis nin rekoni la kontraŭleĝan "McMahon-linion", kiun ne rekonis eĉ reakciaj registaroj en diversaj

periodoj de la malnova Ĉinio, sed ankaŭ vane intencis pluapaŝe okupi la regionon Aksaj Ĉin kiu estas ĉiam sub la administrado de Ĉinio. Tion ĉiuj klare scias.


La landlima problemo inter Ĉinio kaj Sovetunio estas produktaĵo de la agreso fare de la car-rusa imperiismo al Ĉinio. En la lasta duono de la 19-a jarcento, kiam la ĉina kaj rusa popoloj troviĝis en senpova pozicio, la cara registaro aplikis la agresan aktivadon de imperiismo por dividi Ĉinion, altrudis al Ĉinio serion da neegalaj traktatoj, fortranĉis grandajn pecojn da ĉina teritorio kaj transpasis la landliman linion difinitan de la neegalaj traktatoj en multaj regionoj por pluapaŝe okupi ĉinan teritorion. Tia rabista aktivado ricevis indignajn kondamnojn de Marks, Engels kaj Lenin. Je la 27-a de septembro, 1920, la soveta registaro gvidata de granda Lenin solene proklamis, ke ĝi “deklaras senvalidaj ĉiujn traktatojn kontraktitajn de ĉiuj antaŭaj rusaj registaroj kun Ĉinio, rezignas la tutan kaptitan ĉinan teritorion kaj ĉiujn rusajn koncesiojn en Ĉinio kaj redonas al Ĉinio senpage kaj por ĉiam ĉion, kion la cara registaro kaj la rusa burĝaro kruele rabis de ĝi.” (Vidu *Deklaron de la Registaro de la Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko al la Ĉina Registaro*) Tiu ĉi proletara politiko de Lenin ne povis esti realigita pro la tiamaj historiaj kondiĉoj.

Kun sia konstanta starpunkto pri la landlima problemo, nia registaro dufoje iniciate proponis al la sovetunia registaro intertraktadon por solvi la landliman problemon inter Ĉinio kaj Sovetunio tiel frue kiel en la 22-a de aŭgusto kaj la 21-a de septembro, 1960. En 1964, ambaŭ flankoj de Ĉinio kaj Sovetunio komencis intertraktadon en Pekino. Kvankam la traktatoj pri la nuna landlimo inter Ĉinio kaj Sovetunio estas neegalaj traktatoj altruditaj de la caroj al la ĉina popolo, tamen, elirante de la deziro protekti la revolucian amikecon inter la ĉina kaj sovetunia popoloj, ni ankoraŭ porpledis preni tiujn ĉi traktatojn

kiel bazon por solvi la landliman problemon. Sed, perfidante la proletaran politikon de Lenin kaj persistante ĉe la starpunkto de social-imperiismo de la nova caro, la sovetunia reviziisma renegata kliko rifuzis rekoni tiujn ĉi traktatojn kiel neegalajn, kaj krome insistis ke nia lando rekonu, ke ĉiuj ĉinaj teritorioj, kiujn ili okupis aŭ intencis okupi malobservante la traktatojn, apartenas al Sovetunio. Tiu ĉi starpunkto de grandregna ŝovinismo kaj social-imperiismo de la sovetunia registaro detruis la intertraktadon.

Post kiam Breĵnev enpotenciĝis, la sovetunia reviziisma renegata kliko ankoraŭ pli senbride detruis la ekzistantan landliman staton, fojrefoje fabrikis landlimajn incidentojn, pafmortigis niajn nearmitajn fiŝistojn kaj kamparanojn kaj atencis nian suverenecon. Lastatempe ĝi iris pli malproksimen kaj faris sinsekvajn armitajn entrudiĝojn en nian teritorion Ĝenbaŭ-insulo. Puŝite en netolereblecon, niaj limgardaj trupoj faris memdefendan rebaton, donis meritatan frapon al la agresantoj kaj venke defendis nian sanktan teritorion. Por liberigi sin de la embaraso, Kosigin proponis, je la 21-a de marto, telefoni kun gvidantoj de nia lando. Kaj en la 22-a de marto, nia registaro tuj respondis al ili per memorando, ke “jam estas ne taŭge interkomunikiĝi per telefono laŭ la nuna rilato inter Ĉinio kaj Sovetunio. Se la sovetunia registaro havas ion por diri, do bonvole elmetu oficiale al la ĉina registaro tra diplomaciaj kanaloj.” En la 29-a de marto, la sovetunia registaro publikigis deklaron, en kiu ĝi unuflanke ankoraŭ persistas ĉe sia obstina starpunkto de agresanto, kaj aliflanke esprimas sian volon refari “interkonsiliĝon”. Nia registaro estas konsideranta sian respondon al tio.


La eksterlanda politiko de niaj partio kaj registaro estas konstanta, nome: Sur la principo de proletara internaciismo, disvolvi amikecan, interhelpan kaj kunlaboran rilaton kun socialismaj landoj; subteni kaj helpi ĉiujn subprematajn popolojn kaj sub-



prematajn naciojn en ilia revolucia batalo; sur la bazo de la Kvin Principoj de reciproka respekto de teritoria integreco kaj suvereneco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto, klopodi por pace kunekzisti kun landoj de malsamaj soci-sistemoj, oponi kontraŭ la agresiva politiko kaj milita politiko de imperiismo. Nia proletara eksterlanda politiko ne estas provizora rimedo, sed longdaŭra politiko persiste efektivigata. Ni tiel faris en la pasinteco, ni ankoraŭ persiste tiel faros en la estonteco.

Ni ĉiam porpledas, ke la internaj aferoj de ĉiuj landoj devas esti solvitaj de iliaj propraj popoloj. La landoj ĉu grandaj aŭ malgrandaj kaj la partioj ĉu grandaj aŭ malgrandaj ĉiuj devas starigi interrilaton sur la principoj de egaleco kaj reciproka neinterveno en internajn aferojn. Por defendi tiujn ĉi marksism-leninismajn principojn, la Komunista Partio de Ĉinio kondukis longdaŭran batalon kontraŭ la abomeninda grandregna ŝovinismo de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Tio estas de ĉiuj konata fakto. Senĉese babilante pri “frataj partioj” kaj “frataj landoj”, la sovetunia reviziisma renegata kliko fakte rigardas sin mem kiel patriarkan partion kaj novan caron kiu povas laŭvole okupi teritorion de aliaj landoj. Ili ne nur faras subfoson kaj renverson kontraŭ veraj marksism-leninismaj partioj, la Komunista Partio de Ĉinio, la Albana Partio de Laboro kaj aliaj, sed ankaŭ feroce sintenas kontraŭ tiuj partioj kiuj havas iom da malsamaj opinioj, kontraŭ tiuj landoj el ilia tiel nomata “socialisma komuneco” kiuj havas iom da malsamaj opinioj, kaj alprenas ĉiujn rimedojn por subpremi, subfosi, renversi kaj eĉ ekspedi armeanojn por invadi kaj okupi iliajn tiel nomatajn “fratajn landojn”, kaj ŝtele aresti la membrojn de iliaj tiel nomataj “frataj partioj”. Tiuj faŝismaj rabistaj agadoj decidis ilian sorton de neevitebla pereco.

Usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo ĉiam intencas “izoli” Ĉinion, tio estas la gloro de Ĉinio. Ilia freneza oponado kontraŭ Ĉinio povas domaĝi al ni neniun hareton, sed male, stimulas en nia popolo la spiriton de sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj kaj klopodo por prosperiĝo kaj potenciĝo, kaj pruvas al la tuta mondo, ke Ĉinio jam strekis klaran limon inter si mem kaj usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo. Hodiaŭ, la sorto de la mondo estas decidata ne de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj, sed de la proletaro kaj diverslandaj revoluciaj popoloj. La veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj de diversaj landoj, formitaj el proletaraj progresemaj elementoj, estas novnaskiĝinta forto, kiu havas senlime vastan perspektivon. La Komunista Partio de Ĉinio firme unuiĝas kaj batalas kune kun ili. Ni firme subtenas la albanan popolon en ĝia batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, firme subtenas la vjetnaman popolon konduki la nacisavan militon kontraŭ Usono ĝis la fino, firme subtenas la popolojn de Laoso, Tajlando, Birmo, Malajo, Indonezio, Hindio, Palestino kaj aliaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko en ilia revolucia batalo, firme subtenas la usonajn proletaron, junajn lernantojn kaj nigrulajn amasojn en ilia justa batalo kontraŭ la usona reganta kliko, firme subtenas la sovetuniajn proletaron kaj laborantajn popolanojn en ilia justa batalo por renversi la sovetunian reviziisman renegatan klikon, firme subtenas la popolojn de Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj en ilia justa batalo kontraŭ la sovetunia reviziisma social-imperiismo, firme subtenas la popolojn de Japanio kaj ĉiuj landoj de okcidenta Eŭropo kaj Oceanio en ilia revolucia batalo, firme subtenas diverslandajn popolojn de la mondo en ilia revolucia batalo, kaj firme subtenas ĉiujn justajn batalojn kontraŭ la agreso kaj subpremo de usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo. Ĉiuj landoj kaj popo-



loj suferantaj agreson, kontrolon, intervenon kaj tiranadon de usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, unuiĝu kaj formu la plej vastan unuecfronton por faligi niajn komunajn malamikojn!

Ni nepre ne devas malstreĉi nian revolucion singardemon pro la venko, nepre ne devas ignori la danĝerecon ke usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo lanĉos grandskalan agresan militon. Ni devas fari plenajn preparojn, preparojn kontraŭ ilia grandskala milito kaj kontraŭ ilia frua milito. Ni devas nin prepari kontraŭ ilia lanĉado de konvencia milito kaj kontraŭ ilia lanĉado de grandskala nuklea milito. **Unuvorte, ni devas nin prepari.** Jam antaŭlonge Prezidanto Maŭ diris: **“Se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin.”** Se ili nepre militos, ni do akompanos ilin ĝis la fino. La venko de la ĉina revolucio estas akirita per batalo. La centmilionoj da ĉinaj popoloj kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiuj estas armitaj per Maŭzedongpenso

kaj harditaj tra la Granda Proletara Kultura Revolucio, jam firme decidis, kun plena fido al venko, nepre liberigi nian sanktan teritorion Tajvan, kaj certe **firme, ĝisfunde, tute kaj komplete ekstermi** ĉiujn agresantojn kiuj aŭdacos entrudiĝi!

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“Sovetunia reviziismo kaj usona imperiismo faris en koluzio tiom multe da malbonaĵoj kaj hontindaĵoj, ke la tutmondaj revoluciaj popoloj certe ne lasos ilin nepunitaj. La diverslandaj popoloj de la mondo estas leviĝantaj. Kaj la nova historia periodo de opono kontraŭ usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo jam komenciĝis.”** Tute egale, ĉu milito kaŭzos revolucion aŭ revolucio preventos militon, ja estos ne tre multaj la tagoj de usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo! Unuiĝu la tutmondaj proletoj! Unuiĝu la tutmondaj proletaro kaj subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj! Entombigu usonan imperiismon, sovetunian reviziismon kaj iliajn lakeojn!

VIII. UNUIĜU LA TUTA PARTIO KAJ LA TUTLANDA POPOLO POR BATALAKIRI ANKORAŬ PLI GRANDAJN VENKOJN

La Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio estas kunvokita en la grava momento de la disvolviĝo de la historio de nia partio, en la grava momento de la plisolidiĝo kaj disvolviĝo de la proletara diktaturo de nia lando kaj en la grava momento de la disvolviĝo de la monda komunisma movado kaj la monda revolucio. Inter la reprezentantoj ĉeestantaj nian Kongreson, troviĝas proletaraj revoluciistoj de la maljuna generacio kaj ankaŭ granda nombro da novemerigantaj fortoj. Ankoraŭ neniam okazis en ĉiu ajn antaŭa kongreso de nia partio, ke tiom granda estas nombro de la reprezentantoj de la partianoj industriaj laboristoj, partianoj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj virinaj partianoj. Inter

la reprezentantoj de la partianoj de la Popola Liberiga Armeo, sin trovas veteranaj batalantoj de la Ruĝa Armeo kaj ankaŭ novaj batalantoj. La reprezentantoj de la partianoj el ruĝaj gvardioj ĉeestas tutlandan kongreson de la Partio por la unua fojo. Veninte el plej diversaj anguloj tra la lando, tiom multaj reprezentantoj kolektiĝis en Pekino, ĉe la granda gvidanto Prezidanto Maŭ por kune diskuti kaj decidi pri la gravaj aferoj de la Partio kaj ŝtato. Tio signas, ke nia kongreso estas kongreso plena de freŝa vikleco, estas kongreso de unuiĝo kaj estas kongreso de triumfo.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo**

kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamenta garantio por la nepra triumfo de nia afero.” Harditaj tra la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la granda ruĝa standardo de Maŭzedongpenso, nia patrolando sin manifestas senprecedence unueca, kaj nia popolo formis ekstreme vastan revolucion grandan solidarecon. Tiu ĉi granda solidareco estas gvidata de la proletaro kaj bazita sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj. Ĝi ampleksas ĉiujn fratajn naci-malplimultojn, la patriotajn demokratiajn personojn kiuj faris bonojn por la afero de revolucio kaj konstruado de la patrolando en longa tempo, la vastajn amasojn de transmaraj patriotaj elmigrintaj samlandanoj kaj la patriotaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen, la patriotajn samlandanojn subprematajn de la Uson-Ĉiang-a reakciularo en Tajvan, kaj ĉiujn personojn kiuj subtenas socialismon kaj amas la socialisman patrolandon. Ni kredas, ke post la nuna Tutlanda Kongreso de la Partio, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la diversnaciaj popoloj de nia tuta lando certe unuiĝos pli kompakte kaj batalakiros ankoraŭ pli grandajn venkojn en la batalo kontraŭ niaj komunaj malamikoj kaj en la afero de konstruado de potenca socialisma patrolando.

En 1962 Prezidanto Maŭ diris: “La sekvantaj 50 ĝis 100 jaroj proksimume de-

post nun estos granda erao de ĝisfunda ŝanĝo de la socia sistemo en la mondo, estos mondrenversa erao, kun kiu neniu ajn pasinta historia erao povas kompari. Troviĝante en tia erao, ni nepre devas nin prepari por konduki grandan batalon, kiu havos multajn malsamajn karakterizaĵojn en la formo kompare kun la bataloj de la pasinteco.” Tiu ĉi grandioza perspektivo malproksimvidita de Prezidanto Maŭ prilumas nian vojon de antaŭenmarŝo por la estonteco kaj instigas ĉiujn verajn marksist-leninistojn brave lukti por realigi la grandan idealon de komunismo.

La tuta partio unuiĝu, la tutlanda popolo unuiĝu, alte tenu la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, faru firman decidon, timu nenian oferon, venku ĉiujn malfacilojn por akiri la venkon!

Vivu la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio!

Vivu la proletara diktaturo!

Vivu la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu granda Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu, vivu, longe vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!



Statuto de la Komunista

Partio de Ĉinio

(Aprobata de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en la 14-a de aprilo, 1969)

ĈAPITRO I

ĜENERALA PROGRAMO

La Komunista Partio de Ĉinio estas politika partio de la proletaro.

La fundamenta programo de la Komunista Partio de Ĉinio estas renversi ĝisfunde la burĝaron kaj ĉiujn aliajn ekspluatajn klasojn, anstataŭigi la burĝaran dikta-

turon per la proletara diktaturo kaj venki kapitalismon per socialismo. La fina celo de la Partio estas realigi komunismon.

La Komunista Partio de Ĉinio estas konsistanta el progresemaĵoj de la proletaro; ĝi estas vivplena avangarda organizo, kiu gvidas la proletaron kaj re-



voluciajn amasojn batali kontraŭ la klasaj malamikoj.

La Komunista Partio de Ĉinio prenas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson kiel teorian bazon, kiu orientas ĝian penson. Maŭzedongpenso estas Marksismo-Leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo.

De la lasta duonjarcento, en la gvidado de la granda batalo por plenumi la novdemokratian revolucion de Ĉinio, en la gvidado de la granda batalo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio kaj en la granda batalo de la nuntempa internacia komunisma movado kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciularoj, kamarado Maŭ Zedong kombinis la universalan veron de Marksismo-Leninismo kun la konkreta praktiko de revolucio, heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismon, kaj levis ĝin al tute nova stadio.

Kamarado Lin Biaŭ ĉiam alte tenas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, plej fidele, plej firme efektivigas kaj defendas la proletaran revolucion linion de kamarado Maŭ Zedong. Kamarado Lin Biaŭ estas intima kunbatalanto kaj daŭriganto de kamarado Maŭ Zedong.

La Komunista Partio de Ĉinio kun kamarado Maŭ Zedong kiel sia gvidanto estas granda, glora kaj ĝusta partio, estas gvidkerno de la ĉina popolo. La Partio spertis hardon en la longdaŭra klasbatalo por preni kaj firmigi regpotencon per armita forto, fortikiĝis kaj disvolviĝis en la batalo kontraŭ la dekstra kaj "maldekstra" oportunismaj linioj, kaj kun plena fido antaŭen marŝas brave sur la vojo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

La socialisma socio estas sufiĉe longa historia periodo. En tiu ĉi historia periodo ĉiam ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo, ekzistas la danĝero de kapitalisma restaŭro kaj ekzistas la minaco de renverso kaj agreso fare de imperiismo kaj moderna reviziismo. Tiuj ĉi kontraŭdiroj povas esti solvitaj nur per la marksisma teorio pri kontinua revolucio kaj la de ĝi direktata praktikado. La Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando ja estas granda politika revolucio fare de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj sub la kondiĉo de socialismo.

La tuta Partio nepre devas alte teni la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, gvidi la centmilionojn da diversnaciaj popoloj de la tuta lando daŭre disvolvi la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, firmigi kaj plifortigi la proletaran diktaturon, kaj konstrui socialismon sendepende kaj memstare, sin apogante sur propraj fortoj, pene luktante, streĉante plene la energion, strebante forte antaŭen, kaj multe, rapide, bone kaj ekonomie.

La Komunista Partio de Ĉinio persistas ĉe la proletara internaciismo, firme unuiĝas kun la veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo, unuiĝas kun la proletaro, la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo kaj kune kun ili batalas por faligi imperiismon estratan de Usono, modernan reviziismon kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro kaj diverslandajn reakciularojn, kaj por elimini la sistemon de ekspluato de homo al homo sur la terglobo kaj liberigi la tutan homaron.



La membroj de la Komunista Partio de Ĉinio, kiuj ĵuras batali la tutan vivon por komunismo, devas fari firman decidon, timi

nenian oferon kaj superi ĉiujn malfacilojn por akiri venkon!

ĈAPITRO II

PARTIAJ MEMBROJ

Artikolo 1. Ĉina laboristo, malriĉkamparano, malsupera mezkamparano, revolucia armeano aŭ alia revolucia elemento, kiu atingis la aĝon de 18 jaroj, povas fariĝi membro de la Komunista Partio de Ĉinio, se li rekonas la statuton de la Partio, partoprenas en iu partia organizo kaj aktive laboras en ĝi, plenumas rezoluciojn de la Partio, observas la disciplinon de la Partio kaj pagas kotizon al la Partio.

Artikolo 2. Tiu, kiu petas aliĝi al la Partio, devas unuope plenumi la procedon de la aliĝo al la Partio. Li devas esti rekomendita de du partiaj membroj, pleniĝi la petskribon por membriĝo kaj esti aprobita de la tutmembrara kunveno de parti-filio post ekzamenado kaj vasta aŭskultado de opinioj de amasoj en- kaj eksterpartiaj fare de parti-filio, kaj poste esti sankciita de la tuj supera partia komitato.

Artikolo 3. La membroj de la Komunista Partio de Ĉinio nepre devas:

(1) vive studi kaj vive apliki Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson;

(2) labori por la interesoj de la plejmulto de la homoj de Ĉinio kaj la mondo;

(3) esti kapablaj unuiĝi kun la plejmulto de homoj, inkluzive tiujn, kiuj erare oponis ilin kaj serioze korektas sian eraron, sed, esti aparte singardemaj kontraŭ karieristoj, konspiristoj kaj duvizaĝuloj, por preventi ke tiaj malbonaj elementoj uzurpu la gvidantecon de la Partio kaj ŝtato ĉe iu ajn nivelo, kaj garantii ke la gvidanteco de la

Partio kaj ŝtato por ĉiam restu en la manoj de marksismaj revoluciuloj;

(4) konsiliĝi kun amasoj ĉe traktado de aferoj;

(5) esti kuraĝaj en kritiko kaj memkritiko.

Artikolo 4. Kiam partiaj membroj malobservas disciplinon de la Partio, la diversnivela organizo de la Partio, en sia povo kaj laŭ konkretaj kazoj, prenas al ili disciplinajn rimedojn de averto, serioza averto, senigo je partia ofico, restigo en la Partio por observado aŭ eksigo el la Partio.

La plej longa tempo por restigi kaj observi partian membron en la Partio ne devas superi du jarojn. Dum tiu ĉi tempo li ne havas la rajtojn voĉdoni, elekti kaj esti elektita.

Partia membro, kiu estas apatia kaj restas senŝanĝa post edukado, devas esti konsilita aliĝi el la Partio.

Kiam partia membro petas aliĝon el la Partio, la tutmembrara kunveno de parti-filio devas forstreki lian nomon laŭ sia decido kaj raporti tion al la tuj supera partia komitato por registri. Se necese, tio povas esti publikigita al eksterpartiaj amasoj.

La nerefuteble atestitaj renegatoj, spiono, ĝismorte pentorifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, degenerintaj elementoj kaj fremdklasaj elementoj devas esti forpurigitaj el la Partio, kaj estas malpermesate al ili denove aliĝi al la Partio.



ĈAPITRO III

ORGANIZA PRINCIPO DE LA PARTIO

Artikolo 5. La organiza principo de la Partio estas demokratia centralizismo.

La gvidaj organoj de la Partio ĉe ĉiuj niveloj estas elektitaj post demokratia interkonsiliĝo.

La tuta Partio devas observi la unuecan disciplinon: Individuo obeas la organizon, malplimulto obeas la plimulton, suba nivelo obeas la superan, kaj la tuta Partio obeas la Centran Komitaton.

La gvidaj organoj de la Partio ĉe ĉiuj niveloj devas regule raporti sian laboron al kongresoj aŭ tutmembraraj kunvenoj, konstante aŭskulti opiniojn de amasoj en- kaj ekster-partiaj kaj akcepti ilian supervidon. Partiaj membroj havas la rajton kritiki partiajn organizojn kaj gvidantajn membrojn de ĉiuj niveloj kaj fari proponojn al ili. Se partia membro havas malsamajn opiniojn pri rezolucioj kaj direktivoj de la partiaj organizoj, li estas permesata rezervi siajn opiniojn kaj havas la rajton transe fari raporton al pli altaj niveloj, eĉ rekte al la Centra Komitato kaj la Prezidanto de la Centra Komitato. Estas necese krei politikan situacion en kiu estas kaj centralizismo kaj demokratio, kaj disciplino kaj libereco, kaj unueca volo kaj persona senĝeneco, vigeleco kaj viveco.

La organoj de ŝtata potenco de la proletara diktaturo, la Popola Liberiga Armeo, kaj la Komunisma Junulara Ligo kaj aliaj revoluciaj amasaj organizoj, kiaj tiuj de la laboristoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la ruĝgvardianoj, ĉiuj nepre devas akcepti la gvidon de la Partio.

Artikolo 6. La plej alta gvida organo de la Partio estas la Tutlanda Partia Kongreso kaj la de ĝi elektita Centra Komitato. La gvidaj organoj de la partiaj organizoj en la lokoj, trupoj kaj diversaj departementoj estas la partiaj kongresoj aŭ tutmembraraj kunvenoj ĉe la respektivaj niveloj kaj la de ili elektitaj partiaj komitatoj. Partiaj kongresoj ĉe ĉiuj niveloj estas kunvokataj de partiaj komitatoj ĉe la respektivaj niveloj.

La kunvoko de partiaj kongresoj en la lokoj kaj trupoj kaj la elektitaj membroj de iliaj respektivaj partiaj komitatoj devas esti sankciitaj de superaj partiaj organizoj.

Artikolo 7. Laŭ la principo de unuigita gvidado, kompakta ligiĝo kun la amasoj kaj elitigo kaj simpligo, partiaj komitatoj de ĉiuj niveloj establas laborajn instituciojn aŭ sendas siajn reprezentantajn organojn.

ĈAPITRO IV

CENTRAJ ORGANIZOJ DE LA PARTIO

Artikolo 8. La Tutlanda Kongreso de la Partio estas kunvokata po kvin jaroj. Sub eksterordinaraj cirkonstancoj, ĝi povas esti kunvokata antaŭdate aŭ prokrastite.

Artikolo 9. La plena sesio de la

Centra Komitato de la Partio elektas la Politikan Buroon de la Centra Komitato, la Konstantan Komitaton de la Politika Buroo de la Centra Komitato, kaj la Prezidanton kaj Vicprezidanton de la Centra Komitato.



La plena sesio de la Centra Komitato de la Partio estas kunvokata de la Politika Buroo de la Centra Komitato.

La Politika Buroo de la Centra Komitato kaj ĝia Konstanta Komitato plenumas funkcion de la Centra Komitato dum la periodo kiam la plena sesio de la Centra Komitato estas fermita.

Sub la gvido de la Prezidanto, Vicprezidanto kaj la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato, estas establita kelkaj necesaj, plej elektitaj kaj kompetentaj institucioj por unuece aranĝi ordinarajn aferojn de la Partio, registaro kaj armeo.

ĈAPITRO V

ORGANIZOJ DE LA PARTIO EN LOKOJ KAJ TRUPOJ

Artikolo 10. Partiaj kongresoj de gubernia kaj superguberniaj niveloj en la lokoj kaj de regimenta kaj superregimentaj niveloj en la Popola Liberiga Armeo estas kunvokataj po tri jaroj. Sub eksterordinaraj cirkonstancoj, ili povas esti kunvokataj an-

taŭdate aŭ prokrastite.

Partiaj komitatoj de ĉiuj niveloj en la lokoj kaj trupoj elektas siajn konstantajn komitatojn kaj sekretariojn kaj vicsekretariojn.

ĈAPITRO VI

BAZAJ ORGANIZOJ DE LA PARTIO

Artikolo 11. En fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj, popolaj komunumoj, institucioj, lernejoj, magazenoj, loĝ-kvartaloj, rotoj de la Popola Liberiga Armeo kaj aliaj bazaj unuoj ĝenerale estas starigataj partifilioj; povas esti starigataj ĝeneralaj partifilioj aŭ bazaj komitatoj en la lokoj, kie estas pli multaj partiaj membroj aŭ la revolucia batalo bezonas tiajn.

La bazaj organizoj de la Partio okazigas reelekton ĉiujare. Sub eksterordinaraj cirkonstancoj, la elekto povas esti farata antaŭdate aŭ prokrastite.

Artikolo 12. La bazaj organizoj de la Partio devas alte teni la grandan ruĝan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, elstarigi la proletaran politikon kaj disvolvi la stilon de kombino de teorio kun praktiko, de kompakta ligiĝo kun la popolamasoj kaj de kritiko kaj memkritiko. Iliaj ĉefaj taskoj estas:

(1) gvidi la partiajn membrojn kaj vas-

tajn revoluciajn amasojn vive studi kaj vive apliki Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpenson;

(2) konstante fari al la partiaj membroj kaj vastaj revoluciaj amasoj edukon pri la klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj, kaj gvidi ilin firme batali kontraŭ la klasaj malamikoj;

(3) propagandi kaj efektiviigi politikojn de la Partio, praktiki ĝiajn rezoluciojn kaj plenumi ĉiujn taskojn asignitajn de la Partio kaj ŝtato;

(4) kompakte ligiĝi kun la amasoj, konstante aŭskulti iliajn opiniojn kaj postulojn, disvolvi aktivan ideologian batalon en la Partio kaj tiamaniere fari la partian vivon vigloplena;

(5) akcepti novajn membrojn en la Partion, efektiviigi disciplinon de la Partio, konstante ordigi la partiajn organizojn, elimini malfreŝaĵon kaj enpreni freŝaĵon, kaj tiel konservi purecon de la partia vicaro.

Strikte Sekvi Prezidanton

Maŭ Signifas Venkon

LA Novaĵ-komuniko de la 14-a de aprilo publikita de la Sekretariejo de la Prezidantaro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio disportigis per la ruĝa radio en ĉiujn lokojn de la tuta lando. La revoluciaj sanktejoj Ŝaŭŝan, Ginggang-montaro, Zunĵi kaj Janan ekbolis en ĝojo. La vastaj revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj tuj okazigis celebrajn mitingojn kaj paradojn varme huraante, ke tiu ĉi kongreso estas kongreso de solidareco, venko kaj ĵurado por batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn. Ili retrorigardis la brilan batalan vojon de venko al venko traŭritan de la ĉina revolucio sub la gvido de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio, propramane kreita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj diris kun senkompare forta emocio: “Strikte sekvi Prezidanton Maŭ signifas venkon!”

ŜAŬŜAN

Kiam la Novaĵ-komuniko de la 14-a de aprilo de la Sekretariejo de la Prezidantaro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio venis al la loko, kie leviĝis la ruĝa suno, la heroaj gefiloj de Ŝaŭŝan amase venis antaŭ la iaman loĝejon de Prezidanto Maŭ kaj okazigis tie grandiozan mitingon kaj paradon. Kun arda revolucia entuziasmo, ili laŭte kantis “Grandaj estas la ĉielo kaj la tero, sed pli granda estas la dankinda bonfaro de la Partio, karaj estas la gepatroj, sed pli kara estas Prezidanto Maŭ”, foj-refoje entuziasme ĝojkriis: “Vivu la venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio!” “Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!” “Vivu la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!” “Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” Kaj Maŭ Jongming, malriĉkamparano de Ŝaŭŝen-brigado, tuj verkis popolkanton, kiu elmontras la emociĝon de la popolo de Ŝaŭŝan:

*La Novaĵ-komuniko jen al nia loko venas,
La kor’ de ŝaŭŝan-anoj tute ĝojoplenas.
Ĝi diras tion, kio estas en nia koro,
Kaj ĝiaj vortoj brilas kiel la pura oro.
La direkton al ni montras nia Prezidanto,
Antaŭenmarŝas ni per paŝoj de giganto.*

Aŭdinte ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris ekstreme gravan paroladon ĉe la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, kompartiano kaj membro de la antaŭa Ligo de Geknaboj Maŭ Zajsuj, kiu revoluciadis sekvante Prezidanton Maŭ, kaj kompartiano kaj membro de la antaŭa Kamparana Memdefenda Taĉmento Maŭ Kiangi tre emociiĝis. Ili diris: La revolucia fajro en Ŝaŭŝan estis propramane bruligita de Prezidanto Maŭ kaj la partia filio de Ŝaŭŝan estis propramane kreita de Prezidanto Maŭ. En la pasintaj pli ol kvardek jaroj, la partia filio de Ŝaŭŝan strikte sekvis Prezidanton Maŭ kaj akiris unun post alia kolosajn venkojn. Ĝuste kiel la Novaĵ-komuniko de la Naŭa Kongreso montris al ni: “Nur komprenante la historion de la Partio, ni povas kompreni, kiel Prezidanto Maŭ heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismom, kaj kompreni la grandecon de Prezidanto Maŭ, la grandecon de Maŭzedongpenso kaj la ĝustecon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.” Ni nepre devas bone studi la historion de la Partio, vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpensom kaj ĉiam strikte sekvante Prezidanton Maŭ konduki revolucion dum la tuta vivo, prenante Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon!

Malriĉkamparanoj-komunumanoj Maŭ Hiaŝeng kaj Tang Ĵujjen, kiuj estis feliĉe akceptitaj de Prezidanto Maŭ kun varma prizorgo en 1959, rememoris la feliĉajn travivaĵojn en la 26-a de junio, 1959, kiam Prezidanto Maŭ revenis al Ŝaŭŝan, persone

Kiam la eksterordinara ĝojiga informo pri la solena inaŭguro de la 9-a Kongreso de la Partio sub la prezido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ venas al Ŝaŭŝan, la loko kie leviĝis la ruĝa suno, la vastaj revoluciaj amasoj venas al la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ por milfoje kaj milfoje prikanti la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenkan Maŭzedongpenŝon.



vizitis ilian hejmon kaj estis fotita kune kun ili. Ili tuj okazigis samnokte kunsidon de la familianoj en la ĉefa ĉambro, kie Prezidanto Maŭ intime interparolis kun ili, kaj varme laŭdis la grandajn meritojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la grandajn venkojn akiritajn de la ĉiamvenka Maŭzedongpenŝo kaj la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Liu Hiuhua, vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de Ŝaŭŝan-distrikto kaj vicsekretario de la partia filio de Ŝaŭŝan-brigado diris emocie: "Kaj la glora batala historio de nia Partio kaj la historio de la kreskado de la partia filio de nia brigado ambaŭ pruvis la grandan veron, ke strikte sekvi Prezidanton Maŭ signifas venkon! Ni firme decidis ĉiam bone memori tiun ĉi grandan veron, strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, plenaryplekse efektiviĝi la sinsekvajn plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la diversajn proletarajn politikojn, fari bone batalon, kritikon kaj reformon en la kampano, pliapaŝe levi novan altan tajdon de la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenŝo, levi novan altan tajdon de tenado de la revolucio, stimulado de la produkto kaj aliaj laboroj kaj preparado kontraŭ milito kaj konstrui la partian filion de nia brigado ankoraŭ pli firma kaj vivecplena.

GINGGANG-MONTARO

Kiam la Novaĵ-komuniko de la Naŭa Kongreso de la Partio atingis Ginggaŝang-montaron, kie nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ propramane kreis malnovan revolucian bazlokon, la tieaj armeoj kaj popolo bolis en ĝojo. Veteranaj batalantoj de la Ruĝa Armeo, veteranaj membroj de la Ruĝa Gvardio, veteranaj membroj de la Ribela Taĉmento kaj junaj revoluciuloj, ĉiuj tenante revolucian trezoran libron de Prezidanto Maŭ kaj kun ruĝa koro sin turnanta al Pekino, varme laŭdis, ke la Naŭa Kongreso de la Partio estas kongreso de solidareco, kongreso de venko kaj kongreso de ĵurado por batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en la tuta lando.

La membroj de la Revolucia Komitato de Ginggaŝang-montaro kaj vastaj revoluciaj amasoj venis tuj en la nokto al Ciping, la centro de Ginggaŝang-montaro, en la Memorigano Halon pri la Fondo de la Revolucia Bazloko de Ginggaŝang-montaro Fare de Prezidanto Maŭ kaj retrorigardis la historion de la batalo en Ginggaŝang-montaro. Ju pli ili studas tiun historion, des pli arde ili amas Prezidanton Maŭ. Rememorante la batalon ĉe Ginggaŝang-montaro, multaj maljunaj kamaradoj diris emocie: La ruĝa standardo ĉe Ginggaŝang-montaro estis propramane levita de Prezidanto Maŭ kaj la

vojo de Gínggang-montaro estis persone elhakita de Prezidanto Maŭ. Hodiaŭ, la ruĝaj standardoj de Gínggang-montaro flirtas tra la tuta lando; ja ĉiuj meritoj devas atribuiĝi al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Ĝang Tianlin, la ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Gínggang-montaro, kiu dufoje feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, diris emocie: “Ho, Prezidanto Maŭ! Ho, Prezidanto Maŭ! Foliumante la historion de la ĉina proletara revolucio, oni tuj vidas, ke ĉiu el ĝiaj paĝoj brilas per Via granda penso kaj ĉiu venko estis gajnita sub Via persona gvido. Vi estas la savanto de la popolo kaj la stiristo de la revolucio. Ni, popolo de Gínggang-montaro, por ĉiam restos fidelaj al Vi kaj ne ŝanĝiĝos nia volo eĉ post kiam sekiĝos la maroj kaj putriĝos la rokoj.”

En Daging-vilaĝo, kie iam loĝis Prezidanto Maŭ, la revoluciaj amasoj kolektiĝis en la sama nokto antaŭ la iama loĝejo de Prezidanto Maŭ por okazigi festan mitingon. Ili diris: “El la travivaĵoj ni komprenas plej profunde, ke kiam ni strikte sekvas Prezidanton Maŭ, la revolucio venkas.” Post la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ sin trovas du ĉiamverdaj arboj. En la pasinteco, kiam la popo-

lanoj de Daging vidis ilin en la tagoj de blanka teroro, ili tuj ekmemoris Prezidanton Maŭ. Post la mitingo en la nokto de la 14-a, la popolanoj de Daging denove venis sub la arbojn por zorge ilin flegi kaj tiamaniere esprimi sian profundan proletaran sentimenton de senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La komandantoj kaj batalantoj de la kvara roto de iu PLA-trupo, kiuj plenumas taskon de subteno al industrio, subteno al agrikulturo kaj subteno al la maldekstruloj kaj milita kontrolado kaj milit-politika trejnado, tuj en la sama nokto post la informiĝo okazigis antaŭ la iama loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ciping poemdeklaman kunvenon kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ĉiuj laŭte kantis *Ruĝas la Oriento* kaj la versojn:

*De Gínggang-mont' fontas senfine la rivero,
Komitatano Maŭ nin amas kun gepatra koro,
Kaj gvidis en revolucio la popolon,
Povruoj gajnis liberiĝon kaj regpovon.*

Frue en la sekvinta mateno, ili marŝis renkonte al la leviĝanta suno, laŭ la vojo antaŭe irita de

Vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de Zaiĵuan-a Popola Komunumo en Jan-an kaj antaŭa gerilano Lej Ĝifu (meze en la fronto) lernas kune kun junaj fiksloĝantaj intelektuloj el Pekino, celante heredigi de generacio al generacio la revoluciajn tradiciojn de Jan-an persone flegitajn de Prezidanto Maŭ.



Prezidanto Maŭ kaj laŭ la spuroj de la veterana generacio de ruĝarmeanoj, transgrimpis montegon post montego, travadis torentan riveron post rivero, kaj venis al la kvin grandaj pasejoj por informi al ĉiuj familioj de Gingga-montaro pri la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj la Novaĵ-komuniko de la Naŭa Kongreso.

ZUNJI

Kiam la dua Novaĵ-komuniko de la Naŭa Kongreso de la Partio atingis la faman historian urbon Zunji, tiu monta urbo tuj ekbolis. Apenaŭ finiĝis la disaŭdigo de tiu komuniko, la heroaj gefiloj de Zunji, senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj plenaj de arda revolucia etoso, tuj al stratoj torentis kvazaŭ printempa tajdo, de Ponto por Bonvenigi Ruĝarmeon, tra kiu Prezidanto Maŭ gvidis la Laborist-Kampanan Ruĝan Armeon enmarŝi la urbon, kaj de la Feliĉa Strateto ĉe kiu antaŭe Prezidanto Maŭ loĝis dum sia restado en tiu urbo, svingante la ruĝe brilantan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, varme aklamis, ke la Novaĵ-komuniko diskonigis la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ, ke la Kongreso aprobis la politikan raporton faritan de kamarado Lin Biaŭ sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ, kaj ke la Kongreso unuanime aprobis la Statuton de la Komunista Partio de

Ĉinio. Ili varme ĝojkriadis: “Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!”

La heroaj gefiloj de Zunji tuj komencis studadon. Ili retrorigardis la 48-jaran bataladon kondukitan de la Partio, retrorigardis la historion de la batalo inter la du linioj en la Partio, kaj rememoris precipe la Zunji-kunvenon kun granda historia signifo, kiu starigis la ĝustan gvidon de la Centra Komitato de la Partio kun la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel la estro, kaj post kiu la ĉina revolucio marŝis de venko al venko. Ili diris kun nekomparebla emocio: “Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Estas Via brila penso kaj Via proletara revolucia linio, kiuj gvidas nin en la senĉesa antaŭenmarŝo. De la 48-jara batalado kondukita de la Partio kaj de la historio de la batalo inter la du linioj en la Partio ni akiris pli firman kredon al la vero, ke strikte sekvi Vin signifas venkon.”

La veterana ruĝarmeano Ni Ĝongĝen, deveninta de jardungito, kiu glorie aliĝis al la Partio en la Aŭtunikolta Ribelo, retrorigardis la revolucion bataladon de pli ol kvardek jaroj, en kiu li sekvis Prezidanton Maŭ fari revolucion, kaj diris kun profunda kompreno: “La historio de nia Partio estas ĝuste tiu de la senĉesa venkado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ super la linioj de ‘maldeks-

En Zunji, la fama urbo en la revolucia historio, pli ol cent mil revoluciaj popoloj varme celebras, kantante kaj dancante antaŭ la domo, kie okazis Zunji-konveno, la inaŭguron de la 9-a Kongreso de la Partio, kiu havas grandan historian signifon.





Maljuna kompartiano Zoŭ Venkaj, kiu estis siatempe estro de ribela taĉmento sur Ginggang-montaro, rakontas al junaj intelektuloj aniĝintaj al produkta grupo en Daging pri la granda revolucia praktikado de Prezidanto Maŭ sur Ginggang-montaro kaj instigas la gejunulojn ĉiam fideli al Prezidanto Maŭ kaj revolucii por la tuta vivo.

tra' kaj dekstra oportunismo. Tio, ke la nova Statuto de la Partio aprobita de la Naŭa Kongreso klare difinis, ke la teoria bazo orientanta la penson de la Partio estas Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj ke Vicprezidanto Lin estas la daŭriganto de Prezidanto Maŭ, estas nia plej granda deziro kaj ankaŭ la plej granda feliĉo por ĉiuj niaj venontaj generacioj." Lastatempe, nombro da batalantoj de la trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo garnizonanta en Zunji glorie aliĝis al la Partio post la hardado kaj provado de la Granda Proletara Kultura Revolucio. Tiuj viveplenaj novaj partianoj venis al la kunveno kie okazis la Zunji-kunveno, kolektiĝis antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ kaj ĵuris solene: Ni ĉiam prenas Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon, alte tenadas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, studas la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas liajn vortojn, agas laŭ liaj instrukcioj por esti liaj bonaj batalantoj.

JAN-AN

Kiam la Novaĵ-komuniko de la Naŭa Kongreso de la Partio atingis Jan-an, en la tuta urbo ekton-

dris tamburado kaj tamtamado, sonora kantado de *Ruĝas la Oriento* eĥadis super Janhe-rivero, kaj la jan-an-aj gefiloj senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ torentis sur la stratojn kun senkompara emocio por okazigi grandiozan mitingon kaj paradon.

En la duoble ĝojigaj tagoj, la armeo kaj popolo de Jan-an kolektiĝis por foje kaj refoje studi la Novaĵ-komunikon de la Naŭa Kongreso.

La veteranaj ruĝgvardianoj kaj ruĝarmeoj kaj vastaj revoluciaj popolamasoj de Zaŭjuanbrigado kaj Janggialing-brigado okazigis kunsidojn kaj kunvenojn por interŝanĝi sperton en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en kiuj ili rememoris la historion de la Partio en ligo kun siaj propraj travivaĵoj. Kun senkompara respektemo ili varme laŭdis, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ genie, kreive kaj plenkamplekse heredis, defendis kaj disvolvis Marksismon-Leninismon, kaj varme laŭdis la grandecon de Prezidanto Maŭ, la grandecon de Maŭzedongpenso kaj la saĝecon kaj ĝustecon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ĝang Buven, respondeculo de la revolucia gvida grupo de Zaŭjuan-brigado, diris kun plena emocio:

“De jardekoj ni jan-an-aj popolanoj strikte sekvas Prezidanton Maŭ fari revolucion kaj marŝi de venko al venko. Ni profunde komprenas, ke Vicprezidanto Lin diris tute prave, ke ‘Prezidanto Maŭ estas la plej eminenta gvidanto de la proletaro kaj la plej granda geniulo en la nuna erao’. Ni gefiloj de Jan-an, senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, nepre ĉiam studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, ĉiam iros la vojon de li montritan kaj ĉiam faros revolucion lin sekvante.” Veterana ruĝgardiano Jang Zajĝong diris, ke la brilaj verkoj skribitaj de Prezidanto Maŭ en kaverndomo de Jan-an lumigis por la tuta Partio kaj tuta popolo la vojon de venko al venko. La granda Maŭzedongpenso estas la animo de la revolucio de la proletaro kaj la laboranta popolo. La Statuto de la Komunista Partio de Ĉinio aprobita de la Naŭa Kongreso denove klare difinis, ke la teoria bazo kiu orientas la penson de la Partio estas Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj samtempe klare difinis, ke kamarado Lin Biaŭ, kiu alte tenas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, estas la daŭriganto de Prezidanto Maŭ. Tio ĉi estas la komuna deziro de la tuta popolo. De dekoj da jaroj, ni jan-an-a popolo revoluciis sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj kreskas nutrate de la sunbrilo kaj pluvo de Maŭzedongpenso.

Membroj de la partia filio de la Tria Maŝin-pafla Roto de iu trupo de PLA plenumanta la taskon de subtenado al la maldekstruloj en Jan-an iris al la tiama kunveno de la Sepa Kongreso de la Partio — la Halo de la Centra Komitato ĉe Jangĝialing, kaj tie en ligo kun la studado de la Novaĵ-komuniko ili restudis la brillan raporton faritan de Prezidanto Maŭ ĉe la Sepa Kongreso de la Partio. Politika direktanto Ma Ĉengĝuj diris emocie: “Antaŭ pli ol dudek jaroj, nia granda Partio kunvokis sian Sepan Kongreson sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ. Sub la direktado de la ĝusta linio de la Sepa Kongreso de la Partio, la popolo de la tuta lando plenumis la grandan historian taskon venki la japanajn agresantojn kaj konstrui novan Ĉinion. Hodiaŭ, en la momento, kiam la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ akiris grandan venkon, estis kunvokita la Naŭa Kongreso de la Partio. Ni firme kredas, ke sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, respondante al la granda alvoko elmetita de Prezidanto Maŭ ‘akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn post la Kongreso’, la armeo kaj popolo de la tuta lando certe akiros brillajn venkojn sur ĉiuj batalfrontoj.”

SUKCESO ATINGITA EN PROV-FANDO DE MIKROKARBONA PURA FERRO PER ELEKTROARKA FORNO

Sinapogante sur la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, kun brava batalspirito ke **“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion.”** en kunlaborado kun diversaj frataj fabrikoj kaj en efektivigo de “triflanka kombiĝo” kun la organizoj de esploro kaj de apliko, la revoluciaj laboristoj de Ŝanhaja Ĝenerala Maŝin-riparejo sukcesis unuafoje provfandi mikrokarbonan puran feron per la elektroarka forno, kaj per tio ili faris alian kontribuon al disvolvo de la metalurgia industrio.

Pura fero estas tre bona materialo uzata en elektra inĝenierado kaj ĝia elektromagnetisma kvalito evidente pliboniĝas kun reduktiĝo de enteno de iuj elementoj speciale de karbono. La sukcesa provfando de la mikrokarbona pura fero havigis gravajn kondiĉojn al la disvolvo de nia industrio de elektroniko kaj telekomuniko. Tia pura fero posedas la proprecon de rezisto kontraŭ korodo de hidrogeno kaj nitrogeno. Sub certaj kondiĉoj ĝi povas anstataŭi la rustimunon ŝtalon de la tipo de acidorezista nikromo. Tial ĝia sukceso en provfando ankaŭ malfermis novan vojon por fabriki kemisterkan ekipaĵon kaj disvolvi kemian industrion de nia lando.



Senfinan Dankon Ŝuldas Ni al la Partio

HE KINGLIN (ĝŭang-o)

*Ho, flor' kaj te' de ĝŭang-nacio!
Jen floroj ruĝas, te' aromas en mil familioj.
Ho, kant' kaj danc' de riĉrikolto
De ĝŭang-nacio disfamiĝis tra l' patrio.*

*Antaŭe l' ĝŭang-oj suferadis en mizer' senfunda,
De praaj patroj ni vivaĉis en montar' profunda.
La litkovriloj niaj — herbaj, niaj vestoj — arbofoliaj,
Nenia teo, nur sovaĝlegomo por stomakoj niaj.*

*Hodiaŭ nia vivo estas jam pentrinde bela,
Ĝi estas tiel dolĉa kiel te' miela;
La montojn plene kovras bovoj, ŝafoj kaj tearbetaroj,
Ĉirkaŭe de l' vilaĝoj kreskas riĉaj grenplantaĵoj.*

*Ekfulmotondris la kultur-revolucio,
Leviĝis maten-suno kun dek mil radioj.
Maŭzedongpenso disbriladas kiel oro
Kaj ĉie ruĝas floroj de l' afer' BKR*.*

*Ni feste kantas, dancas kun pasio,
Tostadas per aroma teo pro l' Kongres' N-ro Naŭ;
Mil bondezirojn al savanto Prezidanto Maŭ!
Kun am' senfina dankas ni al la Partio!*

* BKR — mallongigo de batalo, kritiko kaj reformo.

La Koro de Batalantoj de Ĝenbaŭ-insul' Sin Turnas Ĉiam al Pekino

CUJ JALIN (limgardanta batalanto ĉe Vusuli-rivero)

*Samkiel primavera tondro en ĉielo,
Jen venas eksterordinara ĝoj-informo al la landlim-sfero,
Flirtadas dance ruĝaj flagoj sur la bord' de Vusuli-rivero,
Kaj laŭdaj kantoj laŭte sonas en l' aero.*

*La koro de Ĝenbaŭ-gardant' sin turnas ĉiam al Pekino,
Sunflore ni nin ĉiam turnas al la Kompartio,
La batalantoj ĉiam restas tre fidelaj al Prezidanto Maŭ,
Kaj varman sangon ni volonte verŝos por defendi l' limojn de l' patrio.*

*L' okulojn ni direktas al Pekino je l' kongresa ĝoja horo,
La ruĝan sunon sopiradas nia koro.
Fidelon sian montras batalantoj ĉe Vusuli-rivero:
Longegas nia limdefenda Granda Mur' el fero!*

Aklamo al la Naŭa Kongreso de la Partio

DU ĈONGGUANG (nankina laboristo)

*Brilruĝaj standardoj flirtadas hurae,
La teron orumas la suno tut-trae.*

*Jen Jangzi-rivero kaj l' Flava Rivero ĝoj-ondojn agitas,
La Naŭan Kongreson Prezidanto Maŭ prezidas!*

*La koro ĝojplena fervore tamburas,
Kaj varmaj larmperloj survange sin rulas.*

*En ruĝo superba l' ĉielo nun brilas,
Pro l' Naŭa Kongres' la popolo jubilas.*

*Impetaj fajfegoj alvokas al ni —
Antaŭen-saltegas produkto kaj revoluci'.*

*Per kontribuajfoj ni festu l' Kongreson N-ron Naŭ,
Ni laboristar' plej obeas Prezidanton Maŭ.*

*La grandan kulturaran revolucion ĝisfine ni faru,
Kaj la ŝtatpotencon por ĉiam tenadu la proletaro.*



Sub la kuraĝigo de la 9-a Kongreso de la Partio, la batalspirtio de niaj lingardaj batalantoj, kiuj gardas kontraŭreviziisman antaŭpostenon en la regiono de Ĝenbaŭ-insulo, fariĝas pli alta, kaj ili pretas en ĉiu momento frakasi novajn provokojn de la social-imperiismo de sovetunia reviziismo por ĝismorte defendi ĉiun colon da sankta teritorio de la patrolando.

Centmilionoj da Armeanoj kaj Popolanoj Varme Festas la Grandan Venkon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

Diversnaciaj popolanoj ĝojkrias kaj kantadas kun arda entuziasmo. Miloj kaj miloj da kantoj alte sonas por deziri senlime longan vivon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!



Jubilas la montoj kaj ĝojridas arbaras




la maroj; ruĝflagoj kaj ondegas kantoj



La eksterordinare granda ĝojiga informo pri la inaŭguro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, sub la persona prezidado de nia plej estimata kaj amata prezidanto Maŭ, trablovas kiel orienta venton nian tutan belan patrolandon kaj sonas potence kvazaŭ tertremiga printempa tondro. Kun forte batanta koro plena de ĝojo kaj entuziasmo, centmilionoj da niaj armeanoj kaj popoloj okazigis grandiozajn solenojn por ĝin celebri kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Sub kuraĝigo de tiu ĝojiga informo pri venka okazigo de la Naŭa Kongreso de la Partio, la vastaj armeo kaj popolo de nia tuta lando pli firme unuiĝas ĉirkaŭ nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, alte levas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpensio, pli bone vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpensio, kun firma decido plene efektivas la grandan strategian orientilon de Prezidanto Maŭ "sin prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj servi al la popolo" per praktikaj agadoj, levis senprecedence grandskalan novan altartajdon "teni revolucion, stimuli produkton kaj aliajn laborojn kaj preparadon kontraŭ milito" kaj batalas por akiri novajn venkojn en revolucio kaj produkto.

Senfinaj kolonoj de revoluciaj amasoj de nia ĉefurbo pasas antaŭ la pordego Tian-anmen.



(Supre) Ĉefurbaj laboristoj aklamas la grandan venkon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Kampanoj de antaŭurbo de Pekino ĝojkrias kun arda koro en kampo: "Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu Prezidanto Maŭ!"





Kolonoj de komandan-
toj kaj batalantoj de
la granda Ĉina Popola
Liberiga Armeo en
marŝado por celebri la
Naŭan Kongreson



Nacimalplimultaj stu-
dentoj en Pekino pro-
pagandas Maŭzedong-
penson surstrate.



Komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo serioze studas la Novaj-komunikon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.


► Kun ruĝa koro varme amanta la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, laboristoj pretigas trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ en alta kvalito.

▼ Revolucia amaso de Ŝanhajo faras surstrate literaturajn kaj artajn prezentojn por festi la Naŭan Kongreson.





Dokistoj festas la Naŭan Kongreson per siaj elstaraj atingoj en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produktado.



zedongpenso!” skuadis la tutan Vanda-valon kaj ŝvebis super la bordoj de Vusuli-rivero.

Ricevinte la eksterordinare grandan ĝojigan novaĵon, la diversnivelaj gvidantaj kadroj de niaj limgardaj trupoj tuj transportis ĝin kiel eble plej rapide al la kazernoj kaj gvatejoj, transgrim-pinte montojn en nokto. Por ke ĉiu kamarado ricevu la ekstreme grandan ĝojigan novaĵon kiel eble plej rapide, Vang Ĝongliang, direktanto de iu trupo, tuj ĝin transdiris al la limgardaj batalantoj plenumantaj taskon, apenaŭ li finregistris la disaŭdigitan Komunikon pri la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso. Aŭdinte la eksterordinare grandan ĝojigan novaĵon, la batalantoj forte ekscitiĝis, tuj sidiĝis en rondoj sur la neĝkovrita tero kaj okazigis kunsidojn tenante la ruĝan trezoran libron por entuziasme laŭdi la altajn meritojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la grandan venkon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kiam la batalantoj de iu trupo plenumanta sian taskon en arbaroj de Vanda-monto aŭdis la ĝojigan novaĵon pri la inaŭguro de la Naŭa

Batalantoj de ĈPLA garnizonantaj en Pekino varme krias kun la Novaĵ-komuniko en la manoj: “Vivu la venko de la 9-a Kongreso de la Partio!” “Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”



Kongreso persone prezidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili laŭte kriis kun senkompara ĝojo: “Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” “Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!” Tuj poste ili transdiris la eksterordinare grandan ĝojigan novaĵon al la loĝantoj por dividi ĝustatempe kun ili tiun plej grandan feliĉon.

Kiam la eksterordinare granda ĝojiga novaĵo alvenis al Hutoŭ kaj Ĵaŭhe, la vastaj amasoj de la tieaj armeanoj kaj popolanoj tuj kolektiĝis en nokto por celebri ĝin per mitingo kaj parado, ili ĝoje aranĝis iluminaĵojn kaj gaje svarmis al la stratoj. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la distrikto de akvoproduktaĵoj de Ĵaŭhe, kiuj plurfoje heroe batalis kontraŭ la entrudiĝintaj provokantoj de sovetunia reviziismo ĉe Ĝenbaŭ-insulo kaj Kilikin-insulo, ĝojkriadis kaj kantadis en la paradaj kolonoj portante kolosajn portretojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj tenante la ruĝan revolucionan trezoran libron en la mano. La heroaj limgardaj batalantoj, kiuj faris multe meritajn kontribuojn en bataloj por defendo de la sankta teritorio de la patrolando, diris kun forta emocio: “La kunvoko de la Naŭa Kongreso estas eksterordinara granda ĝojiga afero en la politika vivo de nia lando, brila paĝo en la historio de nia partio kaj peza bato al imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj.”

Dum la ĝoja aklamado al la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso, la vastaj amasoj de la armeanoj kaj popolanoj tre ekzaltiĝis, kiam ili ekmemoris la venkon akiritan de ili en la memdefenda rebatado al la armita provoko fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Ili esprimis unuanime sian volon: Ho Prezidanto Maŭ! Ho Prezidanto Maŭ! Viaj senlime fidelaj gefiloj ĉe la landlimo ĉiam Vin sekvados, certe laŭ Via granda instruo ke “la ĉina popolo nepre devas defendi la suverenecon de la ĉina teritorio kaj neniel permesas al iu ajn fremdlanda registaro ĝin atenci” konstruos la limareon de la granda socialisma patrio en nedetruoblan feran muregon, kun pioĉo en unu mano kaj fusilo en la alia, centoble plialtigos sian singardemon kaj estos ĉiam pretaj por frakasi armitajn provokojn fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj defendi la sanktan teritorion de la granda socialisma patrio.



Armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo celebras la venkan inaŭguron de la 9-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kiu havas grandan historian signifon.

LA GEFILOJ DE LI-NACIO ĈIAM RESTOS FIDELAJ AL PREZIDANTO MAŬ

Kiam la eksterordinare granda ĝojiga novaĵo pri la solena inaŭguro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio atingis la bordon de la Suda Maro, tuj en ĝojo ekbolis la li-nacia vilaĝo de Lauĉang-brigado de Timong-komunumo de Lingŝuj-gubernio de la Hajnan-a Li- kaj Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco. La ĝojkrioj "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" disflugis super la kokosbarojn. La revoluciaj amasoj kaj la komandantoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo ĝoje kunvenis kaj entuziasme laŭdis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Rigardante kun respekto la alte pendantan portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, li-nacia avo Dong Venda senkompare emociiĝis. En la malnova socio, ĝuste tiuloke lia familio de generacio al generacio laboris kiel ŝarĝbrutoj por la kruela granda bienulo Suda Tirano. Kaj ĝuste tiuloke li vidis propraokule, ke lia patro estis al morto pelita fare de la Suda Tirano per urĝa pagigo de rento kaj ke multaj li-naciaj familioj bankrotis

kaj suferis morton de familianoj. La granda savanto Prezidanto Maŭ alsendis la karan Liberigan Armeon kaj de tiam briladas super la li-vilaĝoj la ruĝa suno. Je la feliĉaj tagoj de ĝoja festado de la inaŭguro de la Naŭa Kongreso de la Partio, li petis membron de la PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso helpi lin en verkado de poemo por esprimi lian profundan proletaran sentimenton de senlima amo kaj senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Verkinte la poemon, li ĝin foje kaj refoje laŭlegis:

*La tuta lando festas la Kongreson Naŭan,
Jen ruĝas floroj en kokos-vilaĝoj de la li-naci'.
Ni ĉiam strikte sekvos Prezidanton Maŭ,
Kaj ruĝajn flagojn ni starigos tra la mond'.
Ho Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ,
Gefiloj li-naciaj ĉiam restos al vi en fidel'!*

Altas Vuĝi-monto, sed ĝi ne tiom altas kiom la merito de Prezidanto Maŭ; profundas la Suda Maro, sed ĝi ne tiom profundas kiom la kore dankinda bonfaro de Prezidanto Maŭ al ni. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de li-nacio terkulturis primitive, sed nun jam tion



Diversnaciaj popolanoj en Huhehoto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kiuj troviĝas ĉe la kontraŭreviziisma fronto, solene kunvenas por varme celebri la grandan venkon de la 9-a Kongreso de la Partio.

faras per traktoroj kaj ŝanĝis siajn hejmlokojn kun kalvaj montoj kaj malutilaj torentoj en abundajn produktojn de fiŝoj kaj rizo — ĉio ĉi tio estas venko akirita de ni dank' al firma sekvado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

LA KAZAĤAJ PAŜTISTOJ FIRME SEKVADOS PREZIDANTON MAŬ DE GENERACIO AL GENERACIO

La ĝojiga informo pri la solena inaŭguro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio disflugis, kvazaŭ orienta vento, tra la stepo ĉe la supera parto de Jili-rivero kaj plenigis la korojn de la kazaĥaj paŝtistoj per ĝojo. En kaj ekster la peltaj loĝejoj kaj ĉe la fiksloĝaj punktoj, ĉie eksonis la ĝojkrioj: “Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” “Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!”

Vespere de la unua de aprilo, en la gener-ŝafbredejo de Kunes, kiu estas produkto de delikatlanaj ŝafoj de nia Hingiang-regiono, la komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo laborantaj en tiu bredejo, kazaĥaj kadroj kaj vastaj amasoj de kazaĥaj paŝtistoj foje kaj refoje aŭskul-

tis la ĝojigan novaĵon pri la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso sidante ĉirkaŭ radiofonoj, vorton post vorto registris la novaĵ-komunikon pri la inaŭguro de la Naŭa Kongreso kaj presis tiun eksterordinare grandan ĝojigan novaĵon en la sama nokto. La sekvintan matenon, apenaŭ leviĝis la suno, ili jam saltis sur fortajn ĉevalojn, rajdis al la paŝtejoj kaj disdonis la novaĵ-komunikon al la paŝtistoj, kiuj okupiĝis pri akuŝado de ŝafidoj. En palpebrumo, la ĝojiga novaĵo pri la inaŭguro de la Naŭa Kongreso jam disportiĝis tra la tuta vasta printempa paŝtejo.

Aŭdinte la ĝojigan novaĵon, la kazaĥaj paŝtistoj senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, tuj rajdis ĝoje kaj viposvingante al la centro de la paŝtejo, kun ore brilantaj insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ sur la brusto, alte tenante portretojn de Prezidanto Maŭ propramane broditajn de ili kaj portante ruĝan librosaketon kun *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, por grandioza celebra mitingo. Akompanate de gaja domra muziko, ili ĝoje dancis kaj laŭte deziradis senlime longan vivon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

La ruĝaj floroj sur la stepo povas disflori nur post ricevo de sunlumo kaj pluvo; la kazaĥoj povis liberiĝi nur dank' al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la feliĉa momento, la kazaĥaj paŝtistoj sopiradis al Prezidanto Maŭ, la granda savanto de ĉiuj niaj nacioj. Inter la ĝojaj dancantoj, plej fervore dancis la eminenta paŝtisto-komunisto Abdeuali. Kun emociaj larmoj en la okuloj li diris en senlime profunda sentimento: "Ho Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Vi estas la granda savanto de ni kazaĥaj paŝtistoj, Vi estas la ruĝa suno en nia koro. Estas Vi, kiu savis nin de sub la skurĝoj de la riĉuloj, havigis al ni feliĉan vivon kaj faris nin mastroj de la ŝtato. Estas la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Vi, kiu firmigis la proletaran diktaturon kaj ebligis al ni malriĉaj kazaĥaj paŝtistoj firme teni la regpotencon sur la stepo. La steloj ĉe la ĉielo ĉiam sin direktas al la polusstelo kaj la heliantoj sur la tero ĉiam sin turnas al la suno. Ni kazaĥaj paŝtistoj brave marŝos antaŭen laŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, firme sekvante Prezidanton Maŭ de generacio al generacio!

LA MONGOLAJ PAŜTISTOJ SENLIME AMAS PREZIDANTON MAŬ

Malfermiĝis la Naŭa Kongreso de la Partio! La eksterordinare granda ĝojiga novaĵo disportiĝis tra la vasta stepo de Interna Mongolio. Kien alvenis la ĝojiga novaĵo, tie tuj ekbolis ĝojo.

Jam estis profunda nokto. En la tendo de malriĉa paŝtisto avo Batr hele brilis lampo kaj sonoritis bela muziko de korda instrumento. En la muziko ludata de la maljunulo per ĉevalkapa huĉino* la tuta familio varme festis la inaŭguron de la Naŭa Kongreso. Tri batalantoj el limgarda trupo de la Popola Liberiga Armeo, tien alvenintaj en sia patrolado, festis, kantadis, ĝojkriis kaj unuvoĉe deziris longan longan vivon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kune kun la familio de la maljuna avo.

La avino de tiu familio rigardadis la portreton de Prezidanto Maŭ kaj emociiĝis ĝis larmoj. Ŝi diris al la limgardaj batalantoj: "Knaboj, en la malnova socio, brutposedanta mastro bate mortigis mian patron, kiu servadis kiel sklavo dum sia tuta vivo, kaj mia patrino devis iri paŝti ŝafojn devigate de la malica mastrino, akuŝinte min sur amaso de bovfekaĵoj kaj ankoraŭ ne bone vindinte min. Apenaŭ mi scipovis ion fari, mi jam fariĝis sklavine-to de la brutposedanta mastro. La unua duono de mia vivo pasis en amaro. Estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj savis min sklavinton

el la maro de mizeroj. La dankinda bonfaro de la Partio ja estas pli granda ol la ĉielo aŭ la tero, kaj Prezidanto Maŭ estas pli kara por mi ol la gepatroj!" Kaj poste la avino diris kun ridmieno: "Hodiaŭ, Prezidanto Maŭ persone direktis la kunvokon de la Naŭa Kongreso. Tio ĉi estas kongreso viveplena, solidara, triumfa kaj ankaŭ feliĉiga por ni malriĉaj paŝtistoj. Se ni nur havas Prezidanton Maŭ la ruĝan sunon en la koro de ni paŝtistoj montrantan al ni la vojon kaj se ni nur havas la gvidadon fare de la granda, glora kaj ĝusta Partio de Ĉinio, la popolo de la stepo povos vivi en senfina feliĉo." Tion dirinte, la avino proponis al ĉiuj kanti, kaj sekve eksonoris *Ruĝas la Oriento* en la tendo.

Aŭskultinte la rakonton de la avino pri la amaroj en la malnova socio kaj la nunaj dolĉoj dum festado de la Naŭa Kongreso, la limgardaj batalantoj tre emociiĝis. Ili diris, ke nur dank' al la saĝa gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ povas esti nia nuna granda socialisma patrio. La novaj caroj de sovetunia reviziismo freneze provokadis kontraŭ ni kaj faris unun post alia damnindajn krimojn. Ni nepre devas centoble plialtigi nian singardemon, "**teni la revolucion, stimuli la produktadon kaj aliajn laborojn kaj pre-paradon kontraŭ milito**", konstrui nian limareon en feran grandan muron kaj ĉiam esti pretaj por frakasi provokojn kaj invadon fare de la sovetunia reviziismo. Aŭskultinte la vortojn de la limgardaj batalantoj, avo Batr metis sian muzikilon, prenis sian ĉaspafilon kaj diris al la batalantoj: "Ni paŝtistoj delonge jam pretiĝis, kaj se la malamiko aŭdacos invadi nian landon, ni tuj ekbatalos ŝultro-ĉe-ŝultre kun vi per tiu ĉi pafilo por ĉasado de lupoj."

La eksterordinare granda ĝojiga novaĵo pri la malfermiĝo de la Naŭa Kongreso alportis kolosan forton al la paŝtistoj sur la stepo. Kun senkompare feliĉa sento la familio de Batr kaj la limgardaj batalantoj kune enpaŝis novan tagon de batalo. Viglanime ili rapidis al siaj batalpostenoj kaj firme decidis brave marŝi antaŭen strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ!

LA RUĜAJ KOROJ DE LA LIBERIGITAJ TIBETAJ KAMPARANOJ ĈIAM SIN TURNAS AL PREZIDANTO MAŬ

En la grandioza festotago pro la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso, same kiel la alia miliono da tibetaj liberigitaj kamparanoj, la liberigitaj kamparanoj de la Kontraŭimperiisma Komunumo en la antaŭurbo de Lhasa dronis en maro de ĝojo.

Diversnaciaj gelaboristoj de la ŝpinteksa fabriko "1-a de Julio" en Hingiang aŭskultas radian dissendon de Novaĵ-komuniko de la 9-a Kongreso de la Partio kun sento de senlima feliĉo kaj deziras al Prezidanto Maŭ longan longan vivon.



Kiam la eksterordinare granda ĝojiga novaĵo alvenis, la pli ol sepcent liberigitaj kamparanoj de tiu komunumo batadis ŝafledajn tamburojn, ludis seskordajn mandolinojn, kaj tenante ruĝan revolucion libron enmane kun koro sin direktanta al Pekino ili laŭte deklamis dirojn de Prezidanto Maŭ, plengorĝe kantis *Ruĝas la Oriento* kaj foj-refoje laŭte deziris longan longan vivon al la granda gvidanto de ĉiuj nacioj Prezidanto Maŭ.

Kun ridmieno kaj tenante per ambaŭ manoj revolucionan trezoran libron de Prezidanto Maŭ, la 52-jara liberigita kamparano Pasangciĝing rigardis portreton de Prezidanto Maŭ kaj laŭte kriis neteneble: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" En la infere malluma malnova socio, tiu ĉi kamparano servadis dum pli ol 30 jaroj kiel sklavo de servutula mastro. Li pene laboradis por bredi brutojn de la servutula mastro, sed vivis eĉ pli mizere ol hundo de la servutula mastro. En la demokratia reformo, li ricevis domon kaj agron. Baldaŭ poste li aliĝis al la Partio kaj fariĝis la unua kompartia membro en la komunumo. En la ĝojplena festotago de la inaŭguro de la Naŭa Kongreso, Pasangciĝing diris

kun emocio: "Ĉiufoje, kiam mi manĝas bon-gustan freŝan zanba**, mi tuj ekmemoras nian bonfaranton Prezidanto Maŭ; ĉiufoje kiam mi ektrinkas orkoloran buteran teon, mi tuj ekpensas pri nia savanto Prezidanto Maŭ. Ho Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Ni certe sekvados Vian grandan instruon "**ne sidu sur malnovaj meritoj sed faru novajn kontribuojn**" kaj ankoraŭ pli bone studos kaj pli bone aplikos Vian brilan penson kune kun la vasta liberigita kamparanaro, por fari niajn kontribuojn en konduko de la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝis la fino.

En kunveno por ĝoje celebri la solenan inaŭguron de la Naŭa Kongreso, liberigitaj kamparanoj de tiu komunumo diris emocie: La dankinda bonfaro de la Partio al ni estas pli granda ol la ĉielo, Prezidanto Maŭ estas pli kara por ni ol la gepatroj. Same kiel la heliantoj kiuj ĉiam sin turnas al la suno, la ruĝaj koroj de la liberigitaj kamparanoj ĉiam sin turnas al Prezidanto Maŭ!

*huĉino: dukorda instrumento ludata per arĉo.

**zanba: kutima manĝaĵo de tibetanoj el sekalfaruno kaj butero en formo de buloj.

Prezidanto Maŭ Ligiĝas kun An- juan-aj Laboristoj Koron kun Koro

AN GONG

ANJUAN — la fonta loko de la laborista movado persone fondita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, travivinte la batalan bapton de la Granda Proletara Kultura Revolucio, montris sin pli vigloplena. Sub nutrado de la sunbrilo de Maŭzedongpenso la laboristoj de Anjuan senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas pli plenaj de entuziasmo kaj batalspirito. Laŭ la grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ “serioze konduki bone batalon, kritikon kaj reformon”, “teni la revolucion, stimuli la produkton”, ili estas brave kaj grandpaŝe marŝantaj antaŭen!

PREZIDANTO MAŬ ESTAS NENIAM SUB- IRONTA RUĜA SUNO EN LA KORON DE ANJUAN-AJ LABORISTOJ

*Je la jaro 1921, sereniĝis
Subite la ĉielo post dispelo de nebulo;
Venis eminentulo Maŭ Ĵunĝi*
De Hunan al Anjuan.*

La heroa laborista klaso de Anjuan neniam forgesos: En aŭtuno de 1921, kiam la mizeraj laboristoj de Anjuan estis en plena sufero, Prezidanto Maŭ venis al ili. De tiam la ruĝa suno neniam subironta leviĝis en la koro de la laboristoj de Anjuan. Sub la direktado de Maŭzedongpenso, ili disvolvis ardan batalon kontraŭ imperiismo, feŭdaj militaristoj kaj kapitalistoj, kaj akiris grandajn venkojn. Post la Liberiĝo, ĉiun fojon kiam novaj laboristoj venis al la minejo, la veteranaj ministoj, kiuj faris bravan batalon kontraŭ la en-kaj ekster-landaj klasaj malamikoj siatempe sub la persona gvido de Prezidanto Maŭ, ĉiam kondukis ilin al domoj kaj lokoj kie restadis Prezidanto Maŭ, kaj ĉeloke rakontis al ili la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ kaj sian senliman fidelon al li, por ke la laboristaro de Anjuan konservu generacion post generacio sian gloran tradicion de senlima fidelo al Prezidanto Maŭ.

Sed, la agentoj de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, laŭ nigra indiko de la lasta, inversigis la historion kaj ekstreme sen-

honte verkis falsan biografion por la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kun vipura intenco por ke la laboristoj de Anjuan forgesu Prezidanton Maŭ. Sed, la revolucia fajrero siatempe farita de Prezidanto Maŭ ĉiam brulas en la koro de la laboristoj de Anjuan; kaj tiuj laboristoj persone edukitaj de Prezidanto Maŭ ĉiam fidelas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĝuste kiam la agentoj de Liu Ŝaŭki kaj plenmano da perfiduloj, spionoj kaj kontraŭrevoluciuloj plengorĝe flatis al la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, la revolucia kadro deveninta de ministro Vang Ĝongming kun senlima fidelo al Prezidanto Maŭ verkis artikolojn, en kiuj li varme prikantis la grandan revolucionan praktikon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en tiama gvido de la revolucia laborista movado de Anjuan. Ĝuste kiam la agentoj de Liu Ŝaŭki, laŭ la nigra indiko de sia mastro, organizis forton por fabriki la nigran filmon *Stepbruliga Fajro* per la uzurpita potenco, la ministro Aŭ Dazong severe demandis al ili: “Kiu estas la de vi priskribita ‘representanto de anjuan-aj laboristoj?’” “Kial vi ne priskribas la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ en Anjuan?” Kiel akraj ponardoj, la rigoraj riproĉoj enpikis iliajn korojn. Sed ili ne volontis akcepti sian fiaskon kaj elmetis la nigran “Memkulturon” por degeneri la laboristojn de Anjuan.

Foje, iu enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon diris al Aŭ Dazong: “Vi estas bona en ĉio krom inklino al kritiko. Nur se vi korektis tion, mi povas rekomendi vin al la Partio.” Dirinte tion, li enmanigis nigran “Memkulturon” al Aŭ Dazong kaj konsilis al li ĝin studi serioze. Vespere Aŭ Dazong malfermis la nigran “Memkulturon” kaj aperis antaŭ liaj okuloj tiuj predikoj kiaj “toleri miskulpigojn senplende”, “toleri ofendojn, porti pezajn ŝarĝojn”, “aliĝi al la Partio por fariĝi estro” k. s. Ju pli li legis, des pli li indignis. Je la sekvinta mateno, li ĵetis la nigran “Memkulturon” al la potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj diris: “Tiu ĉi libro ne taŭgas por ni anjuan-aj laboristoj. Ni volas legi verkojn de Prezidanto Maŭ.”

Tiutempe, plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj en la antaŭa Propaganda Departemento sub la Centra Komitato de KPCĈ, laŭ la nigra direkto de Liu Ŝaŭki, plenenergie bojkotis kaj malhelpis eldonon kaj distribuon de la verkoj de Prezidanto Maŭ, tiel ke la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj ne povis akiri trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ. Por mastri Maŭzedongpenson, spite laciĝon Aŭ Dazong plurfoje piediris pli ol dek liojn al Pinghiang por tie aĉeti verkojn de Prezidanto Maŭ. Post multaj klopodoj li finfine aĉetis kompletan daŭre brilantaj *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. Aŭ Dazong diris kun emocio: “Estas Prezidanto Maŭ kiu savis el mizera abismo min, la suferplenan knabon almozpetintan de strato al strato en la malnova socio, kaj elkulturis min en revolucionan ministron. Mi decidis ĉiutage legi verkojn de Prezidanto Maŭ, ĉiam sekvi Prezidanton Maŭ fari revolucion.”

La laboristoj de Anjuan ĝuste tiel senlime fidelas al Prezidanto Maŭ, varme amas la revoluciajn verkojn de Prezidanto Maŭ. En la argan-kaĝa grupo, kie laboras Aŭ Dazong, en la transporta tereno kaj en la tuta Anjuan-minejo vigle leviĝas amasa movado de viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

LA LABORISTOJ DE ANJUAN ĴURAS DEFENDI PREZIDANTON MAŬ PER SIA VIVO

Kiel la printempa tondro komenciĝis la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Alte tenante la grandan standardon “**Pravas ribelo kontraŭ la reakciularo**”, kun senlima fidelo kaj varma amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj kun ĵuro defendi Prezidanton Maŭ per sia vivo, la heroaj laboristoj de Anjuan, jam de longe indignigitaj pro la krima agado de la plenmano da klasaj malamikoj beligi Liu Ŝaŭki, faris fortan ofensivon kontraŭ Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj!

Rimarkinte la situacion ne favora, la agentoj de Liu Ŝaŭki faris agonion per molaj kaj malmolaj rimedoj.

Perfidulo, persone embuskigita de la granda renegato Liu Ŝaŭki en Anjuan, plengorĝe kaj en saliva ŝprucado flate laŭdis Liu Ŝaŭki antaŭ la pordo de la Laborista Klubo de Anjuan. Sed regis indifrento en la ĉirkaŭo, neniuj ministoj lin aŭskultis.

En la domo por maljunuloj — la domo siatempe loĝita de Prezidanto Maŭ en Anjuan, kun senkompare profunda proletara sentimento la veteranaj revoluciaj laboristoj entuziasme rakontis la

grandan revolucionan praktikon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en gvido de la revolucia batalo de anjuan-aj laboristoj, kaj senkompate malkaŝis la kriman vizaĝon de la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. La laboristoj de Anjuan, iliaj familiaĵoj aĝaj kaj junaj konkure svarmis al la domo por maljunuloj — la domo siatempe loĝita de Prezidanto Maŭ — por aŭskulti intiman rememoron de veteranaj revoluciaj laboristoj. La veterana laboristo Hju Ŝengjuan, kiu iam partoprenis strikan batalon sub la persona gvido de Prezidanto Maŭ, diris: “Parolante pri la historio de la revolucia batalo de Anjuan, ni maljunaj ministoj sciis plej bone. Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu persone gvidis nin disvolvi la strikan batalon. Ni ja devas multe propagandi la grandan revolucionan praktikon de Prezidanto Maŭ, ni ja devas varme prikanti la grandan venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!”

Prenante la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson kiel armilon, la revoluciaj laboristoj de Anjuan disvolvis furiozan ofensivon kontraŭ Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj. Kun profunda malamo kontraŭ la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, ili fermis la “memoran muzeon” starigantan biografion por Liu Ŝaŭki kaj la *Laboristan Ĵurnalon de Pinghiang-a Minejo* flate laŭdantan Liu Ŝaŭki kaj komencis eldoni sian *Batalan Ĵurnalon de Kritiko kontraŭ Liu*.

La senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ inspiris la laboristojn de Anjuan al la decido fondi Memoran Muzeon pri la Revolucia Aktivado de Prezidanto Maŭ en Anjuan. Ili sendis propagandajn taĉmentojn de Maŭzedongpensoj kaj enketajn grupojn pri la batala historio de Anjuan inter la du linioj; la taĉmentoj kaj grupoj vizitis maljunajn laboristojn de diversaj lokoj en Anjuan kaj Pinghiang spite de rivera kaj monta baro, ili venis ankaŭ al Hunan kaj aliaj lokoj, vizitis tie veteranajn revoluciulojn kaj ministojn, kiuj sekvis Prezidanton Maŭ revolucii en Anjuan, kaj kolektis grandan kvanton da historiaj materialoj pri la revolucia aktivado de Prezidanto Maŭ en Anjuan kaj koncernajn memorigaĵojn. Kiam la Memora Muzeo pri la Revolucia Aktivado de Prezidanto Maŭ en Anjuan majeste stariĝis sur la impona Anjuan-monto post venka konstruiĝo, la vastaj laboristaro kaj revoluciaj popolamasoj de Anjuan ekbolis en plena ĝojo. Antaŭ la Muzeo ili fojrefoje ĝojkriis: “Vivu la granda Maŭzedongpensoj!” “Vivu la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!” “Vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” “Longan vivon, longan vivon al Prezidanto Maŭ!”

NENIAM ŜANĜIGOS LA RUĜA KORO DE ANJUAN-AJ LABORISTOJ FIDELA AL PREZIDANTO MAŬ

La 30-a de junio de 1968 estas la plej feliĉa kaj neniam forgesbla tago por la laboristoj de Anjuan. En tiu tago nia plej estimata granda gvidanto Prezidanto Maŭ aŭdiencis reprezentantojn de anjuan-aj revoluciaj laboristoj, kiuj ĉeestis la Tutlandan Konferencon de la Karba Industrio por Teni la Revolucion kaj Stimuli la Produkton. Je la 1-a de la samjara oktobro, la laboristaj reprezentantoj de Anjuan denove glorie venis al Pekino, partoprenis la solenan celebren de la nacifesta tago kaj refoje vidis nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. La aŭdiencoj de Prezidanto Maŭ al la laboristaj reprezentantoj de Anjuan multe inspiris la vastajn laboristajn amasojn de Anjuan. Kiom da homoj larmis pro la feliĉo, kiom da homoj ne povis endormiĝi tranokte pro la emocio!

Sub la granda inspiro de la intimaj aŭdiencoj de Prezidanto Maŭ al la laboristaj reprezentantoj de Anjuan, kun profunda proletara sentimento senlime fidela al Prezidanto Maŭ la vastaj laboristaj amasoj de Anjuan sin ĵetis en la movadon de batalo, kritiko kaj reformo. Sub la gvido de la nove naskiĝintaj revoluciaj komitatoj ili seninterrompe faris atakojn kontraŭ la klasaj malamikoj, firme tenante la revolucion kaj forte stimulant la produkton. Ĉie, ĉu en ŝaktoj, laborejoj, ĉu en loĝejoj aŭ sur stratoj, ili faris fortan kritikon kontraŭ la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. La kontraŭrevoluciaj reviziismaj nigraj varoj distrumpetitaj de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj estas ĝis plena bankrotiĝo kritikitaj de la vastaj revoluciaj amasoj armitaj de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. En la loĝkvartalo de la oka roto, la familianoj de la vastaj revoluciaj laboristaj amasoj, de 7-8-jaraj geknaboj ĝis grizharaj gemaljunuloj, ĉiuj sin ĵetis en la torenton de la granda revolucia kritiko. Ĉiu familio starigis rubrikon por batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon kaj disvolvis familian kritik-kunvenon. En tiuj rubrikoj kaj kunvenoj ĉiu kondamnis Liu Ŝaŭki.

La torenta movado de la granda revolucia kritiko des pli vekis la profundan

proletaran sentimenton de senlima fidelo kaj varma amo de la anjuan-aj laboristoj kaj iliaj familianoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj des pli akcelis la viglan disvolviĝon de la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. En domo de ĉiu laborista familio pendas portretoj de Prezidanto Maŭ, stariĝas stablo de revoluciaj trezoraj libroj, kaj ĉiu ĉiam portas kun si saketon kun revolucia trezora libro. Inter la pli ol 2,900 laboristoj de la tuta minejo aperis 976 aktivuloj kaj 35 avangardaj kolektivoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

La profunda disvolvo de la revolucio forte antaŭenpuŝis la produkton. Depost la dua duonjaro de 1968, la karba produktkvanto de la tuta minejo konstante rekte grandiĝas monaton post monato.

La eksterordinare granda ĝojiga informo pri la solena inaŭguro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio portis Anjuan en ĝojan maron. En la tagoj por celebri la okazigon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, ĉiuj esprimis sian fidelon al Prezidanto Maŭ. Ili diris: Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Ni anjuan-aj laboristoj ĉiam fidelas al Vi! Eĉ se elĉerpiĝus la maro kaj putriĝus la ŝtonoj, nia koro neniam ŝanĝiĝos! Ni anjuan-aj laboristoj ĉiam fidelas al Vi, sensanceliĝe sekvas Vin fari revolucio!

**Ĵunĝi: nomo iam uzita de Prezidanto Maŭ*

Anjuan-aj laboristoj forte kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki.



La Koroj de la Subpremataj Popoloj Direktiĝas al la Ruĝa Suno

LA revoluciaj popolanoj en Pekino, la ĉefurbo de nia lando, kaj en diversaj lokoj tra la tuta lando ricevas ĉiutage milojn kaj milojn da leteroj plenaj de entuziasmo de amikoj de la kvin kontinentoj. Tiuj leteroj esprimis tre sinceran senton de la revoluciaj popoloj de la mondo al Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenso. Ĉi tie ni publikigas parton el ili.

MAŬZEDONGPENSO ESTAS RUĜA SUNO NENIAM SUBIRANTA

Klopodinte per multaj rimedoj, finfine ni akiris trezorajn librojn longe sopiratajn — grandajn verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong. Posedante la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson — la akran, potencon armilon — kaj kombinante Maŭzedongpenson kun nia konkreta praktiko, la revolucia popolo de Malajo povas venki ĉiujn malamikojn kaj vidos lumon kaj esperon sur nia vojo antaŭen. Ni venkos ĉiujn malfacilojn, rompos ĉiujn malhelponojn kaj pliardigos la fajron de batalo.

La trezoraj verkoj de Prezidanto Maŭ vekis grandan eksciton inter miaj amikoj. Tenante la

trezorajn verkojn kaj kun larmoj de feliĉo en siaj okuloj iu batalanto de la nacia liberiga armeo ne povis reteni sian emocijon kaj laŭte kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ! Maŭzedongpenso estas ruĝa suno neniam subiranta!” Iu veterana batalanto, kiu batalis kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj pupoj dum kelkdek jaroj, diris ekscitite: “Tre bone! Maŭzedongpenso estas lumturo por la revolucia popolo de Malajo kaj estas la plej fidinda garantio por venko de la revolucio.” Iu juna laboristo diris: “Mi decidis studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj iri la revolucian vojon dum mia tuta vivo.” La vortoj de tiuj amikoj esprimis la komunan deziron de miloj kaj dekmiloj da subpremataj, malriĉaj popolanoj de Malajo.

Kara kamarado, ni profunde sentas feliĉon kaj fieron pro la amikeco de la granda ĉina popolo. Tiu ĉi amikeco estas manifestiĝo de proletara internaciismo. Ni unuiĝu por ĉiam kaj kune batalu ĝis la fino por realigi la kompletan emancipon de la homaro.

S. F., Malajo

MAŬZEDONGPENSO KURAĜIGAS MIN EN ĈIU MOMENTO

Maŭzedongpenso estas tiel klara kiel fonto, tiel profunda kiel oceano kaj tiel brila kiel la suno.

La granda Maŭzedongpenso estas lumturo ne nur por la ĉina popolo sed ankaŭ por la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. La penso de Prezidanto Maŭ estas la plej korekta kaj la plej granda. Kvankam granda distanco apartigas niajn du landojn, tamen mi sentas, ke mi vivus kvazaŭ apud Prezidanto Maŭ, ĉar lia penso kuraĝigas min en ĉiu momento. Mi esperas, ke venos tago en kiu mi povos premi liajn manojn, kiuj savis Ĉinion kaj savos la mondon. Bonvolu transdoni mian respekton al Prezidanto Maŭ.

Kant, Malio

MAŬZEDONGPENSO ESTAS LA PLEJ GRAVA HELPO AL NI

Kun ekscito mi skribas al la ĉinaj amikoj, kiuj vivas trans miloj kaj miloj da montoj kaj riveroj. Mi esperas, ke tiu ĉi letero povos trapasi ĉiujn malfacilojn kaj sekure atingos vin.

Plenmano da reakciuloj de Mobutu k. s. — lakeoj de usona imperiismo — morte timas la popolan Ĉinion. Ili faris multe da malbonoj. Ĉe ni, kiu publike interparolas pri la popola Ĉinio kaj Maŭzedongpenso, tiu eble estos arestita kaj enkarcerigita. Sed la vasta popolo sopiras al Ĉinio kaj adoras la grandan Maŭzedongpenson.

Antaŭ kelkaj jaroj mi ĵetis min en la batalon kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj agentoj en Kongolando (K.). Dum tiu ĉi periodo ni multfoje suferis persekuton kaj malhelpon. Sed tiuj, kiuj fidelas al la liberiga afero de la popolo de Kongolando (K.), neniam ŝanceliĝas. Ni firme kredas, ke la vero estas ĉe la flanko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, sed absolute ne estas ĉe la flanko de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj.

En tre malfacilaj kondiĉoj ni nun serioze studas Maŭzedongpenson. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong instruas al ni: “La popoloj, kiuj jam triumfis en sia propra revolucio, devas helpi tiujn, kiuj ankoraŭ batalas por sia liberiĝo. Tio

estas nia internaciisma devo”. Per studo ni profunde sentas, ke la granda Maŭzedongpenso estas la plej grava helpo, kiun la popola Ĉinio donas al ni.

A. S., Kongolando (K.)

PREZIDANTO MAŬ ESTAS LA PLEJ GRANDA MARKSIST-LENINISTO EN LA NUNA EPOKO

Mi estimas la penson de Prezidanto Maŭ, la granda instruanto kaj amata gvidanto. Prezidanto Maŭ estas la plej granda Marksist-Leninisto en la nuna epoko.

Ĉiam cirkulas la vero de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, la iniciatintoj kaj heredintoj de socialismo. La verkoj de Prezidanto Maŭ, lia penso kaj liaj instruoj estas riĉigita kaj disvolvita Marksism-Leninismo kaj estas teorio por plialtigi la politikan konscion de la popolamaso. Por akiri veran liberiĝon la popoloj de la mondo certe antaŭenmarŝos laŭ la vojo montrita de Maŭzedongpenso.

Mi kore deziras longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ, la granda instruanto kaj granda gvidanto de ĉiuj revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

J. G., Venezuelo

TUTE PRAVA ESTAS LA DIRO “EL LA PAFILO VENAS ŜTATPOTENCO”

Neesprimebla estis mia emociiĝo, kiam mi ricevis verkojn de Prezidanto Maŭ.

Ni revoluciaj junuloj esperas frakasi ne nur usonan imperiismon sed ankaŭ novan malamikon — sovetunian reviziismon. Estas vere, ke antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni aŭdis, ke la gvidantoj de Sovetunio jam burĝariĝis kaj ke ili estas falsaj revoluciuloj kaj veraj kontraŭrevoluciuloj, ni tion ne kredis. Sed nun kiam ni vidis propraokule, ke ili kaj usonaj imperiistoj estas ŝakaloj el la sama nesto, mi konis, ke la reviziistoj de Sovetunio ne estas niaj amikoj nek niaj gvidantoj, sed niaj malamikoj. Ili estas malbonaj same kiel la usonaj imperiistoj. Tiel, ni pli amas Prezidanton Maŭ.

Prezidanto Maŭ diris: “El la pafilo venas ŝtatpotenco.” Tio estas tute prava. Ni nepre faligos tiujn papertigrojn — la malbenindajn usonajn imperiistojn kaj la maskitajn “komunistojn”.

L. S., Urugvajo

NI TRE SOPIRAS AL PREZIDANTO MAŬ

Kiam mi skribas tiun ĉi leteron, mi sentas profundan kordoloron pro la ĉitiea situacio, ĉar la sovetuniaj reviziistoj kaj iliaj kunuloj armite okupis mian karan Patrion — Ĉeĥoslovakion. La sovetunia renegata [k]liko parolas sur la lipoj pri socialismo, sed faras rabistan agon de imperiismaj agresantoj. Ili tretis ĉiujn principojn de Leninismo!

Kvankam Ĉinio situas tre malproksime de ni, tamen hodiaŭ ni sentas pli intime ol iam ajn antaŭe, ke nur ŝi estas vera, potenca socialisma lando. Multaj homoj en nia lando tre sopiras al Prezidanto Maŭ kaj tre adoras la grandan Maŭzedongpenson.

Dum la lastaj tridek jaroj mia Patrio estis dufoje okupita de la agresantoj. En la unua okazo tio estis okupado fare de germanaj naziistoj kaj nun estas okupado fare de la reviziistoj-rabistoj estrataj de la sovetuniaj reviziistoj. Sed mi firme kredas, ke mia Patrio certe akiros veran, kompletan liberigon post la batalo de la revolucia popolo.

Saluton al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!
Saluton al la tuta ĉina popolo!

S. J., Ĉeĥoslovakio

NI TROVIS POTENCAN ARMILON POR NIA BATALO

Venkinte multajn malfacilojn mi fine akiris verkojn de la granda instruanto Prezidanto Maŭ. Legante ĉi tiujn brilajn verkojn sub la malluma regado de la faŝistoj, mi vere sentas, ke la ruĝa suno leviĝas en la oriento.

Franko praktikas faŝisman regadon dum preskaŭ tridek jaroj en Hispanio. Li opinias, ke li povas malhelpi la popolon fari batalon, se li apogas sin sur bajonetoj. Tio estas nur fantazio! La revolucia popolo de Hispanio ne estas timigita de la malfaciloj en sia batalo kaj en sia vivo. Ni estas aktive studentaj kaj profunde komprenantaj la grandan Maŭzedongpenson. Tio estas potenca ideologia armilo gvidanta nian batalon. Ni firme kredas, ke la hispana popolo certe gajnos venkon de la batalo.

Fruan triumfon al la revolucio de la proletaro de la mondo!

Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!
Ĝ. A., Madrid, Hispanio

IRI LA LARĜAN VOJON MONTRITAN DE MAŬZEDONGPENSO

En la pasinta pli ol unu jaro mi ĉiam penis propagandi la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson en Britio. Estas ĝojinde, ke mia penado hodiaŭ jam akiris bonan rikolton. Mi unue konatigis la instruojn de la amata gvidanto kaj stiristo al kamarado, kiu loĝas kun mi en la sama dormejo. Poste per lia luktado multaj kunvenoj estis organizitaj. Prenante lin kiel ekzemplon, la bone organizita, nelacigebla laboristaro propagandis la instruojn de Prezidanto Maŭ al ĉiuj ne domaĝante sian forton. Nun multaj el niaj kamaradoj jam liberigis sin el la influo de imperiismo kaj reviziismo kaj suriris la larĝan vojon montritan de Maŭzedongpenso.

Porti la grandan, ĉiamvenkan Maŭzedongpenson al pli multaj homoj kaj bruligi fortan, ruĝan fajron en la koroj de la brita popolo — nur tio frue liberigos nin el la katenoj de la imperiisto-papertigo.

Fine, en la nomo de multaj homoj, kiuj deziras fari revolucion, mi esprimas sennombrajn bondezirojn kaj longan, longan vivon al nia amata Prezidanto Maŭ — la plej granda Marksist-Leninisto en la nuna epoko.

Dromond, Britio

KUN FIRMA DECIDO FARIĜI PROPAGANDISTO DE MAŬZEDONGPENSO

Studinte *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj posedinte Maŭzedongpenson, mi estas plena de forto. En kia ajn malfacila stato kaj kia ajn malbona estas la situacio, en kiu la revolucia forto provizore troviĝas rilate al nombro, mi daŭrigos la batalon.

Por propagandi Maŭzedongpenson mi donis al du nigruloj laborantaj po unu ekz. *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Unu el ili estis ŝarĝanta kamionon per rubo, dum la alia estis puriganta pensionon. Ricevinte la ruĝan libreton la nigrulo faranta ŝarĝadon esprimis al mi dankon fojon post fojo. Li diris, ke li legos ĝin vespere tuj post hejmenreveno. La alia, faranta purigon, akceptis la libreton kun granda ĝojo kaj diris dankante, ke li profunde studos ĝin. Mi estas blankulo. Mi sentas, ke tiuj du nigruloj estas tre bonaj. Kiam ili la unuan fojon firme tenis en siaj manoj verkojn de Prezidanto Maŭ, ili montris plenan rideton.

Eihman, Usono

Vicprezidanto Lin Estas la Brila

Ekzemplo Imitinda por Ni

MI tre emociiĝis en la ĝojegaj tagoj, kiam la centmilionoj da armeanoj kaj popolanoj de la tuta lando jubilas pro la sukcesa malfermiĝo de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. La nova Statuto de la Partio akceptita de la Naŭa Kongreso denove klare difinis, ke Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso estas la teoria bazo, kiu orientas la penson de la Partio, kaj samtempe klare difinis, ke kamarado Lin Biaŭ estas la daŭriganto de Prezidanto Maŭ; tio estas venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj venko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso.

La saĝa decido, ke kamarado Lin Biaŭ estas la daŭriganto de Prezidanto Maŭ, reprezentis la volon de la sepcentmiliono ĉina popolo kaj estas la plej granda feliĉo de la tutlanda popolo. En la momento, kiam la centmilionoj da popolanoj akklamadis la grandan venkon de la Naŭa Kongreso, mi nature ekrememoris pri la flamanta batalkampo en la Nordoriento dum la periodo de la Liberiga Milito. Tiam la batalo por ekstermi banditojn kaj oponi kontraŭ tiranoj en la Nordoriento estis grava konsistiga parto en efektivigado de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “**fondi solidan bazlon de la Nordoriento**”. La batalo estis kondukita sub la ĝusta gvidado de Vicprezidanto Lin. Sed ĉiu antaŭenpaŝo de la revolucio estis nefacila. Tiam ni ne nur devis konduki malfacilan kaj penigan batalon kontraŭ la reakcia armeo de Kuomintangoj kaj banditoj, sed ankaŭ iris ekstreme akra kaj intensa batalo inter la du linioj en nia Partio. En tiu serioza batalo koncernanta la sorton kaj estontecon de nia lando la intima kunbatalo de Prezidanto Maŭ kamarado Lin Biaŭ firme efektivigis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, bojkotis kaj fine frakasis la dekstran kapitulacisman linion de Liu Ŝaŭki antaŭenpuŝitan de Peng Ĝen.

Tio garantiis la rapidan efektivigon de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, estigis sukcesan iradon de la batalo por ekstermi banditojn kaj oponi kontraŭ tiranoj, fondon de solida bazloko de la Nordoriento kaj akiron de la granda venko de la Liberiga Milito en la Nordoriento. La rememoro pri la batafaktoj, kiujn mi propraokule vidis kaj propraorele aŭdis kaj travivis, plie vekis en mi senliman amon kaj fidelon al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj plie fortigis mian senliman respekton kaj admiron al Vicprezidanto Lin, kaj samtempe plie vekis en mi senkomparan malamon al la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia agento tiutempa en la Nordoriento Peng Ĝen k. s.!

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito la Centra Komitato de la Partio estrata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ sendis grandan nombron da kadroj kaj trupoj en la Nordorionton por gvidi la nordorientajn popolanojn pluapase disvolvi revolucionan batalon. Tiutempe, despoto Ĉiang Kajŝek kiu pasive rezistis kontraŭ la japanaj agresantoj, aktive batalis kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj flatis al malamiko kaj perfidis la patrolandon dum la okjara Kontraŭjapana Rezistmilito, senhonte malsupreniris de sur Emejmonto por depreni persikojn provante uzurpi la fruktojn de venko akiritajn de la popolo sub la gvido de nia Partio en la sangverŝa luktado. Subtenate de la usona imperiismo li ludis manovrojn de kontraŭrevolucia duvizaĝulo, antaŭenpuŝante kontraŭrevolucionan komploton pri plenampleksa enlanda milito sub la masko de “paco”. Li haste transportis soldatojn al la Nordoriento tra la vojoj mara, tera kaj aera kaj okupis Ŝanhajguan, Ginĝou kaj aliajn gravajn lokojn liberigitajn de nia armeo, intencante ekstermi nian armeon en unu fojo kaj okupi la tutan Nordorionton per sia supereco en



Veterana revolucia kadro kamarado Ĉen Hingting, kiu siatempe estis politika direktanto de la blankarda trupo en la batalo de Lingiang, rakontas al la juna generacio pri la brilaj heroaĵoj de Vicprezidanto Lin.

fortoj kaj ekipaĵoj profitante la okazon ke nia armeo ankoraŭ ne firmigis nian pozicion, kaj poste servi Nordorienton kiel unu el la gravaj bazlokoj por lanĉi plenampleksan enlandan militon kaj tiel formi situacion ataki de norda kaj suda flankoj ĉiujn niajn bazlokojn en la Nordĉinio kaj sekve restarigi sian reakcian regadon super la tuta lando. Tial, tiutempe la batalo en la Nordoriento fariĝis fokuso de batalo inter niaj Partio kaj armeo ĉe unu flanko kaj uson-ĉiangkajŝek-a reakciularo ĉe la alia kaj havis precipe gravan signifon por disvolviĝo de la tutlanda situacio.

Ĝuste en tiu kriza momento nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĝustatempe malkovris la kontraŭrevolucionan intrigon de la uson-ĉiangkajŝek-a reakciularo kaj faris je la 28-a de decembro de 1945 la grandan alvokon al la nordorientaj armeanoj kaj popolanoj **“fondi solidan bazlokon de la Nordoriento”**. En la instrukcio Prezidanto Maŭ saĝe montris: **“La nuna tasko de nia Partio en la Nordoriento estas fondi bazlokon, fondi solidan bazlokon militan kaj politikan en la orienta, norda kaj okcidenta Manĉurio.”** **“La centro de gravito de laboro de nia Partio en la Nordoriento estas laboro pri amasoj.... Se ni firme nin apogas sur**

la amasoj, ni venkos super ĉiuj malfaciloj kaj atingos nian celon paŝon post paŝo.” Tiu instrukcio elmetis al ni ĝustan orientilon kaj montris brillan vojon en serio da gravaj problemoj kie kaj kiel starigi bazlokojn. Ĝi estas granda historia dokumento, ĝenerala programo por konstruado de la Nordoriento en politiko kaj milito kaj la granda strategia dispozicio farita de Prezidanto Maŭ por komplete frakasi la ofensivojn de la kuomintanga reakciularo kaj liberigi la tutan Ĉinion.

Sed la kontraŭrevolucia reviziisto Peng Ĝen kaj liaj similaj kiuj uzurpis gravajn oficojn en la Nordoriento, freneze kontraŭstaris la saĝan instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj plenforte antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucionan linion de la granda interna spiono Liu Ŝaŭki, nome la linion de dekstra kapitulacismo. En politiko ili distrumpetis klasan kapitulacismon, superstiĉe kredis intertraktadon kaj iluziigis pri paco; en aranĝo de laboroj ili sopiris pro urboj, sed ne volis esti en kamparo kaj ne faris penigajn kaj zorgajn laborojn pri amasoj; en armeokonstrua linio, ill praktikis banditan politikon de “rekrutigo”, konvertante en klikon kapitulacistojn, perfidulojn, varbante banditojn, naciperfidulojn por pligrandigi siajn fortojn. Kiam

la kuomintanga reakciularo grandskale lanĉis ofensivon al la Nordoriento, ili provis anstataŭigi la strategian penson kaj taktikan principon de Prezidanto Maŭ per aventurismo kaj fari aventure decidan batalon kontraŭ malamiko, en unu fojo ĵetante la tutan forton en vetludon, kiam nia armeo troviĝis en malsupereco kaj ne havis kampanan bazlokon.

En tiu kriza momento koncernanta la estontecon kaj sorton de la ĉina revolucio la intima kunbatalanto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kamarado Lin Biaŭ decideme kaj brave defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj faris pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la dekstra kapitulacisma linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia agento en la Nordoriento Peng Ĝen k. s. Kamarado Lin Biaŭ konstante instruis senlace al kadroj de la trupo ne kredi la tiel nomatan “nova etapo de paco kaj demokratio”, kaj ne malsupren komuniki ĝin al la trupo. Li penetrive montris: Sen la venko de la revolucia milito ne eblas paco. Nun en la Nordoriento ni ankoraŭ ne havas bazlokon, nek hejmon, la urboj ankoraŭ ne estas en niaj manoj, ni povas nur utiligi ilin kiel hotelojn por loĝi provizore. Se ni ne fondas bazlokojn en kamparo, ni ne povos venki malamikojn, sed male, povos esti forpelitaj de ili kaj eĉ mortos pro malsato kaj frostiĝo. Kamarado Lin Biaŭ ĉiam tenis en la koro la instrukcion de Prezidanto Maŭ **“fondi solidan bazlokon de la Nordoriento”**. Ofte estis, ke en la frosta longa nokto, sub la olelampo en la kabano li dronis en meditado antaŭ la mapo, pripensante kiel efektiviĝi la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ. Ĉu sur la vojo de streĉa militiro, ĉu en paŭzo de intensa batalado, kiam la trupo venis al iu loko, li ĉiam persone organizis ĝin tie disvolvi laborojn pri amasoj, propagandi politikojn de la Partio, mobilizi amasojn al batalo por ekstermi banditojn kaj oponi kontraŭ tiranoj kaj starigi revolucionan regpotencon. En komando de batalado, firme sekvante la saĝan instruon de Prezidanto Maŭ **“lasi la larĝan vojon, sed okupi ĝiajn ambaŭ flankojn”**, kamarado Lin Biaŭ decideme evitis fari batalon kontraŭ la malamikoj en malfavoraj kondiĉoj, kaj por trovi kaj akiri favoran militŝancon ekstermi malamikojn li komandis la armeon grandpaŝe antaŭenmarŝi kaj retiriĝi, forlasi urbojn, forĵeti balastajojn kaj koncentri superajn fortojn por ekstermi malamikojn ĉiun aparte en la manovra kampanjo. Tiamaniere, ni ankaŭ akiris senĉese venkojn en kampanjoj kaj bataloj sub malfacilaj kondiĉoj de manko de post-

fronta subteno dum la komenca periodo, multe prokrastis la rapidecon de atako de la malamikoj kaj grandkvante ekstermis ĝiajn vivhavajn fortojn kaj konservis nin mem.

De la vintro de 1945 ĝis la printempo de 1946, kvankam kamarado Lin Biaŭ faris persistan kaj senlacan batalon por efektiviĝi kaj defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, tamen kaŭze de tio, ke sub la subteno de sia nigra mastro Liu Ŝaŭki, Peng Ĝen kaj liaj similaj insistis pri sia eraro kaj daŭre antaŭenpuŝis freneze la kontraŭrevolucion reviziisman linion, la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“fondi solidan bazlokon de la Nordoriento”** ne povis rapide efektiviĝi, kaj la tuta batalo kontraŭ la malamiko troviĝis en ekstreme malfavora situacio. Tiam la komandantoj kaj batalantoj brave luktantaj en la fronto ne povis akiri aldonitan forton, kaj urboj estis perditaj unu post la alia, dum la kamparo estis okupita de banditoj kaj naciperfiduloj akceptitaj kaj reorganizitaj de Peng Ĝen k. s. Kiam Kuomintango lanĉis atakon, tiuj fiuloj amase nudigis sian naturon, ĵetis sin en la sinon de Kuomintango kaj fariĝis grandaj aŭ malgrandaj “vulturoj”. Ili instigis tumultojn kaj faris subfosadojn, subpremis amasojn kaj detruis la konstruadon de bazlokoj en la vasta postfronto de nia armeo, freneze agante kun la kontraŭrevolucia atako de Kuomintango. Senkompataj faktoj proklamis la kompletan bankroton de la kontraŭrevolucia kapitulacisma linio de Liu Ŝaŭki, Peng Ĝen k. s. Kaj la vastaj kadroj pli klare konsciis la senkomparan saĝecon de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“fondi solidan bazlokon de la Nordoriento”**.

Nigraj nuboj neniel povas kovri la sunon, kaj densa nebulo neniel povas malhelpi navigacion. Ĝuste kiam la batalo inter la malamiko kaj ni en la Nordoriento kaj batalo inter la du linioj en la Partio troviĝis en ekstreme intensa kaj kriza momento, nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ ĝustatempe kaj decideme faris saĝan decidon senigi la kontraŭrevolucion reviziiston Peng Ĝen je la gvida ofico en la Nordorienta Buroo de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj tiel dehakis la diablan ungegon de Liu Ŝaŭki etenditan en la Nordorienton. De tiam fikse stariĝis la unuigita gvido de kamarado Lin Biaŭ en la regiono de la Nordoriento. Inter junio kaj julio de 1946, kamarado Lin Biaŭ persone prezidis la plivastigitan kunvenon de la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu komplete likvidis la dekstran kapitulacisman linion de Liu

Ŝaŭki antaŭenpuŝitan de Peng Ĝen, kaj per Maŭzedongpenso unuigis konon, politikon, volon kaj paŝojn de la tuta Partio kaj tuta armeo en la Nordoriento, kaj tiel naskiĝis “la rezolucio de la 7-a de Julio”, vere efektiva instrukcion de Prezidanto Maŭ “**fondi solidan bazlokon de la Nordoriento**”. Tiu rezolucio ludis tre gravan rolon en turno de la situacio de la Nordoriento. Sub la rekta kaj ĝusta gvido de kamarado Lin Biaŭ kelkdek mil kadroj estis rapide mobilizitaj al kamparo kaj inter amasojn por fari peneman kaj profundan laboron pri amasoj kaj fondi bazlokon de la Nordoriento. Laŭ la principo de Prezidanto Maŭ “**apartig fortojn por mobilizi amasojn**” kaj “**koncentri fortojn por kontraŭstari malamikojn**” kamarado Lin Biaŭ dissendis sufiĉe da fortoj el la kampa armeo al la armeaj subregionoj por tie mobilizi amasojn, ekstermi banditojn kaj fondi regpotencon. Tia-

Ĉe la piedo de Maŭ-er-monto, veterana batalanto rakontas al armeanoj kaj popolanoj de Lingiang pri la direktado de la batalo fare de Vicprezidanto Lin en la ĉirkaŭaĵo de tiu ĉi loko.



maniere, okazis granda ŝanĝiĝo en fizionomio de la Nordoriento nur en kelkaj monatoj. En la jarfino de 1946, mobilizite la malriĉaj kamparanoj de la vasta kamparo en Nordoriento efektivigis agraran reformon, ekstermis la banditan armitan forton de Kuomintango, starigis lokajn armitajn fortojn de la popolo, pligrandigis ĉeffortajn trupojn, kaj tio kaŭzis radikan ŝanĝiĝon en situacio de la tuta Nordoriento favorantan al ni sed ne al la malamiko. En la militaj aferoj ankaŭ dank’ al tio ni rapide transiris de strategia defensivo al strategia ofensivo, lanĉis sinsekve furiozajn atakojn al malamiko, kun ĉiam pli granda intenseco kaj skalo en batalo, ekstermi grandkvanton da malamikoj, pelante ilin en panikon. Post pli ol du jaroj ni akiris grandan venkon de mondsdua kampanjo de Liaŭhi-Ŝenjang, plene kaj tute ekstermis kelkcent mil ĉiangkajŝek-ajn banditojn en la teritorio de la Nordoriento

kaj liberigis la tutan Nordorionton. La liberigo de la tuta Nordoriento kaŭzis la grandan ŝanĝiĝon en la milita situacio de la tuta lando; ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris en sia artikolo *La Granda Ŝanĝiĝo de la Milita Situacio de Ĉinio* en la 14-a de novembro de 1948: “Nun la milita situacio de Ĉinio jam eniris en novan turnopunkton, t.e., jam okazis fundamenta ŝanĝiĝo en interrilato de la fortoj de ambaŭ batalantaj flankoj. La Popola Liberiga Armeo jam delonge havas superecon ne nur en kvalito, sed ankaŭ en nombro”; kaj tiamaniere, tio metis solidan bazon por renversi la regadon de Ĉiang Kajŝek kaj multe rapidigis la procedon de liberigo de la tuta Ĉinio. La venko de la nordorienta milito estas granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, elstara kontribuo de Vicprezidanto Lin al la ĉina revolucio kaj ankaŭ historia atestanto de la senlima fideleco de Vicprezidanto Lin al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La historio elokvente pruvas, ke Vicprezidanto Lin deĉiam alte tenas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj en ĉiuj krizaj momentoj de revolucio li plej firme

KURANTAJ AFEROJ

MALFERMIĜIS LA PRINTEMPA FOIRO DE EKSPORTAJ VAROJ DE ĈINIO

En la ĝojigaj tagoj, kiam la revolucia popolo de nia lando varme celebris la inaŭguron de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio sukcese malfermiĝis la 15-an de aprilo en Kantono.

La foiro okazas dum sonado de triumfaj kantoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj per ekspozado de tiom multspecaj komercaĵoj la foiro plene atestas, ke la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando stimulas la impetan disvolviĝon de nia socialisma konstruado per sia potenca forto. La foiro montras, ke sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ la ĉina popolo rikoltis brilajn atingojn en industria kaj agrikultura produktado, firme realigante la orientilon **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**.

La ekspozita centro de la nuna foiro estas la Halo de Ruĝaj Trezoraj Libroj — Ekspozicio de la Verkoj de Prezidanto Maŭ okupanta la ekspozan spacon duoble pli grandan ol antaŭe.

Granda nombro da agrikulturaj produktaĵoj kaj novaj fabrikoj en industrio en la foiro konvinke montras, ke sub la direktado de la orientilo **“preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidon”** elmetita de Prezidanto Maŭ kaj sub la forta stimulado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, aperis nova situacio de antaŭensalto en la socialisma konstruado de nia lando. La Speciala Halo pri Daĝaj konigas al la publiko la heroaĵojn de la komunumanoj kaj kadroj de Daĝaj-

brigado kiuj tenante alte la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, peneme luktas kontraŭ malfaciloj kaj sin apogas sur la propraj fortoj en la konstruado de la nova socialisma vilaĝo, kaj la heroaĵojn de multaj progresintaj unuoj de la tuta lando aperintaj sub la direktado de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **“lerni de Daĝaj en agrikulturo”**. Multe pliĝis en komparo kun tiuj ekspozitaj en la pasinta foiro la specoj de produktaĵoj en agrikulturo, forsto, brutbredado, fiŝado kaj kromokupoj, liveritaj de ĉiuj niaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj al la nuna foiro. Multaj novaj produktaĵoj en la petrolo industrio elmontrataj en la Halo pri Daking, vive manifestas la gigantan atingon akiritan de nia petrolindustria fronto en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Komandante ĉion per Maŭzedongpenso la heroo laborista klaso de Ĉinio multe disvolvis siajn saĝon, intelekton kaj kreivon kaj faris grandan kontribuon al la socialisma konstruado. La unuafoja ekspozata modelo de 125,000-kilovata vaporturbina generatoro kun akvo-malvarmigataj statoro kaj rotoro vidiĝis interalie en la foiro. La generatoro estas nova atingo sukcese akirita de la laboristoj en la Ŝanhaja Generatora Fabriko, post kiam ili ektenis la gvidan potencon pri produktado kaj teknologio, kaj estas ankaŭ vaporturbina generatoro plej progresinta en malvarmiga tekniko en la mondo. Estas ekspozitaj la program-kontrola vertikala tornilo — produktaĵo de la Kikihaera Unua Ilmaŝina Fabriko, la analoga elektrona komputmaŝino — produktaĵo de la Pekina Unua Radio-Fabriko, kaj multaj novaj produktaĵoj en la sfero de malpeza industrio. Ĉiuj ĉi tiuj estas la freŝaj fruktoj kreitaj de la laborista klaso de nia lando en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

efektivigas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, plej bone kaj vive studas kaj aplikas Maŭzedongpenson. Vicprezidanto Lin estas la plej intima kunbatalanto kaj plej bona lernanto de

la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la brila ekzemplo imitinda por la tuta partio, tuta armeo kaj tuta popolo.

Gravaj Dokumentoj Nove Eldonitaj

LIN BIAŬ

Raporto al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

(Farita en la 1-a de aprilo kaj aprobita en la 14-a de aprilo, 1969)

(Esperanta eldono)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj albana, angla, araba, bengala, birma, franca, germana, haŭsa, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, persa, portugala, puŝtua, rusa, ŝahilia, sveda, taja, tamila, turka, urdua kaj vjetnama.

ĉ. 108p. en poŝformato de 13×9 cm.

Statuto de la Komunista Partio de Ĉinio

*(Aprobita de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista
Partio de Ĉinio en la 14-a de aprilo, 1969)*

(Esperanta eldono)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj albana, angla, araba, bengala, birma, franca, germana, haŭsa, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, persa, portugala, puŝtua, rusa, ŝahilia, sveda, taja, tamila, turka, urdua kaj vjetnama.

ĉ. 20p. en poŝformato de 10.5×7.5 cm. kun kovriloj el ruĝa plasto

**Novaj-komunikoj de la Sekretariejo de la
Prezidantaro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la
Komunista Partio de Ĉinio**

(La 1-a de aprilo, la 14-a de aprilo, la 24-a de aprilo, 1969)

**Novaj-komuniko de la Unua Plena
Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la
Komunista Partio de Ĉinio**

(La 28-a de aprilo, 1969)

(Esperanta eldono)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj albana, angla, araba, bengala, birma, franca, germana, haŭsa, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, mongola, persa, portugala, rusa, ŝahilia, taja, tamila, urdua kaj vjetnama.

ĉ. 52p. en poŝformato 23×9 cm.

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio
Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por
Poŝta Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio

Vej Fengjing—Bona Laboristino de Prezidanto Maŭ

ANTAŬ la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando, Vej Fengjing jam glorie akiris la honoran titolon “Bona Laboristino de Prezidanto Maŭ”.

Je la 1-a de aprilo, 1969, ŝi glorie partoprenis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

STRIKTE SEKVI PREZIDANTON MAŬ POR REVOLUCII DUM LA TUTA VIVO

Antaŭ la Liberiĝo, Vej Fengjing naskiĝis en malriĉa laborista familio. Ŝia avo estis masonisto kaj ŝia patro laboristo en karbominejo. Kiam Vej Fengjing estis trijara, ŝia patro mortis sub ekstreme peza turmentado de la damninda malnova socio. Tiam, kun sia patrino ŝi almozpetis kaj kolektis karbokernojn el cindroj. Post la Liberiĝo, la Partio kaj Prezidanto Maŭ savis ŝian tutan familion el la amara akvo kaj jen ŝi havis ŝancon viziti lernejon. En 1953, kiam ŝi finis sian lernadon en elementa lernejo, ŝi estis sendita de la Partio al la Maŝinfabriko de la Nordoriento por labori kiel metilernantino. En tiu tempo, kun senlime varma kaj fidela koro al Prezidanto Maŭ ŝi lernadis diligente kaj peneme. Post malpli ol unu jaro ŝi estis jam elektita kiel modela metilernantino en la fabriko. Sub la nutrado de la sunbrilo de Maŭzedongpenso, ŝia klasa konscio rapide leviĝis. En 1954, ŝi estis glorie akceptita en la Komunistan Partion de Ĉinio. En tiu sama jaro ŝi estis elektita kiel labormodelo de la urbo Ŝen-

jang. Antaŭ honoro, Vej Fengjing ankoraŭ pli diligente studis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj reformis sian mondkoncepton per Maŭzedongpenso. En sia taglibro ŝi skribis: “Same kiel la suno, Maŭzedongpenso disradias senfine varmon kaj lumon.” Dum la lastaj dekkelkaj jaroj, Vej Fengjing estis daŭre elektita kiel labormodelo de Ŝenjang kaj progresema laboristino de la provinco kaj de la tuta lando. Kaj ŝi kreskis paŝon post paŝo el ordinara metilernantino en laboristan inĝenierinon, kaj multfoje havis la feliĉon vidi nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Vej Fengjing ĵuris strikte sekvi Prezidanton Maŭ por revolucii dum la tuta vivo.

STURMANTINO EN LA KULTURA REVOLUCIO

En la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio, kun senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, disvolvante la revolucionan ribelan spiriton “**Kiam al mil hakoĵ oni sin submeti ne domaĝas, la imperiestron tiri de ĉevalo li kuraĝas**”, alte tenante la revolucionan kritikan standardon de la proletaro, Vej Fengjing publikigis sinsekve artikolojn sur ĵurnalo, en kiuj ŝia lancpinto direktiĝis rekte kontraŭ la granda renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la provinco Liaŭning kaj en la Maŝinfabriko de la Nordoriento.

En la komenco de la revolucia movado, Vej Fengjing staris ĉe la flanko de la junaj ruĝaj gvardianoj kaj firme subtenis ilian revolucionan ribelan agadon. Tiam, kiam plenmano da klasaj malamikoj furioze kontraŭatakis la junajn ruĝajn gardia-

nojn kondamnante la lastajn kiel “kontraŭrevoluciulojn”, Vej Fengjing kuraĝe elpaŝis la unua kaj publikigis sian revolucion dazibaŭon por malkovri la damnindajn krimagojn de la klasaj malamikoj, kiuj kalumniis la junajn ruĝajn gvardianojn de Prezidanto Maŭ.

La plenmano da ĝismorte pentorifuzantaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon morte malamis kaj timis la revolucion agadon de Vej Fengjing. Iu el ili senhonte diris al ŝi: “Vi estas homo influhava, kaj mi estas tre maltrankvila pro tio, ke vi eble iris eraran vojon....” Vej Fengjing interrompis lin kaj diris serioze: “Mi subtenas ĉion, kio estas konforma al Maŭzedongpenso, kaj oponas ĉion, kio estas nekonforma al ĝi! Vi subpremas la revolucion amason, tio signifas oponon kontraŭ Prezidanto Maŭ, kaj ni ja devas ribeli kontraŭ vi!”

La ĉiamvenka Maŭzedongpenso komandis Vej Fengjing en batalo. En la tagoj kaj noktoj, kiam ŝi ripetade bataladis kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ŝi ĉiam portis kun si tri trezorojn: *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, “Tri Popularaj Artikoloj” kaj *Decido de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proletara Kultura Revolucio*. Vej Fengjing ofte diras: “Maŭzedongpenso estas trezoro el trezoroj, kion ni neniel devas forlasi en revoluciado eĉ je momento.” Ne perdante eĉ unu minuton aŭ unu sekundon.

ŝi serioze studis ĉiun novan instrukcion donitan de Prezidanto Maŭ, kaj strikte agas laŭ ĝi.

POR ĈIAM TENI LA ORIGINAN KVALITON DE LA LABORISTA KLASO

Multaj kaj multaj estas la laboroj de revolucia komitato. Antaŭ ĉio oni devas sinokupi pri la studado de Maŭzedongpenso kaj vere atingi ke ĝi komandu en ĉio.

“La plej grava punkto en reformo de ŝtataj organoj estas intima ligiĝo kun la amasoj.” Tiu saĝa instruo de Prezidanto Maŭ klare montras la direkton al Vej Fengjing. Ofte sonadas ĉe ŝiaj oreloj la zorgemaj vortoj de iu maljuna laboristo: “Ho Fengjing, ne forgesu ofte veni al ni laboristoj, post kiam vi komencis labori en la revolucia komitato!” Kvankam lia diro estas malmultvorta, tamen ĝi ĉiam instigas Vej Fengjing, ke ŝi neniam disiĝu de la amaso.

De kiam Vej Fengjing fariĝis la vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de la provinco, ŝanĝiĝis ŝia pozicio, tamen ŝia origina kvalito de la laborista klaso ne ŝanĝiĝis. En la Maŝinfabriko de la Nordoriento, same kiel antaŭe, ŝi ankoraŭ venas la unua al la laborejo ĉiumatene. Antaŭ la labora horo ŝi bonorde purigas la laborejon, zorge frotdas la il-maŝinojn uzatajn de siaj batalamikoj kaj lubrikas ilin antaŭ la alveno de la lastaj. Ves-



Vej Fengjing interkonsiliĝas kun siaj kunbatalantoj pri tenado de revolucio kaj stimulo de produkto por omaĝi elstaran atingon en produkto al la 9-a Kongreso de la Partio.



Veĵ Fengĵing vizitas la Pekinan Ĝeneralan Trikotan Fabrikon kaj interŝanĝas progresintan sperton en batalo, kritiko kaj reformo.

pere, ankaŭ estas ŝi, kiu la plej lasta haltigas sian maŝinon.

Iufoje, Veĵ Fengĵing faris fizikan laboron en alia fabriko. Multaj laboristoj ŝin ĉirkaŭis kaj esprimis, ke ili volas lerni de ŝi. Ŝi respondis: “Kamaradoj, ankoraŭ tre nesufiĉe mi laboris, mi ĉiam estas nur via malgranda lernantino.”

En tiu ĉi fabriko ŝi laboris kune kun la stablo-laboristoj. La laboro estis peza, kaj cetere ŝi propre ne estis stablolarbisto. Iu maljuna majstro nomata Juan konsilis ŝin iom ripozi, sed ŝi diris: “Ne necesas, mi estas laboristino kaj al laboro mi jam kutimiĝis. Majstro Juan, rigardu nur, ĉu mia laboro estas bone farita kvalite?”

Dum la laborado, dufoje oni telefonis al ŝi. Kaj ambaŭfoje ŝi kiel kutime iris al la grupestro kaj diris: “Majstro Ĉang, mi petas forpermeson pro afero kaj baldaŭ revenos.” Post tio, majstro Ĉang diris al la aliaj: “Veĵ Fengĵing ja estas bona reprezentanto de la laborista klaso. Kvankam ŝi laboris en nia laborejo provizore, tamen ŝi tiel

serioze observis la disciplinon de laboro. Ni ĉiuj devas lerni de ŝi.”

Kiel vicĉefkomitatanino de la revolucia komitato de la provinco, Veĵ Fengĵing ne nur profunde iris en diversajn fabrikojn, sed ankaŭ partoprenis fizikan laboron en popolaj komunumoj, tuj kiam ŝi trovis ŝancon. Iufoje, ŝi partoprenis la konstruadon de akvokonservejo de Kiangin-a Popola Komunumo. Atinginte la konstruejon, ŝi unue esprimis, ke ŝi volas lerni de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj fariĝi ilia lernantino. Poste, ŝi alprenis vektan kaj elektis du grandajn korbojn por komenci la laboron. Por ne tro laciĝi ŝin, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj ne konsentis plenumi ŝiajn korbojn, sed ŝi ĉiam mem almetis certan kvanton da ŝarĝo. Leviĝis tuj la varma tajdo de lernado de Veĵ Fengĵing en la konstruejo de la akvokonservejo. Malriĉkamarano avo Min diris kun varmaj larmoj: “Tio devenas de la bona gvidado fare de Prezidanto Maŭ, ke vicĉefkomitatanino de la revolucia komitato de la provinco ankaŭ venas labori kune kun ni!”

PRENI LA TUTAN MONDON EN LA OKULOJN STARANTE ĈE IL-MAŜINO

Veĵ Fengĵing ĉiam prenas la efektivigon de la novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj lia granda alvoko **“Teni la revolucion kaj stimuli la produkton”** kiel sian unuan gravan taskon. Ŝi profunde komprenas, kiom peza estas la tasko sur la ŝultroj de la laborista klaso de Ĉinio. Ofte ŝi diras al siaj kamaradoj: **“Niaj samlandanoj en Tajvan ankoraŭ troviĝas en la fundo de mizero kaj ankoraŭ du trionoj el la popoloj de la mondo restas neliberigitaj. Ni laboristoj estas revoluciaj batalantoj, kiuj ne portas sur si armeajn vestojn; la laborejo estas batalejo kaj la maŝinoj estas armiloj. Ni devas preni la tutan mondon en la okulojn starante ĉe niaj maŝinoj.”** Tial en la produkta batalado, prenante Maŭzedongpenson kiel orientilon, ŝi decidis produkti pli multe por kontribui pli multe en subtenado al la bataloj de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

Sub la direktado de Maŭzedongpenso, ŝi efektivigis, de 1953 ĝis 1957, pli ol 170 teknikajn renovigojn kaj plenumis sian parton en la Unua Kvinjara Plano 430 tagojn antaŭ la fiksita dato. Poste,

ŝi fondis grupon de teknika renovigo en postlaboraj horoj. En tre mallonga tempo post sia fondiĝo, la grupo sukcesis fabriki post provado lagron de spindelo. Kaj post pli ol 50-foja provado ĝi ŝanĝis la unutranĉilan tornadon en kvartranĉilan. Tiu ĉi renovigo altigis la tagan produkton de lagroj de spindelo de 800 ĝis 12,000 pecoj kaj la kvalito estis ankaŭ tre bona.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn.”** En la jaro 1968, reveninte al sia fabriko post partopreno en la Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kune kun siaj batalamikoj Veĵ Fengĵing proponis pli ol 10 teknikajn renovigojn kaj efektivigis du gravajn teknikajn renovigojn en periodo de malpli ol du monatoj.

Dum dekelkaj jaroj, sub la direktado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, kune kun aliaj laboristoj Veĵ Fengĵing senĉese faris brilajn kontribuojn por la popolo, por la konstruado de socialisma patrolando kaj por subteni la mondan revolucion.



Veĵ Fengĵing faras viziton al la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kaj lernas de tieaj laboristoj, kiuj akiris novajn atingojn en la batalo, kritiko kaj reformo.

Fan Sjaŭgju—Kompartianino

Amata de Amasoj

EN la Kongreso de Malriĉkamaranoj kaj Mal-superaĵ Mezkamaranoj de Gianghi-provinco iu mezaĝa virino suriris la tribunon kaj esprimis kun profunda sento sian fidelecon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Varmegaj aplaŭdoj eksplodis en la kunvenejo de tempo al tempo.

La reprezentantoj estis absorbitaj de la rakonto de Fan Sjaŭgju pri sia trifoja iro al postrestintaj produktgrupoj.

Fan Sjaŭgju antaŭe estis kadro de produktbrigado. Ekde 1959 gvida organizo trifoje sendis ŝin al postrestintaj produktgrupoj por transformi ilin. Ĉiufoje ŝi kunportis sian familion el sep junaj kaj maljunaj membroj kaj kune loĝis en la produktgrupo. Sinapogante sur la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, sur la tri popularaj artikoloj, sur klasbatalo kaj plena mobilizo de amasoj, ŝi transformis tiujn tri postrestintajn produktgrupojn en progresintajn.

Veninte al la unua produktgrupo ŝi aktive studis verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaĵ mezkamaranoj kaj repuŝis la nigran venton de “tri pliigoj kaj unu fikso” ekblovitan de Liu Ŝaŭki. En la unua jaro la produkto plialtiĝis je 45 procentoj, kaj riĉa rikolto estis akirita en tri sinsekvaj jaroj. Krome la virina taĉmento fariĝis progresema kolektivo de la provinco.

En la dua produktgrupo ili pene batalis unu jaron kaj plialtigis la produkton je 44 procentoj.

En la tria fojo gvida organizo sendis ŝin al Gajŝang-produktgrupo. Antaŭ ŝia alveno klasaj malamikoj agitis: “La du viraj grupestroj jam estis sinsekve forpelitaj de ni. Nun venos virino. Ni vidu, kian kapablon ŝi havas!” Fan Sjaŭgju pensis, ke ŝi nepre iros al tiu produktgrupo kaj ne revenos krom se ŝi sukcesos transformi ĉi tiun

postrestintan produktgrupon en la progreseman. Sed ŝia patrino ĉagreniĝis kaj diris: “Sjaŭgju, en la malnova socio ni ne havis loĝejon, kaj ni devis vagi jen tien jen ĉi tien. Nun dank’ al Prezidanto Maŭ ni havas manĝojn, vestojn kaj loĝejon. Do ni ne plu transloĝiĝu.” Ankaŭ ŝia edzo plendis. Fan Sjaŭgju prenis la verkon *Memore al Norman Bethune*, studis ĝin kune kun ili kaj rememorigis la suferojn en la malnova socio. Ŝi diris: “Bethune venis al Ĉinio por fari revolucion malgraŭ la longa vojaĝo de miloj da mejloj, dum ni ne bezonas forlasi nian provincon nek nian gubernion; ĉu ni ne devas transloĝiĝi? Manĝante per ilustrita bovlo, ni ne devas forgesi bastonon uzatan dum nia almozetado.” Ili estis profunde edukitaj de tiuj vortoj kaj ĝoje transloĝiĝis kun ŝi al Gajŝang-produktgrupo.

Veninte al tiu produktgrupo Fan Sjaŭgju fosis batat-kelon kaj konstruis lageton kune kun la komunumanoj en plena energio. Sed okazis nenia ŝanĝo en la grupo. Kial? ŝi foliumis verkojn de Prezidanto Maŭ. Tie Prezidanto Maŭ diris: “**Se en iu ajn procezo ekzistas nombro da kontraŭdiroj, certe el ili unu estas la ĉefa.... Kiam tiu ĉi estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj.**” Tion leginte, Fan Sjaŭgju sentis, ke ŝia menso fariĝis eksterordinare klara. “Jes, oni devas kapti ĉefan kontraŭdiron. Sed kio estas la ĉefa kontraŭdiro en Gajŝang-produktgrupo?” Ŝi tuj organizis la kadrojn kaj malriĉkamaranojn kaj malsuperaĵajn mezkamaranojn por kune studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Post studo ili rapide komprenis la kialon. Ili ĉiuj diris: “Se ni volas ŝanĝi la postrestintecan de nia grupo, ni devas frakasi la atakon de la klasaj malamikoj kaj akre kritiki la spontanecan forton de kapitalismo.” Post sufiĉa enketo kaj studo ili forte batalis kontraŭ iu bienulo-elemento,



Kamaradino Fan Sjaŭju (meze) interŝanĝas komprenaĵojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kun aliaj ĉeestantinoj de la Kongreso de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj de Gianghi-provinco.

kiu subfosas la kolektivajn ekonomiojn, kaj la klasbatalo en Gajŝang-produktgrupo estis malkovrita. Tuj poste ili organizis kunvenon de rememoro pri la pasintaj suferoj kaj pripensoj pri la nuna feliĉo. **“Tuj venos efiko post ekteno de la klasbatalo.”** La studo, la batalo kaj la rememoro multe plialtigis la konscion de la komunumanoj kaj kadroj pri klasbatalo kaj stimulis ĉe ili aktivecon en kolektiva produkto. La komunumanoj diris: “Se la tenado de klasbatalo iom malstreĉiĝos, la kapitalisma forto tuj intensigos atakon. Se la klasbatalo estos firme kondukata, la direkto de socialismo estos klare montrita.” Ankaŭ la kadroj diris: “Se ni jam decidis, do ni kondukigu ĉiujn kaj laboru per nia tuta forto, kaj ni ne ĉesigos nian penadon, se ni ne sukcesos forigi la postrestintecon.” Maŭzedongpensoj fariĝas neelĉerpebla forto kaj senkompare potenca spirita atombombo, tuj post kiam ĝi estas posedita de la vasta popolamaso. Ekde tiam en tiu ĉi produktgrupo ĉiam regis alta entuziasmo. Post unujara batalo la produktkvanto de grenoj plialtiĝis je 46 procentoj, kaj la produktgrupo superplenigis por la unua fojo la taskon de

greno rekvizicie aĉetata de la ŝtato. En la sekvinta jaro ĝi kreis la plej altan rekordon de produktado en sia historio. Pro tio la produktgrupo ricevis de la gubernia instanco la titolon Avangarda Produktgrupo.

Gajŝang-produktgrupo liberigis sin el sia postrestinteco kaj Fan Sjaŭju devis foriri. En la tago de ŝia foriro la komunumanoj ĉiuj venis por adiaŭi. Kvazaŭ edzinigante sian filinon ili akompanis ŝin de loko al loko kaj ne volis disiĝi. Maljuna malriĉkamparano diris: “Sjaŭju, vi estas pli bona ol nia propra filino. Vi estas senegoisma kaj dediĉas ĉion al la kolektivo. Vi estas bona kadro elkulturita de Prezidanto Maŭ.” Maljuna avino prenis la manojn de Sjaŭju kaj diris: “Filino, la litoj de via hejmo difektiĝis ne pro kuŝado sed pro transloĝiĝo. Ni vere dezirus mendi feran liton por donaci ĝin al vi, tiel ke vi povus komforte dormi por kelkaj tagoj.”

La amasoj nomis Fan Sjaŭju Senegoismulo. Ŝi faris multege da bonoj sed neniam konigis sian nomon. Ŝi diris: “La ŝtallaboristo neniam postlasis sian nomon sur la ŝtalaĵo de li fandita, kaj la

kampano neniam postlasis sian nomon sur la greno de li produktita." Jes, homo armita per Maŭzedongpenso sin tenas silenta, kiam li faris ion bonan. Ŝi ne konsideras pri si mem nek pri sia familio. Tio, kion ŝi konsideras ĉiutage, estas: "kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem."

Vidinte malriĉkampanon, kiu portis en la sino sian malsanan infanon al kuracisto, Fan Sjaŭgju donis al li sian biletan por omnibuso, dum ŝi mem toleris sian pieddoloron kaj lame iris kvindek liojn al kunveno.

Vidinte gravedan malriĉkampaninon, kiu veturas en kamiono kaj timas ĝian saltadon, ŝi cedis al ŝi sian lokon apud la ŝoforo, kiun oni lasis al ŝi, ĉar ŝi mem estis graveda.

Vidinte ke la grenplantoj estis difektitaj de fiinsektoj ŝi kondukis la komunumanojn ŝpruci vermifugon en la daŭro de kvin sinsekvaj tagoj. Kaj pro troa laciĝo ŝi malsaniĝis. Sed en la sekvinta tago ŝi ankoraŭ volis daŭrigi la laboron. Ŝia patrino maltrankviliĝis ĝis larmoj kaj diris: "Sjaŭgju, kiel vi tute ne zorgas pri via sano? Kiel vi havigis al vi tian forton?" Fan Sjaŭgju rigardis la portreton de Prezidanto Maŭ kun profunda emocio kaj diris: "La patrino naskis min, la Partio savis min kaj Maŭzedongpenso nutris min en mia kreskado. Estas nia amata Prezidanto Maŭ, kiu donis al mi forton." Ŝi saltis el la lito kaj kondukis la komunumanojn al la kampoj.

Komenciĝis la grandioza Granda Proletara Kultura Revolucio. En la ŝtormo de la klasbatalo Fan Sjaŭgju firme unuiĝas kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj batalas kune kun ili farante novajn kontribuojn en la defendo de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En majo de 1968 naskiĝis la ruĝa regpotenco de Sjuŝaj-gubernio, kaj kamaradino Fan Sjaŭgju estis elektita kiel vicedestro de la revolucia komitato de la gubernio. En aprilo de la kuranta jaro ŝi honore ĉeestis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel membro de la Prezidantaro de la Kongreso. Dum ŝi ĉeestis la Kongreson en Pekino, ŝi multfoje skribis al la kamaradoj de la gubernia revolucia komitato kaj de sia propra unuo. En leteroj ŝi diris ekscitite: "Ĉiuj miaj gloro kaj feliĉo estis donitaj de Prezidanto Maŭ. Mi por ĉiam prenos Vicprezidanton Lin kiel brilan ekzemplon kaj estos senlime fidela al Prezidanto Maŭ. La maro sekigis kaj la ŝtono putriĝos, sed mia koro neniam ŝanĝiĝos!"

VUGANG:

La Moderna

EN la ĝojega tempo, kiam nia tuta popolo kun revolucia emocio celebris la solenan inaŭguron de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, alia moderna granda altforno — la altforno n-ro 3 de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio estis sukcese finkonstruita kaj komencis produkton je la 9-a de aprilo de 1969.

Tridek minutojn post la dekunua antaŭtagmeze de la 9-a, la fandistoj malfermis la elfluan aperturon de la altforno kaj la unuafoje fandita fero elŝprucis. Jen ekbolis ĝojo en la fandejo de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio.

La altforno estis finkonstruita per la plej granda rapideco senprecedenca en la historio de konstruado de altforno de nia lando en nur pli ol tri monatoj, en la tempo, kiam la Granda Proletara Kultura Revolucio akiris grandan venkon. Ĝia konstrua kvalito estis pli bona ol la antaŭaj altfornoj n-ro 1 kaj n-ro 2. Tiu ĉi atingi estas la granda venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, estas la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

La altforno n-ro 3 de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio estas unu el la plej grandaj altfornoj de nia lando. Frue en la jaro 1960 ĝia konstruado jam estis komencita. Sed, perfidinte siajn promesojn, la sovetunia reviziisma renegata kliko subite revokis la senditajn specialistojn en la lasta jarduono de 1960, forportis bluplanojn kaj disŝiris la interkonsentojn pri provizado de ekipaĵoj al Ĉinio; adaptante sin al la bezono de senskrupula kontraŭĉinia agado de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en metalurgiaj organoj plenforte subpremis la iniciatemon de la laborista klaso de nia lando kaj tiel sufokis la konstruadon de altforno n-ro 3.

La granda alvoko de la Dekdua Plena Sesio

Altforno Konstruita

en la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio

de la Oka Centra Komitato de la Partio “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito** kaj ankoraŭ pli bone konstrui nian socialisman industrion, socialisman agrikulturon kaj ĉiujn aliajn aferojn de socialismo” forte kuraĝigis la laboristojn sinokupantajn pri konstruado de la altforno n-ro 3. Kun profunda proletara sento senlime fidela al Prezidanto Maŭ kaj kun profunda malamo al la sovetunia reviziisma renegata klikeo kaj ĝia lakeo Liu Ŝaŭki, ili

aktive respondis al la granda alvoko de nia partio. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, sin apogante sur la propraj fortoj kaj strebante al prospero, ili decidis per siaj praktikaj agadoj rapide kaj en bona kvalito konstrui la altfornon n-ro 3 por esprimi sian fidelecon al Prezidanto Maŭ kaj fari omaĝon al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio. Kaj post aktiva preparado la konstruado de la altforno n-ro 3 estis komencita en januaro de la kuranta jaro.

La nove konstruita altforno n-ro 3 alte staras inter la aliaj fornegoj de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio.





Okaze de la unuafoja elfando de fero el la altforno n-ro 3 de la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio, la revoluciaj laboristoj varme krias kun la ruĝa trezora libreto en la mano: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

En la konstruado, la revoluciaj laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj de la Unua Metalurgia Konstrua Kompanio de la Metalurgia Ministerio kaj la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio, partoprenantaj la konstruadon de altforno n-ro 3, vaste kaj profunde disvolvis grandan amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ **"fondi studrondojn estas bona rimedo, multaj problemoj povas esti solvitaj en ili"**, ili organizis unun post alia pli ol mil diverstipajn studrondojn de Maŭzedongpenso kaj tiel faris la konstruejon en grandan lernoĉambbron de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. En ekstreme malfacila kaj peza konstruado, persistante en komando per revolucio al produkto, ĉiam kun vigla batalspirito kaj senlima entuziasmo, la laboristoj konkeris malfacilojn unun post alia kaj kreis miraklojn unun post alia.

En la 10-a de aprilo, ĉirkaŭ la altforno n-ro 3 arbaris ruĝflagoj kaj sonadis triumfaj kantoj.

Sur la supro de la varmblova fornego 60 metrojn alta pendis granda portreto de Prezidanto Maŭ kaj ore brilanta slogano "Vivu Prezidanto Maŭ!" Dek miloj da revoluciaj laboristoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA subtenantaj la maldekstrulojn, kaj la reprezentantoj de la laboristoj venintaj el koncernaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj de Vuhan, solene okazigis kunvenon por celebri la elfluon de fandita fero antaŭ la fiksita dato, doni la ĝojindan informon al Prezidanto Maŭ kaj fari omaĝon al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio. En la kunveno ili varme celebris la novajn venkojn akiritajn en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando. En ekstreme varma ĝojkriado la kunveno unuanime aprobis gratulan telegramon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin, kaj ankaŭ gratulan telegramon al la Prezidantaro de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

大海 航行 靠 舵手
Dàhǎi Hángxíng Kào Duòshǒu

(En) Maro Navigadon (oni) ŝuldas (al) (la) Stiristo

大海 航行 靠 舵手,
Dàhǎi Hángxíng Kào Duòshǒu,

(En) Granda maro navigadon (oni) ŝuldas (al) (la) stiristo,

万物 生长 靠 太阳,
Wànwù shēngzhǎng kào tàiyáng,
 Ĉio (sian) kreskadon ŝuldas (al) (la) suno,

雨露 滋润 禾苗 壮,
Yǔlù zīrùn hémiáo zhàng,
 Pluvo roso sukplenigado plantidoj fortiĝas,

干 革命 靠的 是 毛泽东思想。
Gàn géming kàode shì Máozédōngsīxiǎng
 Fari revolucion (tio) ŝuldata estas Maŭzedongpenso.

鱼儿 离不开 水 呀,
Yúer libùkāi shuǐ ya,
 Fiŝoj forlasi ne povas akvon,

瓜儿 离不开 秧,
Guāer libùkāi yāng,
 Melonoj forlasi ne povas plantidon,

革命 群众 离不开 共产党,
Gémìng qúnzhòng libùkāi gòngchǎndǎng,
 Revoluciaj amasoj forlasi ne povas komunistan partion,

毛泽东思想 是 不落的 太阳。
Máozédōngsīxiǎng shì búluòde tàiyáng.
 Maŭzedongpenso estas nesubironta suno.

TRADUKO

Navigadon en Maro Oni ŝuldas al la Stiristo

Navigadon en maro oni ŝuldas al la stiristo,

Ĉio ŝuldas sian kreskadon al la suno,

Sub sukplenigado de pluvoj kaj rosoj, plantidoj kreskas fortaj,

Farado de revolucio estas ŝuldata al Maŭzedongpenso.

Fiŝoj ne povas forlasi akvon,

Melonoj ne povas forlasi sian stolonon,

La revoluciaj amasoj ne povas forlasi la Komunistan Partion,


Maŭzedongpenso estas nesubironta suno.

KLARIGOJ

1. La ideografiaĵo 的 (de) estas tre ofte renkontata kaj havas multajn uzadojn, el kiuj ni ĉifoje eksplikas la jenajn du: (1) Post pronomo aŭ substantivo ĝi signas posesivon, ekz., 我的家 **wǒde jiā** (mia familio), 朋友的書 **péngyǒude shū** (libro de amiko); (2) post adjektivo, verbo aŭ vortkombino, ĝi signas *adjektivecon* kvazaŭ la finaĵo *a* en Esperanto, ekz., 偉大的領袖 **wěidàde lǐngxiù** (granda gvidanto), 不落的太阳 **búluòde tàiyáng** (nesubironta suno).

2. Ankaŭ la ideografiaĵo 儿 **ér** havas plurajn uzadojn, el kiuj ni ĉifoje klarigas la jenajn du: (1) Ĝi povas esti uzata kiel finaĵo. En tiu okazo, ĝi fariĝas parto de la antaŭiranta silabo, estas prononcata mallaŭte kaj ĉesas esti memstara silabo, kaj sence ĝi signas *etecon*, ekz., 小魚儿 **xiǎo yúer** (fiŝeto); kaj same kiel esperanta *et* iafoje signas karesan sencon, ekz., 老头儿 **lǎotóuer** (maljunuleto); En la teksto 儿 (er) en 魚儿 **yúer** kaj 瓜儿 **guāer** ĉikaze ne havas sencon de *eto*, sed nur formas dusilabon respektive kun 魚 **yú** kaj 瓜 **guā** por legfacilo. (2) Ĝi signas ankaŭ *infanon*, ekz., 儿童 **értóng** (knab(in)o), 儿子 **érzi** (filo), 女儿 **nǚ'ér** (filino).

3. En han-lingvo, la ideografiaĵo 呀 **ya** estas vorto apartenanta al aparta kategorio, kiu estas ĝenerale metata post vorto aŭ frazo por helpi en esprimo de sento sen propra senco. Ĉi tie 呀 helpas esprimi senton de ĝojo kaj intimeco.



Dum la konstruado de la unua oceana oleŝipo 15,000-tonela "Daking N-ro 27" en nia lando, la Ruĝflaga Ŝipkonstruejo plene disvolvis la gvidan rolon de la laborista klaso. La gvida grupo de "triflanka kombiniĝo" kun laboristoj kiel ĉefa konsistiga parto, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj pristudis sur la ŝipo la proponojn pri teknika revolucio faritajn de laboristoj.

Giganta Oleŝipo Daking

N-ro 27

Sukcese Lanĉita

LA 2-an de aprilo, en la feliĉa tempo kiam nia tuta popolo ĝoje celebris la solenan inaŭguron de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, Daking N-ro 27, 15,000-tonela oleŝipo, unuafoje konstruita de nia laborista klaso, estis sukcese lanĉita. Tiutage, la Ruĝflagan Ŝipkonstruejon regis festtaga etoso. La revoluciaj laboristoj de la tuta fabriko kolektiĝis kun senlima ĝojo ĉirkaŭ la glitvoja lito, varme festis la solenan inaŭguron de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio kaj faris lanĉan inaŭguron de la giganta oleŝipo.

Kiam la ŝipego konstruita de nia laborista klaso mem sukcese glitis en akvon, ĉiuj ĉeestantaj laboristoj foje kaj refoje laŭte kriis svingante la ruĝan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ!"


La oleŝipo Daking N-ro 27 estas la unua de tia tipo giganta oleŝipo konstruita de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Ruĝflaga Ŝipkonstruejo el ŝtalmaterialo produktita de Ĉinio laŭ la instruo

de Prezidanto Maŭ “sinapogi sur la propraj fortoj”. Antaŭ pli ol tri monatoj, kiam la vastaj amasoj de laboristoj de la ŝipkonstruejo finkonstruis la ŝipkorpon de la 10,000-tonela ŝipego Gao Yang kaj ĝin lanĉis, ili tuj sin ĵetis en la batalon por konstrui la gigantan oleŝipon Daking N-ro 27, agante laŭ la stilo kuraĝe batali, timi nenian oferon kaj nenian laciĝon kaj kontinue batali. Kvankam la laborkvanto en veldo de la ŝipkorpo estis duoble pli granda ol tiu de Gao Yang, tamen oni sukcese plenumis la konstruadon de la ŝipkorpo multe, rapide, bone kaj ŝpare en periodo de nur 32 tagoj.

Dum konstruado de la giganta oleŝipo, firme tenante en la koro la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ “**Tuj venos efiko post ekteno de la klasbatalo**” kaj “**Politiko estas la komandanto, kaj estas animo**”, ĉiam prenante la klasbatalon kiel akson

kaj la revolucian amasan kritikon kiel movforton, la revolucia komitato de la fabriko kaj la tie laborantaj PLA-anoj por subtenado de la maldekstruloj firme kondukis laboron forte kritiki la reakciajn absurdaĵojn dissemitajn de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, kiaj “preferi aĉeti ol mem konstrui ŝipojn kaj preferi lui ol aĉeti ŝipojn” k. s., kaj tiel multe altigis la konscion de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. Ili diris kun heroa spirito: Konstrui ŝipojn aŭ ne kaj konstrui gigantajn ŝipojn aŭ ne estas grava problemo koncernanta al la demando ĉu nia lando povas memstare disvolvi la ŝipkonstruan industrion. Prezidanto Maŭ donis al ni laboristoj la rajton konstrui ŝipegojn, kaj ni certe iros nian propran vojon de disvolvado de industrio. Ili diris decide: Kiel ajn malmolaj estas la ŝtalaj platoj, sed

Grandioza “Daking N-ro 27” post surakviĝo



**40-TUNA PNEŬMATIKA ARGANO
ELFARITA**

En la batalaj tagoj de ĝoja renkonto al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, kun profunda proletara sento de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, al Maŭzedongpenso kaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj laboristoj de la Pekina Argana Fabriko kun sukceso provfabrikis 40-tunan pneŭmatikan arganon memprojektitan en la plej rapida procedo kaj plej mallonga periodo por ĝin fabriki kaj faris per tio novan kontribuon al la socialisma konstruado de nia lando.

En la pasinteco, la plej granda argano samtipa, kiun produktis ĉi tiu fabriko, povas elteni la maksimuman ŝarĝopezon nur de 25-tunoj. Por kontentigi la bezonojn de la socialisma konstruado, la revoluciaj laboristoj de la tuta fabriko, strebante en la Granda Proletara Kultura Revolucio, per nur kvin monatoj kaj antaŭtage de la solena inaŭguro de la Naŭa Kongreso de la Partio jam sukcesis provfari la 40-tunan pneŭmatikan arganon memprojektitan.

La vasta amaso de revoluciaj laboristoj de la Rel-traba Fabriko de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio — alia granda moderna ŝtal-laminatejo finkonstruita kaj ekfunkciigita fine de la jaro 1968, unu jaron pli frue ol la antaŭfiksita tempo — rikoltis grandan sukceson sub la varma helpado de la PLA-anoj subtenantaj la maldekstrulojn en la fabriko, ĉiuflanke realigante la tutan serion da instrukcioj ĵus donitaj de Prezidanto Maŭ, forte tenante la revolucion kaj energie stimulan te la produkton. Ili sukcesis laminati kvar specojn de grandtipaj ŝtalproduktoj urĝe bezonatajn de nia socialisma konstruado. Unu el la specoj estas tipo de maldika kaj malpeza, malaltaloja kaj alt-tensi-forta duobla granda T-ŝtalo, kiu atingis la progresintan nivelon. Nun grandaj nombroj da ŝtalproduktoj el tiu ĉi laminatejo sinsekve estas liverataj al diversaj lokoj de nia patrolando.

En iuj landoj, transire de la laminatado de ordinara ŝtalo al la laminatado de granda maldika kaj malpeza, malaltaloja kaj alt-tensi-forta duobla T-ŝtalo, fare de granda, nove konstruita laminatejo, oni bezonas ĝenerale tri aŭ kvar jarojn, sed la laminatistoj de la Baŭtoŭ-a Rel-traba Fabriko trairis la tutan vojon nur en iom pli ol du monatoj.

ne tiom kiom niaj ostoj; kiom ajn grandaj estos la malfaciloj, sed ne tiom kiom nia decido por konstrui ŝipegojn. Havante Maŭzedongpenson por piloti kaj havante ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ, ni certe povos konstrui gigantajn ŝipojn el ŝtala materialo produktita de nia lando mem.

Kiam alvenis la novaĵo pri la armita entrudiĝo fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko al nia Ĝenbaŭ-insulo, ĝi des pli kaŭzis senkompare grandan indignon de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj. Prenante la glitvojan liton kiel baltalejon, la veldilojn kiel armilojn kaj martelojn kiel obusojn, ili forte rebatis la novajn carojn de la sovetunia reviziismo per sia praktika agado

de rapidigo de la konstruado de la giganta oleŝipo.

En la unuafoja konstruado de tia giganta oleŝipo, la ŝipkonstruaj laboristoj de nia lando renkontis multajn novajn teknikajn problemojn. Kun la sentima revolucia spirito kuraĝi pensi, kuraĝi paroli kaj kuraĝi agi, la ŝipkonstruaj laboristoj senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris multajn sciencajn eksperimentojn, kuraĝe faris inventojn kaj teknikajn renovigojn kaj venkis unun post alia teknikajn malfacilojn en strikta kunlaboro kun la revoluciaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj, senĉese plirapidigis la konstruadon de la oleŝipo kaj kreis novan rekordon en la ŝipkonstrua historio de nia lando.



Hajgiaŭ—Heroino en la Kontraŭjapana Rezistmilito

LU GUANG

HAJGIAŬ estis heroino en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ŝi gvidis pli ol cent kamaradojn batali en la kora regiono de la malamiko, vere mirakle. Inter ili troviĝis ankaŭ nemalmultaj bravaj batalantinoj el kiuj ĉiu havis fusilon kaj pistolon.

Hajgiaŭ scipovis pafi samtempe per du pistoloj, kaj estis plej lerta en tio. Ŝi vere povis trafe pafi kion ajn ŝi volis, kiel popolo diras “trapafi la okulojn de kukolo kaj derompi brulantan incensinton per kuglo en distanco de cent paŝoj”. Se oni malmuntis pistolon kaj envolvis la maŝinpartojn en poŝtukon, ŝi povis ilin remunti en pistolon post faro de cent paŝoj kaj tuj ekpafi per ĝi.

Kial ŝi estis tiel lerta en pafado? Tio ja ne estis hazardaĵo. Frue mortis ŝia patrino kaj ŝi vivis mizere kun sia patro de sia infaneco. En ŝia 12-jara aĝo ŝia patro gvidis jardungitojn mortigi tiranon kaj bruligi liajn domojn. Kaj tiam li aliĝis al trupo de la Kontraŭjapana Unuigita Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Estis malfeliĉe, ke en batalo ŝia patro glorie oferis sian vivon. De tiu tempo, Hajgiaŭ, plena de malamo kontraŭ la japana imperiismo, firme decidis nepre venĝi la ĉinan popolon, sian patron kaj la vivoferintajn kamaradojn. Sub helpo de kamaradoj ŝi progresis rapide kaj baldaŭ glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj trejniis sin lerta en lukto. En batalado ŝi estis ne nur brava en sturmadado, sed ankaŭ aparte lerta en pafado.

Iufoje, multaj japanaj agresantaj soldatoj kaj pupaj manĉuaj soldatoj dense sieĝis ŝian trupon. Tio koleri-

gis ŝin, kaj tenante en la manoj po pistolon ŝi batalis sola ĉe unu flanko. Svingante sabron, japana oficiro komandis grandan aron da japanaj soldatoj rekte ataki la pozicion kiun ŝi gardis. Ŝi laŭte kriis: “Se vi informiĝis pri mia kapablo, vi tuj forfuĝu kiel eble plej rapide!” La diabla oficiro tamen ankoraŭ sin ĵetis rekte antaŭen kun spitemo. Levante la pistolon Hajgiaŭ diris: “Nu, mi trapafos vian maldekstran orelon!” Tion dirinte, ŝi ekpafis. “Paf”, duono de la maldekstra orelo de la diabla oficiro estis forigita. Tion vidante, la pupaj manĉuaj soldatoj ekreturnis sin por forkuri. Kriaĉante pro kolerego la diabla oficiro haste levis sian sabron, kaj tio minace teruris la pupajn armeanojn, tiel ke ili ne kuraĝis forfuĝi. Nun li denove komandis ilin fari atakon al la montosupro.

“Paf”, per alia kuglo Hajgiaŭ trapafis la pojnon de la glavtenanta mano de la diabla oficiro kaj la sabro falis sur la teron. La pupaj soldatoj paraliziĝis pro teruro. La diabla oficiro freneziĝis pro kolerego, kaj kriaĉante kaj saltante li komandis la japanajn soldatojn fari denovan sturmon al la pozicio de Hajgiaŭ.

Tio des pli indignigis Hajgiaŭ kaj ŝi ekkriegis: “Vi ankoraŭ ne konas la guston de perejo, post kiam mi trapafis vian orelon kaj pojnon. Nun mi forigu vian kapon!” Apenaŭ ŝi finis sian parolon, ŝi ekpafis la trian kuglon, kaj la diabla oficiro tuj falis kun la kranio frakasita. Ankaŭ la japanaj diablaj soldatoj informiĝis pri la kapablo de Hajgiaŭ, kaj tion vidinte per siaj propraj okuloj tiutage, ili morte teruriĝis. La oficiro estis mortigita, ili sin returnis kaj ekkuris. Hajgiaŭ denove

pafis seriojn da kugloj kaj mortigis nemalmultajn el la forkurantaj diablaj soldatoj.

Alian fojon, stariginte sian trupon en monton, Hajgiaŭ gvidis kelkajn batalantinojn eniri en vilaĝon kie neniu el la vilaĝanoj ne konis Hajgiaŭ, kaj tie knabinoj kaj virinoj ĉirkaŭis ŝin kaj superŝutis ŝin per demandoj.

Hajgiaŭ estis parolema, ŝi ofte klarigis al vilaĝanoj, kial iris la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj ofte faris helpojn al aĝulinoj kaj fratinoj de vilaĝoj, tial ŝi estis varme bonvenigata ĉie, kien ajn ŝi alvenis. Ĉifoje en la vilaĝo maljunulino Ĝang preparis manĝon por ili, kaj tuj ŝi iris al puto ŝultroportante sitelojn por porti akvon.

Neatendite, tiea malbonulo tuj informis tion al la malamiko. Kalkulante ke ĉe Hajgiaŭ estis nur malmulte da homoj, la malamiko alsendis eksterman taĉmenton el nur dekelkaj japanaj diabloj kaj dudekelkaj policistoj. Kiam la malamikoj estis baldaŭ atingontaj la vilaĝan finon, Hajgiaŭ ĝuste venis al la puto kaj tion rimarkis. Ŝi eksciis, ke ili estas malkaŝitaj, kaj ke la malamikoj venas por ilin ataki.

Forfuĝi estis jam neeble. Ekfulmis al ŝi sprita ideo. Ŝi rapide kuŝiĝis post ŝtonego apud la puto, eltiris per la manoj po pistolon, tuj celis la malamikojn alsturmantajn, kaj per sinsekvo da kugloj ŝi faligis kelkajn malamikojn. En tiu tempo, ankaŭ la batalantinoj en la vilaĝo ekpafis. Kaj kvazaŭ rosoj faligitaj de vento, multaj malamikoj falis unu post alia, dum la ceteraj teruriĝis ĝis animperdo kaj forkuris kiel venkitaj hundoj.

**ABUNDA RIKOLTO POST PROVA
KULTURO DE SEKALO EN ALTA
KAJ MALVARMA REGIONO DE
TIBETO**

Sub la gvido de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj dank' al helpo de la PLA-a Propaganda Taĉmento de Maŭzedongpenso dek tri familioj de malriĉaj paŝtistoj en Gjagja-vilaĝo de Sakja-gubernio sur la altebena de Tibeto, sekvante la ekzemplon de Daĝaj, provis kulturi sekalon kun sukceso sur la malvarma regiono pli ol 4,600 metrojn alta super la marnivelo, kaj rikoltis abunde en la sinsekvaj jaroj.

Gjagja-vilaĝo situas sur la norda piedo de Himalajo, kie senprujna periodo daŭras nur ĉ. 70 tagojn, la temperaturo estas ĉiam tre malalta kaj vegetkreska sezono daŭras malpli ol tri monatojn.

Tie ĉi la dek tri malriĉaj familioj firme efektivas la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ pri **sinapogo sur la propraj fortoj** kaj pri **penema luktado** kaj iras la vojon preni brutbredon kiel ĉefan laboron, kombini agrikulturon kun brutbredado kaj fari multspecan mastrumadon en produktado. La malriĉaj paŝtistoj el la dek tri familioj sin organizis en unu interhelpan grupon pri la agrikultura produktado. Ili elektis teron en montvalo, kie ili laboregis dum kelkaj jaroj ekde 1961 super kulturebligado de la grundo ĝis la tempo de aŭtuna rikolto en 1967, ili akiris fine riĉegan rikolton mezkvante de 101 kilogramoj po ĥalo (15 ĥaloj egalas al unu hektaro) kaj poste de 102.5 kilogramoj po ĥalo en 1968.



La Sovetunia

Kliko Estas Morta

Mondaj

LA sovetunia reviziisma renegata kliko kaj la usonaj imperiistoj kompletas inter si por redividi la mondon. La sovetuniaj reviziistoj faris damnindan krimon kontraŭ la mondaj popoloj tiranante ĉie kaj farante ĉion malbonan. Same kiel la usonaj imperiistoj, ili estas la plej ferocaj malamikoj de la popoloj de la mondo.

**LA SOVETUNIA REVIZIISMO ESTAS LA
KOMPLICO N-RO 1 DE LA USONA
IMPERIISMO**

La sovetunia reviziisma renegata kliko agas kiel la kompliko n-ro 1 de la usona imperiismo en ĝia subpremado al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj, ĉiamaniere helpante ĝin en la intrigo estingi la fajron de armitaj bataloj de diverslandaj popoloj.

De longa tempo la sovetunia reviziismo prenas la vjetnaman problemon kiel gravan objekton por fari sian malpuran politikan negocon kun la usona imperiismo. Ĝi aktive klopodas kunage kun la usona imperiismo por intrigi per politika trompo celante plenforte estingi la ardan fajron de revolucio de la popolo de Vjetnamio kaj helpi la usonan imperiismon efektiviĝi la kriman celon longtempe okupi la sudan parton de Vjetnamio kaj dividi la vjetnaman nacion. La sovetuniaj reviziistoj pli energie servas al la trompaĵo de "paco" de la usona imperiismo kaj plie elmontris sian abomenindan vizaĝon de falsa subteno sed vera perfido kaj de falsa opono kontraŭ Usono sed vera kapitulaco en la vjetnama problemo, precipe post kiam ĝi akiris la silentan konsenton de la usona imperiismo pri ĝia okupado de Ĉeĥoslovakio per ekspedo de soldatoj.

Reviziisma Renegata

Malamiko de la

Popoloj

En la Meza Oriento, la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo plenenergie entreprenas kontraŭrevoluciajn “kunajn agadojn” por kune subpremi la arabajn popolojn, komplotante kaj samtempe luktante inter si. En 1967, la usona imperiismo kaj ĝia lakeo Izraelo faris grandskalan agresan militon kontraŭ arabaj landoj; tio estis ja farita sub la silenta permeso kaj subinstigo de la sovetunia reviziismo. Kiam Izraelo okupis vastajn teritoriojn de arabaj landoj laŭ la difinita ofensiva plano, la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo en urĝa komploto kune manipulis la Unuigitajn Naciojn por devigi arabajn landojn al “fajroĉesigo” kaj nerebato kontraŭ la agresantoj. Post tio, la sovetunia reviziismo plie en koluzio kun la usona imperiismo manipulis la Unuigitajn Naciojn produkti “rezolucion” pri “solvo” de la mezorienta problemo, devigantan la arabajn landojn akcepti serion da nacihumiligaj kondiĉoj kaj kompromisi kaj kapitulaci al la usonaj kaj izraelaj agresantoj. De tiam, la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo, kantante en dueto, elmetis jen “projekton”, jen “planon”, energie ofertante la trompaĵon de t. n. “politika solvo” de la mezorienta problemo. La kontraŭ-revolucia negoco, kiun energie faras la sovetunia reviziismo kun la usona imperiismo post la dorso de la arabaj popoloj, ja celas komplete strangoli la liberigan aferon de Palestino, estingi la armitan batalon de la palestina popolo, devigi la arabajn landojn kapitulaci al la usonaj kaj izraelaj agresantoj por plie efektivi la kriman celon dividi inter si la Mezan Orienton kaj sklavigi la arabajn popolojn.

En Afriko, la sovetunia reviziisma renegata kliko faras la saman krimon subfosi la armitajn batalojn de afrikaj popoloj.

Por teni sian nuklean hegemonion kaj fari nukleajn ĉantaĝojn kontraŭ aliaj landoj, de multaj jaroj la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo plenforte faris serion da malpuraj negocoj, kiaj la traktatoj de t. n. “parta malpermeso de nukleaj eksperimentoj” kaj “prevento de disvastiĝo de nukleaj armiloj”, projekto de “nuklea protekto” kaj aliaj nukleaj trompoj. Tio estas alia damninda krimo de la sovetunia reviziismo, kiu elvendas la interesojn de la mondaj popoloj kaj oponas Ĉinion, komunismon kaj la popolon en interligiĝo kun la usona imperiismo kiel ĝia komplico n-ro 1.

Ju pli la sovetunia reviziismo intensigas sian koluzion kun la usona imperiismo por fari sian antaŭmortan barakton, des pli ĝi akcelas la vekigon de la mondaj popoloj kaj plirapidigas sian pereon.

SOVETUNIAJ REVIZIISTOJ ESTAS CENTPROCENTAJ NOVKOLONIISTOJ

De multaj jaroj, la sovetunia reviziismo faras rigoran politikan kontrolon, kruelan ekonomian prirabadon kaj tiranajn militajn intervenojn kaj invadojn kontraŭ iuj orienteŭropaj landoj kaj Mongolio pere de la organizo de Varsovia Traktato kaj “Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo”, arogante celante starigi kolonian imperion kun si mem kiel superreganto. La sovetunia reviziisma kliko estas novaj caroj rajdantaj sur la nuko de orienteŭropaj popoloj.

Por politike superregi la orientan Eŭropon, la sovetunia reviziismo antaŭ ĉio trudis al orienteŭropaj landoj sian tutan reviziisman linion, alprenitan ekde la 20-a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio, por ke la partioj kaj reĝimoj de tiuj landoj degeneru kaj ŝanĝu sian karakteron kaj la revoluciaj popoloj de tiuj landoj perdu siajn socialismajn fruktojn akiritajn post longa batalo. Pretendante kiel la “patriarko” de la “granda komuneco”, la sovetunia reviziismo rekte intervenis en la enoficigon, eksigon kaj transpostenigon de la partiaj kaj registaraj ĉefoj de iuj orienteŭropaj landoj. Kiu ne estas obeema al la sovetunia reviziismo, la lasta tuj subfosas ties pozicion kaj renversas lin; en tio ĝi ne hezitas eĉ publike sendi trupojn por fari okupadon kaj fabriki pupojn per pafiloj. Pri tio la evento de Ĉeĥoslovakio en aŭgusto de la pasinta jaro estas elstara ekzemplo.

En ekonomio, la sovetunia reviziismo utiligas la novkoloniisman instrumenton “Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo” por kruele ekspluati kaj

barbare prirabi la popolojn de iuj orienteŭropaj landoj kaj Mongolio. Sub la nomo de “internacia divido de laboro”, “ekonomia kunlaboro” k. a., ĝi kontrolas la financon kaj ekonomian planon kaj multajn gravajn ekonomiajn branĉojn de la membroj-landoj de la nomita konsilantaro. Sub la preteksto de la t. n. “specialigo de produkto” kaj “kunlaboro de produkto”, ĝi krome devigas iujn orienteŭropajn landojn reorganizi ilian ekonomian strukturon, por malebligi al ili memstare kaj memdecide disvolvi ilian propran ekonomion. Laŭ la tiranaj postuloj de la sovetunia reviziismo, Bulgario fariĝis fakte ĝia “hortikultura ĝardeno”, Hungario devas forlasi aŭ redukti sian produktadon de iuj tradiciaj industrioj, kaj la Germana Demokratia Respubliko estas devigita reformi siajn grandajn industriajn entreprenojn, kiuj havis siajn tradiciajn produktaĵojn, en fabrikojn servantajn speciale por la sovetunia reviziismo. Ĝuste per tiaj malnoblaj rimedoj, la sovetunia reviziismo turnis por si tiujn landojn en bazojn de krudaj materialoj, merkaton de varoj kaj dependajn fabrikojn, por ke tiuj landoj reduktiĝu al ĝiaj ekonomiaj dependaĵoj. Cetere, en la eksterlanda komerco la sovetunia reviziismo vaste aplikas neegalprezan interŝanĝon por akiri superprofiton. Ekzemple, la sovetunia reviziismo povas interŝanĝe akiri kvar ĉevalojn de Mongolio kontraŭ unu biciklo kaj unu ŝafon kontraŭ unu ludila ŝafo. Kaŭze de la kruela rabado de la sovetunia reviziismo, la brutbredado de Mongolio serioze suferis, tiel ke la reviziismaj aŭtoritatuloj de Mongolio devigite kriadas ke la popolo manĝu sovaĝajn bestojn aŭ nutru sin vegetare. Mongolio fariĝis nun unu el la landoj, kiuj havas plej pezajn ŝuldojn, pro akcepto de la t. n. “helpoj” kaj “favoraj pruntadoj” de la sovetunia reviziismo; ĝi nun ne povas redoni dekonon de la ŝuldoj pruntprenitaj de la sovetunia reviziismo, eĉ se ĝi forvendus sian tutan brutaron.

En la vastaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, alte tenante la ŝildojn de “helpoj”, “pruntadoj” kaj kunlaboro en “ekonomio kaj tekniko”, la sovetunia reviziismo energie ekspansias en ekonomio, manie rabas en diversaj landoj riĉfontojn kaj elsuĉas sangon de diverslandaj popoloj.

Sennombraj faktoj pruvas, ke same kiel la usona imperiismo, la sovetunia reviziismo estas plej granda internacia ekspluatanto.

SOVETUNIA REVIZIISMO ESTAS EKZEKUTISTO DE DIVERSLANDAJ REVOLUCIAJ POPOLOJ

La reviziisma renegata kliko de Sovetunio interligiĝis kun plenmano da reakciaj regantoj


de diversaj landoj en kontraŭrevoluciaj aliancoj kaj kolektis nombrojn da renegatoj kaj laboristperfiduloj kiel agentojn por subfosi diverslandajn revoluciajn movadojn. Ili eĉ liveras armilojn al reakciularoj por buĉi popolajn revoluciajn armitajn fortojn, kiuj faras sangverŝan batalon.

La sovetunia reviziismo senhonte laŭdas kiel “revolucion alon” la faŝisman militistan reĝimon de Suharto-Nasution, kies manoj estas plene makulitaj de la sango de la indonezia popolo. La sovetunia reviziismo liveris al la indonezia reakciularo grandajn nombrojn da buĉaj armiloj por helpi al la faŝisma militista reĝimo subpremi la revolucion armitan batalon de la indonezia popolo. La aeroplanoj kaj kanonoj, kiujn la indonezia reakciularo uzas por fari kontraŭrevoluciajn “ĉirkaŭekstermojn” kontraŭ la popolaj armitaj fortoj en la okcidenta Kalimantano kaj aliaj lokoj, venas plejparte de la municiejo de la sovetunia reviziismo. Samtempe, ĝi kolektis ĉirkaŭ si en Moskvo plenmanon da renegatoj el la Indonezia Komunista Partio por kolporti “pacan vojon” kaj aliajn reviziismajn absurdaĵojn por subfosi la armitan revolucion batalon de la indonezia popolo.

La sovetunia reviziismo plenforte laŭdas kaj subtenas ankaŭ la faŝisman militistan reĝimon kaj la murdiston de Birmo Ne Vin. En sia letero al la reakcia reĝimo de Ne Vin, Kosigin, korifeo de la sovetunia reviziismo, garantiis “plenan subtenon” al tiu reakcia reĝimo. Nelonge post tio, la sovetunia reviziismo jam sendis grandajn nombrojn da armiloj al Ranguno, liverante ilin al la reakcia reĝimo de Ne Vin, por ke ĝi povu buĉi popolajn armitajn fortojn de Birmo.

La sovetunia reviziismo, krome, starigis diplomation kun la vaste fifama produktaĵo de novkoloniismo — “Malajzio” kaj promesis doni “militajn helpojn” al la pupa kliko de Rahman por ke ĝi povu subpremi la revoluciajn armitajn batalojn de la popoloj de Malajo kaj la norda Kalimantano.

En la lastaj jaroj, reviziisma Sovetunio estis la lando kiu liveris al la hinda reakciularo plej multe da armiloj kaj helpis ĝin konstrui aeroplanajn fabrikojn kaj aliajn militajn konstruaĵojn por oponi la najbarojn kaj subpremi la revoluciajn batalojn de la hinda popolo. Samtempe, la sovetunia reviziismo konstante utiligas la grandan renegaton Danĝe kaj aliajn reviziistojn de la Hinda Komunista Partio kiel agentojn por plenforte disvastigi la absurdaĵojn de “paca transiro” kaj “parlamentata vojo” por paralizi la revolucion



Karaj kaj estimataj amikoj:

Tre profundan dankon al vi pro la belega kalendaro kaj la gramofona disko "Ruĝa Signal-lanterno" kun la muziknotoj. La neforgesebla revuo *El Popola Ĉinio* aspektas pli bela kaj pli interesa kun ĉiu apero. Mi ĉiam atendas ĝian alvenon kun la plej granda intereso kaj scivolemo. Mi neniam enuiĝas legante la saĝajn pensojn kaj vortojn de via genia Gvidanto Maŭ Zedong. Oni devas ĉiam ion lerni kaj pripensi kaj mi estas tute konvinkita, ke popolo edukita kaj armita per Maŭzedong-penso havos profundan influon sur mondaferoj kaj historio.

Ĉi tie mi sendas al vi ĉiuj miajn sincerajn bondezirojn por forta sano kaj granda sukceso en ĉiuj viaj

entreprenejoj dum la jaro 1969. Denovan dankon al vi.

M. L. M. Novzelando

Estimataj kamaradoj:

Mi tre dankas vin pro trezoraj libroj kiujn vi sendis al mi lastatempe. Mia proksimularo aŭskultadis kun plezuro la novan kaj belan muzikon kaj aplaudis ĝin. La kalendaron, spegulantan iamaniere ankaŭ vian Grandan Proletaran Kulturaran Revolucion, mi ekspoziciis sur la plej videbla murloko de la hejmo. Kiel kutime mi daŭrigas la legadon de verkoj de Prezidanto Maŭ. Antaŭnelonge mi legis la 12-an numeron de EPC, en kiu aperis kelkaj interesaj artikoloj pri diversaj aferoj. Via revuo tre multe helpas al ni albanaj studentoj kaj instruistoj, en nia granda politika kampanjo por revoluciigi nian edukatan sistemon kaj eduk-enhavon, pere de artikoloj pri la sama movado plensukcese disvolviĝanta en la ruĝa Ĉinio. Tre interesa estas ankaŭ la artikolo (letero) al itala esperantisto pri celo de E-uzado.

Bonan sanon kaj sukceson!

B. M. Albanio

Karaj gesamideanoj:

Permesu al mi sendi al vi ĉiuj amikan saluton el Ĉeĥoslovakio.

Kial mi skribas al vi? Jam longe mi interesiĝas pri via lando, la laborema ĉina popolo kaj via Granda Proletara Kultura Revolucio. Sed plej multe mi estimas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ Zedong.

Ekde aŭgusto, la sovetunia okupo alportas katastrofon al nia popolo.

Mi ŝatas ricevi pli multe da informoj pri Ĉinio, tial mi petas vin pri regula sendado de la gazeto *El Popola Ĉinio*. Ĉi tie ne estas eble aboni vian gazeton.

Atendante vian afablan respondon, mi deziras al vi sukceson en via laboro pro Esperanto kaj via gazeto.

Saluton!

I. T. Ĉeĥoslovakio

batalvolon de la hinda popolo kaj elvendi la revolucion de Hindio.

En Japanio, la sovetunia reviziismo intensigas kontraŭrevolucionan komploton kun la reakcia Sato-registaro kaj subtenas la reviziisman klikon de Mijamoto de la Japana Komunista Partio por subfosi la kontraŭusonon patriotan movadon de la japana popolo.

En Kongolando (K.), la sovetunia reviziismo aktive subtenis la usonan imperiismon utiligi la armitajn fortojn de la Unuigitaj Nacioj por interveni en la kongolandajn internajn aferojn kaj "restarigis la diplomatian rilaton" kun Mobutu-kliko, kies manoj estas plene makulitaj de la sango de la popolo de Kongolando (K.). Samtempe, la sovetunia reviziismo instigas propagande la revoluciulojn de Kongolando (K.) "paciĝi" kun la lakeo de la usona imperiismo, ĉiurimede skismig-

ante la nacian liberigan movadon de Kongolando (K.) kaj subfosante la patriotan armitan batalon de ĝia popolo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: "La socialisma sistemo finfine anstataŭos la kapitalisman sistemon, tio estas objektiva leĝo sendependa de homa volo. Ne gravas kiel ajn la reakciuloj provas reteni la radon de historio, frue aŭ malfrue revolucio nepre okazos kaj certe triumfos." La kontraŭrevolucia krima agado farita de la sovetunia reviziisma renegata kliko en koluzio kun diverslandaj reakciuloj kaj plenmano da renegatoj kaj laborist-perfiduloj neniel povas haltigi la venkan antaŭeniradon de la revolucio de diverslandaj popoloj. Male, ĝi nur akcelos rapidan vekigon kaj leviĝon al batalo ĉe diverslandaj popoloj.

Estas ne malproksima jam la tago por fine enterigi la usonan imperiismon kaj la sovetunian reviziismon!

Sur la

kovrilo:

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faras ekstreme gravan paroladon en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Sur la

dorskovrilo:

La revoluciaj amasoj kantas kaj dancas por celebri la grandan triumfon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (132) 1969

Ĉefa Enhavo

Raporto al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

Statuto de la Komunista Partio de Ĉinio

Strikte Sekvi Prezidanton Maŭ Signifas Venkon

Senfinan Dankon Ŝuldas Ni al la Partio (*poemo*)

La Koro de Batalantoj de Ĝenbaŭ-insulo Sin Turnas Ĉiam al Pekino (*poemo*)

Aklamo al la Naŭa Kongreso de la Partio (*poemo*)

La Popolanoj de Ĉiuj Nacioj Ĝoje Celebras la Venkan Malfermiĝon de la Naŭa Kongreso de la Partio

Prezidanto Maŭ Ligiĝas kun Anjuan-aj Laboristoj Koron kun Koro

La Koroj de la Subpremataj Popoloj Direktiĝas al la Ruĝa Suno

Vicprezidanto Lin Estas la Brila Ekzemplo Imitinda por Ni

Vej Fengjing — Bona Laboristino de Prezidanto Maŭ

Fan Sjaŭgju — Kompartianino Amata de Amasoj

La Moderna Alt forno Konstruita en la Vuhan-a Ferŝtala Kompanio

Giganta Oleŝipo Daking N-ro 27 Sukcese Lanĉita

La Sovetunia Reviziisma Renegata Kliko Estas Morta Mal-amiko de la Mondaj Popoloj

Ĝoja Celebrado pri la Triumfo de la Naŭa Kongreso de la Partio per Praktika Agado

La vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Liaŭjuan-a Karbominejo en Gilin-provinco forte tenas revolucion kaj energie stimulas produkton kaj celebras la triumfon de la Naŭa Kongreso de la Partio per elstaraj atingoj.







(Supre) Sani - kaj miaŭ-naciaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Junnan-provinco varme aklamas la publikigon de la Novaĵ-komuniko de la Unua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio.

(Supre maldekstre) La eksterordinare ĝojiga novaĵo pri la triumfa fermiĝo de la Naŭa Kongreso de la Partio alvenas al la Ĉefurba Fer-ŝtala Kompanio, kaj la vasta amaso de fer-ŝtalaj laboristoj konkure legas la ĝojigan komunikon.

(Sube maldekstre) La reprezentanto, kiu ĉeestas la kongreson de aktivuloj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedong-penso de Gilin-provinco, studas la novaĵ-komunikon de la Naŭa Kongreso de la Partio kune kun la vasta revolucia amaso.

(Sube meze) La diversnaciaj revoluciaj popolanoj de la urbo Jangi en la Janbian-a Kore-nacia Aŭtonoma Regiono de Gilin-provinco kore deziras longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ.

(Sube dekstre) Niaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen kaj transmaraj elmigrintaj ĉinoj, kiuj ĉeestas la Foiron de Eksportaj Varoj de Ĉinio en Kantono, varme celebras la grandan triumfon de la Naŭa Kongreso de la Partio.





Kun eksterordinara ekscito la komandantoj kaj batalantoj de la limgarda trupo en la regiono de Ĝenbaŭ-insulo — fronto kontraŭ reviziismo — ĝustatempe transsendas la novaj-komunikon de la Naŭa Kongreso de la Partio al ĉiuj gardejoj.

La vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Hinhua-librejo decidas celebri la triumfon de la Naŭa Kongreso de la Partio per sia praktika agado — altrapida distribuado de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Persiste antaŭenpuŝante produkton per revolucio, la vasta amaso de revoluciaj laboristoj de Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kreas novan nivelon en la historio de produkto de tiu kompanio.

La aer-armeaj batalantoj, kiuj gardstaras ĉe sia posteno por defendi la aeran teritorion de nia patrio, varme aklamas la grandan triumfon de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj decideme diras: “Ni nepre liberigos Tajvan! Ni ĵuras defendi per niaj vivoj la sanktan teritorion kaj suverenecon de nia granda patrio!”





Sceno de svarma transportado ĉe Siping-stacio



Komandante produkton per revolucio, la vasta amaso de revoluciaj laboristoj de Ĉang-ĉun-a Unua Aŭtomobila Fabriko kreas la plej altan rekordon en la historio de tiu fabriko.

Ĝojo en vido de ondantaj rizoj. Per siaj elstaraj atingoj en la tenado de revolucio kaj stimulado de produkto la vasta amaso de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la Tengkiaŭ-komunumo de Jahian-gubernio de Hajnan-insulo de Guangdong-provinco ĝoje celebras la triumfon de la Naŭa Kongreso de la Partio.



Prenante la komunumanojn de Daĝaj kiel ekzemplon la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Donggiang-a Popolkomunumo de Vudu-gubernio, Gangsu-provinco, pene luktas kaj konstruas ŝtuparkampojn de alta normo.



